Esperanto en servo de la monda paco



paco

MONDPACA ESPERANTISTA MOVADO (MEM)

Bulteno de la MEM-Sekcio de GERMANA DEMOKRATIA RESPUBLIKO (GDR) · 1976



El la Fina Akto

Deklaro pri la principoj, kiuj direktas la interrilatojn de la partoprenantaj ŝtatoj

La partoprenantaj ŝtatoj,

konfirmante sian devoligon al paco, sekureco kaj justeco kaj al konstanta evoluo de amikaj rilatoj kaj kunlaboro;
komprenante, ke tiu devoligo, kiu respegulas la intereson kaj klopodojn de la popoloj, prezentas por ĉiu el la partoprenantaj ŝtatoj, konsidere la spertojn el la pasinteco, pli altan respondecon nun kaj estonte;
konfirmante sian plenan kaj aktivan subtenon al la Unuiĝintaj Nacioj kaj al la plifortigo de ĝiaj rolo kaj efikeco rilate la firmigon de la internacia paco, la internacian sekurecon kaj justecon kaj kontribuadon al la solvo de internaciaj problemoj same kiel rilate la evoluadon de amikecaj interrilatoj kaj kunlaboro inter la ŝtatoj tiom, kiom ili kiel membroj de la Unuiĝintaj Nacioj estas instigataj al tio en harmonio kun la celoj kaj principoj de la Unuiĝintaj Nacioj;
deklarante sian unuaniman konsenton kun la sube menciitaj principoj, kiuj konformas al la Ĉarto de la Unuiĝintaj Nacioj, same kiel sian unuaniman volon agi konforme al la celoj kaj principoj de la Ĉarto de la Unuiĝintaj Nacioj, aplikante ĉi tiujn principojn;

proklamas sian decidemon, ke ĉiu en siaj rilatoj al ĉiu ajn alia partoprenanta ŝtato, malgraŭ ties politikaj, ekonomiaj aŭ sociaj sistemoj, malgraŭ ties grandeco, geografia situo aŭ evolustato, respektu kaj praktike apliku jenajn principojn, kiuj ĉiuj estas fundamente signifaj kaj direktodonaj al la reciprokaj interrilatoj:

I. Suverena egaleco, respektado de la imanentaj rajtoj de la suvereneco

La partoprenantaj ŝtatoj respektos reciproke siajn egalecon kaj individuecon same kiel ĉiujn imanentajn rajtojn de la suvereneco kaj al ĝi apartenantajn rajtojn, inkluzive, antaŭ ĉio, la rajton de ĉiu unuopa ŝtato je leĝa egaleco, teritoria integreco same kiel je libereco kaj politika sendependeco.
Same ili respektos la rajton de ĉiu alia partoprenanta ŝtato libere elekti kaj evoluigi sian politikan, socialan, ekonomian kaj kulturan sistemon kaj fiksi siajn juron, leĝojn kaj dekretojn.
En la kadro de la internacia juro ĉiuj partoprenantaj ŝtatoj havas samajn rajtojn kaj devojn. Ili respektos la rajton de ĉiu alia partoprenanta ŝtato fiksi kaj formi siajn rilatojn al aliaj ŝtatoj konforme al la internacia juro kaj en la spirito de tiu ĉi deklaro laŭ siaj deziroj. Ili opinias, ke iliaj landlimoj povas esti ŝanĝataj konforme al la internacia juro per pacaj rimedoj kaj interkonsentoj. Ili havas samtempe la rajton partopreni aŭ ne partopreni en internaciaj organizaĵoj, esti aŭ ne esti kontraktanta partio de duflankaj aŭ multflankaj kontraktoj, inkluzive la rajton esti aŭ ne esti kontraktanta partio de iu alianco; same ili havas la rajton je neŭtraleco.

II. Sindeteno de minaco aŭ apliko de perforto

La partoprenantaj ŝtatoj ĝenerale detenos sin en siaj reciprokaj rilatoj kaj ankaŭ en siaj internaciaj rilatoj de la minaco aŭ apliko de perforto, kiu celas kontraŭ la teritoria integreco aŭ politika sendependeco de iu ajn ŝtato aŭ kiu estas iel neakordigebla kun la celoj de la Unuiĝintaj Nacioj kaj kun tiu ĉi deklaro. Estas malpermesate pretendi rajton je konsideroj, celantaj pravigi la sinturniĝon al minaco aŭ apliko de perforto, kio kontraŭas al tiu ĉi principo.
Konforme al tio la partoprenantaj ŝtatoj detenos sin de ĉiu ago, kiu prezentas minacon aŭ rektan aŭ nerektan aplikon de perforto kontraŭ iu alia partoprenanta ŝtato. Same ili detenos sin de ĉiu manifestado de perforto, kiu celas persvadi iun alian partoprenantan ŝtaton al rezigno pri plena praktikado de siaj suverenaj rajtoj. Ili ankaŭ detenos sin de ĉiuj perfortaj reprezalioj en siaj reciprokaj rilatoj.
Neniu tia minaco aŭ apliko de perforto estos uzata kiel rimedo por solvi konfliktojn aŭ problemojn, kiuj povus elvoki konfliktojn inter ili.

III. Netuŝebleco de la landlimoj

La partoprenantaj ŝtatoj konsideras reciproke ĉiujn siajn landlimojn same kiel la landlimojn de ĉiuj ŝtatoj en Eŭropo netuŝeblaj kaj tial ne atencos kontraŭ tiuj landlimoj nun kaj estonte.
Ili detenos sin tial ankaŭ de ĉiu pretendo aŭ ago por ekokupi parton aŭ la tutan teritorion de iu ajn partoprenanta ŝtato.

IV. Teritoria integreco de la ŝtatoj

La partoprenantaj ŝtatoj respektos la teritorian integrecon de ĉiu partoprenanta ŝtato.
Konforme al tio ili detenos sin de ĉiu ago kontraŭ la teritoria integreco, politika sendependeco aŭ unueco de ĉiu partoprenanta ŝtato, kiu ne estas akordigebla kun la celoj kaj principoj de la Ĉarto de la Unuiĝintaj Nacioj, ĉefe de ĉiu tia ago, kiu prezentas minacon aŭ aplikon de perforto.
La partoprenantaj ŝtatoj distancos sin de tio, igi la teritorion de ĉiu alia partoprenanta ŝtato objekto de militista okupado aŭ de aliaj rektaj aŭ nerektaj perfortaj agoj, ne respektante la internacian juron, aŭ igi ĝin objekto de aneksado per tiuj agoj aŭ per minaco apliki ilin. Neniu tia okupado aŭ aneksado estos rigardata kiel laŭleĝa.

V. Paca solvado de konfliktoj

La partoprenantaj ŝtatoj solvos konfliktojn inter si per pacaj rimedoj tiamaniere, ke ne estos endanĝerigataj la internacia paco kaj la internacia sekureco same kiel la justeco.
Ili strebos atingi lojale kaj en la spirito de la kunlaboro rapidan kaj justan solvon sur la bazo de la internacia juro. Por tiu celo ili uzos tiajn rimedojn kiel intertraktadon, esploradon, peradon, interkonsentadon, arbitracion, juĝan solvon aŭ aliajn pacajn rimedojn laŭ propra elekto, inkluzive ĉiujn aliajn konfliktsolvajn metodojn, pri kiuj la partoprenantaj partioj interkonsentiĝis antaŭ estiĝo de la konflikto.*)

VI. Neenmiksiĝo en internajn aferojn

La partoprenantaj ŝtatoj detenos sin, malgraŭ siaj reciprokaj rilatoj, de ĉiu rekta aŭ nerekta, individua aŭ kolektiva enmiksiĝo en la internajn aŭ eksterajn aferojn, kiuj apartenas al la intern-

de Helsinki

ŝtata kompetenteco de iu alia partoprenanta ŝtato.
Konforme al tio ili detenos sin de ĉiu formo de armita interveno aŭ de minaco de tia interveno kontraŭ iu alia partoprenanta ŝtato.
Sub ĉiuj cirkonstancoj ili same detenos sin de ĉiuj militaj kiel ankaŭ politikaj, ekonomiaj aŭ aliaj premrimedoj, kiuj celas subigi al sia propra intereso la praktikadon de la imanentaj rajtoj de la suvereneco de iu alia partoprenanta ŝtato kaj havigi al si tiamaniere iun ajn profiton.
Konfirme al tio ili detenos sin, inter alie, de la rekta aŭ nerekta subteno de terorisma agado aŭ subfosa aŭ alia agado, celanta al la perforta renverso de la reĝimo de iu alia partoprenanta ŝtato.

VII. Respektado de homaj rajtoj kaj bazaj liberecoj, inkluzive la liberecon de pensado, konscienco, religio aŭ konvinko

La partoprenantaj ŝtatoj respektos la homajn rajtojn kaj bazajn liberecojn, inkluzive la liberecon de pensado, konscienco, religio aŭ konvinko por ĉiuj sen diferenco de raso, sekso, lingvo aŭ religio.
Ili akcelos kaj stimulos la efikan praktikadon de la civilaj, politikaj, ekonomiaj, socialaj, kulturaj kaj aliaj rajtoj kaj liberecoj, kiuj ĉiuj rezultas el la homa digno kaj estas esencaj por libera kaj plena homa evoluado.
En tiu ĉi kadro la partoprenantaj ŝtatoj agnoskos kaj respektos la liberecon de la individuo konfesi sin sola aŭ en komuneco kun aliaj al iu religio aŭ konvinko kaj praktiki ĝin konforme al tio, kion lia konscienco ordonas al li.
La partoprenantaj ŝtatoj, sur kies teritorio vivas naciaj minoritatoj, respektos la rajton de iliaj anoj je egaleco antaŭ la leĝo; ili garantios al ili ĉiun eblecon uzi vere la homajn rajtojn kaj bazajn liberecojn kaj tiamaniere gardos iliajn legitimajn interesojn en tiu ĉi sfero.
La partoprenantaj ŝtatoj agnoskos la universalan signifon de la homaj rajtoj kaj bazaj liberecoj, kies respektado estas grava faktoro por la paco, justeco kaj bonfarto, kiuj siaflanke estas necesaj por garantii la evoluadon de amikecaj rilatoj kaj kunlaboro inter ili same kiel inter ĉiuj ŝtatoj.
Ili ĉiam respektos tiujn rajtojn kaj liberecojn en siaj reciprokaj rilatoj kaj penos unuope kaj komune, ankaŭ en kunlaboro kun la Unuiĝintaj Nacioj, stimuli la universalan kaj efikan respektadon de tiuj rajtoj kaj liberecoj.
Ili certigas la rajton de la individuo koni kaj praktiki siajn rajtojn kaj devojn en tiu ĉi sfero.
En la sfero de homaj rajtoj kaj bazaj liberecoj la partoprenantaj ŝtatoj agos konforme al la celoj kaj principoj de la Ĉarto de la Unuiĝintaj Nacioj kaj al la Ĉenerala Deklaro de la homaj rajtoj. Plue ili plenumos tiom, kiom ili estas ligataj al ili, siajn devoligojn, fiksitajn en la internaciaj deklaroj kaj konvencioj en tiu ĉi sfero, inkluzive en la Internacia Konvencio pri homaj rajtoj.

VIII. Egalrajteco kaj rajto je memdecido de la popoloj

La partoprenantaj ŝtatoj respektos la egalrajtecon de la popoloj kaj ilian rajton je memdecido, ĉiutempe agante konforme al la celoj kaj principoj de la Ĉarto de la Unuiĝintaj Nacioj kaj al la koncernaj normoj de la internacia juro, inkluzive tiujn, kiuj rilatas al la teritoria integreco de la ŝtatoj.
Surbaze de la principo de egalrajteco kaj rajto je memdecido de la popoloj ĉiuj popoloj havas ĉiam la rajton decidi pri sia interna kaj ekstera politika stato en plena libereco, kiam kaj kiel ili deziras, sen ekstera interveno, kaj efektivigi laŭ propra deziro sian politikan, ekonomian, socialan kaj kulturan evoluon.
La partoprenantaj ŝtatoj konfirmas la universalan signifon de la respektado kaj efika praktikado de la egalrajteco kaj de la rajto je memdecido de la popoloj por la evoluado de amikecaj rilatoj inter si kiel ankaŭ inter ĉiuj ŝtatoj; ili atentigas ankaŭ pri la signifo, kiun meritas la eliminigo de ĉiu formo de malobeo al tiu ĉi principo.

IX. Kunlaboro inter la ŝtatoj

La partoprenantaj ŝtatoj evoluigas sian kunlaboron inter si kaj kun ĉiuj ŝtatoj en ĉiuj sferoj laŭ la celoj kaj principoj de la Ĉarto de la Unuiĝintaj Nacioj.
Evoluigante sian kunlaboron, la partoprenantaj ŝtatoj atribuos specialan signifon al la sferoj, fiksitaj en la kadro de la Konferenco por Sekureco kaj Kunlaboro en Eŭropo, je kio ĉiu el ili kontribuos sub kondiĉoj de plena egaleco.
Evoluigante sian kunlaboron, ili penos surbaze de egaleco kunhelpi al reciproka kompreno kaj konfido, amikecaj kaj bonnajbaraj rilatoj inter si, internacia paco, internacia sekureco kaj justeco. Evoluigante sian kunlaboron, same ili penos plibonigi la bonfarton de la popoloj kaj kontribui al plenumo de iliaj deziroj, inter alie per la avantaĝoj, kiuj rezultas el pli ampleksa reciproka konateco kiel ankaŭ el la progreso kaj sukcesoj en la ekonomia, scienca, teknika, sociala kaj humaneca sferoj. Ili entreprenos paŝojn por prosperigi kondiĉojn, kiuj igas tiujn avantaĝojn pli facile atingeblaj por ĉiuj; ili konsideros la intereson de ĉiuj, ĉefe la intereson de la evoluantaj landoj malpliigi en la tuta mondo diferencojn en la stato de la ekonomia evoluo.
Ili konfirmas, ke registaroj, institucioj, organizajoj kaj personoj ludos gravan kaj pozitivan rolon por kontribui al atingo de tiuj ĉi celoj de ilia kunlaboro.
Plifortigante sian kunlaboron kiel supre menciite, ili strebos evoluigi pli intimajn reciprokajn rilatojn sur plibonigita kaj longdaŭra bazo por utilo de la popoloj.

X. Lojala plenumo de internaciaj devoligoj

La partoprenantaj ŝtatoj plenumos lojale siajn internacijurajn devoligojn, nome jenajn, kiuj rezultas el la ĝenerale agnoskitaj principoj kaj reguloj de la internacia juro, kiel ankaŭ jenajn devoligojn, kiuj rezultas el kontraktoj, konformaj al la internacia juro, aŭ el aliaj konvencioj, kies kontraktanta partio ili estas.
Praktikante siajn suverenajn rajtojn, inkluzive la rajton fiksi siajn leĝojn kaj dekretojn, ili plenumos siajn leĝajn devoligojn en la kadro de la internacia juro; plue ili konsideros kaj realigos la decidojn de la Fina Akto de la Kon-

ferenco por Sekureco kaj Kunlaboro en Eŭropo kiel decas.
La partoprenantaj ŝtatoj certigas preferi siajn devoligojn el la Ĉarto de la Unuiĝintaj Nacioj laŭ ĝia artikolo 103 en kazo de kontraŭdiro inter tiuj devoligoj, kiujn prenis sur sin la membroj de la Unuiĝintaj Nacioj laŭ ĝia Ĉarto, kaj la devoligoj el iu ajn kontrakto aŭ el aliaj internaciaj konvencioj.
Ĉiuj antaŭe menciitaj principoj estas de baza signifo kaj sekve estos aplikataj egale kaj senrezerve, dum ĉiu el ili estos interpretata kun konsidero al la aliaj.
La partoprenantaj ŝtatoj deklaras sian firman volon respekti kaj apliki la principojn, fiksitajn en la prezentata deklaro, en siaj reciprokaj rilatoj kaj kunlaboro plene laŭ ĉiuj aspektoj por garantii al ĉiu partoprenanta ŝtato la avantaĝojn, kiuj rezultas el la respektado de tiuj principoj fare de ĉiuj.
Konsiderante la prezentitajn principojn kiel decas, ĉefe la unuan frazon de la deka principo „Lojala plenumo de internacijuraj devoligoj", la partoprenantaj ŝtatoj konstatas, ke la prezentita deklaro tuŝas nek iliajn rajtojn kaj devoligojn nek la ĉi-koncernajn kontraktojn kaj konvenciojn kaj interkonsentojn.
La partoprenantaj ŝtatoj deklaras la konvinkon, ke la respektado de tiuj ĉi principoj akcelos la evoluadon de normalaj kaj amikecaj rilatoj kaj la progreson de la kunlaboro inter ili en ĉiuj sferoj. Plue ili deklaras la konvinkon, ke la respektado de tiuj ĉi principoj favoras la evoluadon de politikaj kontaktoj inter ili, kiuj siaflanke kontribuus al pli bona kompreno de iliaj starpunktoj kaj opinioj.
La partoprenantaj ŝtatoj deklaras sian intencon formi siajn rilatojn al ĉiuj aliaj ŝtatoj en la spirito de la principoj, entenataj en tiu ĉi deklaro.

*) Se per neniu el la antaŭe menciitaj pacaj rimedoj ne estus atingebla solvo, tiam la partioj koncernataj per konflikto plue serĉos reciproke interkonsentendan vojon por la paca reguligo de la konflikto. Partoprenantaj ŝtatoj, kiuj estas partioj de konflikto estiĝanta inter ili, kaj ĉiuj aliaj partoprenantaj ŝtatoj sin detenos de ĉiu ago, kiu povus pliakrigi la situacion en tia grado, ke estus endanĝerigita la konservo de la internacia paco kaj de la internacia sekureco kaj per tio malfaciligita paca reguligo de la konflikto.

Trad. D. Berndt

■

Romesh Chandra

La mondvasta influo de Helsinki



Romesh Chandra, la ĝenerala sekretario de Tutmonda Packonsilantaro (mezo), kun prof. Günter Drefahl, prezidanto de la Packonsilantaro de GDR kaj Werner Rümpel, ĝenerala sekretario de PK de GDR. Foto: Zentralbild

La subskribo de la Fina Akto de la Konferenco por Sekureco kaj Kunlaboro en Eŭropo, la 1-an de aŭgusto, estis en la mondhistorio senekzempla okazintaĵo. La malstreĉiĝo ricevis materian enhavon. Io simila ankoraŭ neniam okazis.
Ĉi tie oni faris konkretajn interkonsentojn por sekurigi la suverenecon kaj sendependecon de ĉiuj eŭropaj ŝtatoj same kiel por subteni la ekonomian progreson en ĉiu lando de Eŭropo per pli bona kunlaboro en ĉiuj sferoj.
La iniciativoj fare de Sovetunio kaj de la aliaj socialismaj landoj dum ĉiuj okazoj havis decidan signifon por venki obstaklojn, per kiuj la adeptoj de la malvarma milito kaj la malamikoj de malstreĉiĝo baris la vojon al la klopodoj pri interkonsentado por malhelpi progresojn en tiu direkto.
Milionoj da homoj ĝoje salutis la personan kontribuon de la Ĝenerala Sekretario de la Komunista Partio de Sovetunio, Leonid Breĵnev, al la sukceso de la konferenco.
Ankaŭ la realistaj registarestroj kaj estroj de politikaj fortoj en vico de aliaj landoj – tio koncernas kaj la neŭtralajn ŝtatojn kaj la membroŝtatojn de NATO – kontribuis al la atingo de la finaj interkonsentoj.
De granda signifo estis la senlaca laboro de la Monda Packonsilantaro kaj de la naciaj pacmovadoj en ĉiuj eŭropaj landoj. Ili kaj aliaj amasorganizaĵoj, reprezentantaj la publikecon, kontribuis sukcese al tio krei la necesajn antaŭkondiĉojn por tiu ĉi konferenco.
Prave oni konstatis, ke ĉiuj partoprenantoj surbaze de la sukcesa finiĝo de la konferenco povus pretendi pri atingo de signifaj venkoj. Laŭdire ĉiu ŝtato gajnis ĉe tio.
Tio kompreneble estas vero. Kaj tamen la pacaj fortoj de la mondo ne povas pretervidi, ke Helsinki alportis venkon por la paco kaj per tio kaŭzis longdaŭran malvenkon al la adeptoj de la malvarma milito kaj ĉiuj malamikoj de malstreĉiĝo.
Dum la pintnivela renkontiĝo de Helsinki la Monda Packonsilantaro plurfoje povis substreki la urĝan neceson, ke la pacmovado devas ankoraŭ pli energie ol iam ajn agadi por certigi la realigon de la principoj kaj konvencioj, devigaj per la subskriboj sub la Fina Akto.
Ni avertis: Estu singardemaj! La malamikoj de malstreĉiĝo suferis longdaŭran malvenkon, sed ili ne akceptos ĝin pasive.

Avertante ni atentigis, ke la fortoj de la imperiismo kaj milito, kiuj jam furiozas pro siaj malvenkoj en Hindoĉinio, Afriko kaj Latinameriko, furiozos ankoraŭ pli post la impresa venko de la pacaj fortoj en Helsinki.

Kaj tamen Helsinki malfermas samtempe novajn perspektivojn por la pluevoluado de tiu ĉi nova spirito de kunlaboro kaj de komunaj klopodoj por sekureco kaj ankaŭ por ĝia disvastigo al aliaj kontinentoj. Helsinki vekis novajn esperojn je sukceso de la klopodoj de la aziaj popoloj starigi sur sia kontinento sistemon de kolektiva sekureco. Helsinki estas kuraĝiga signo por la afrikaj popoloj unuigi sin en siaj fervoraj klopodoj kaj en sia komuna batalo.

Helsinki estas same armilo, kiun povas uzi la kontraŭimperiismaj fortoj en Latinameriko.

Nova optimismo kaj nova konfido trapenetras la vicojn de la batalantoj en ĉiuj evoluantaj landoj, kiuj kondukas sian duan sendependecmiliton, la militon por ekonomia sendependeco, kontraŭ novkoloniismo.

Kiel neniu alia okazintaĵo substrekis la Konferenco de Helsinki antaŭ ĉio la decidan rolon, kiun ludas la publiko – la simpla virino kaj la simpla viro – en ĉiuj bataloj por paco kaj sendependeco, demokratio, justeco kaj socia progreso.

Helsinki certigis, kion la Monda Packonsilantaro plurfoje akcentis: La registaroj solaj ne povas konduki la mondon al paco kaj feliĉo, sed la popoloj havas la potencon garantii komune kun la pacamaj registaroj, ke la homaro atingas progresojn en sia strebado al paco kaj ke la malstreĉiĝo fariĝas nereturnebla proceso.

La avertoj de la Monda Packonsilantaro montriĝis pli ol pravigitaj. En blinda furiozo la imperiismo batis ĉirkaŭ si, entreprenante novajn manovrojn kaj konspirojn por returni la radon de la historio. La internacia imperiisma konspiro kontraŭ la demokratiaj fortoj en Portugalio atingis novan kulminon de insideco, kiam certaj membroŝtatoj de NATO kaj EEK komencis ekonomie bojkoti Portugalion, dum kolektiĝis la reakciaj fortoj kaj malkaŝe faŝistaj grupiĝoj kaj ekkaptis la insidajn planojn de CIA por fendi MFA kaj disbati la unuecon inter la militfortoj kaj la popolo.

Per la puĉo en Bangladeŝo, aranĝita de CIA, nia mondo perdis unu el siaj plej bonaj filoj, prezidanton Mujibur Rahman. La celo de la puĉo estas rekonduki la tutan, 75 milionojn da homoj nombrantan popolon de Bangladeŝo en la imperiisman influsferon, el kiu ĝi malligiĝis nur antaŭ tri jaroj kaj duono.

La imperiismo plifortigis siajn intrigojn, direktatajn kontraŭ la sendependeco kaj suvereneco de Hindio. Per rapida kaj energia agado kontraŭ la reakcia kaj novfaŝista kliko, subtenata de la imperiismo, la lando savis sin feliĉe antaŭ tio, suferi la saman sorton kiel Bangladeŝo.

En la rezulto de usonaj planoj, sub la preteksto de „packlopodoj" akiri la potencon en Proksima Oriento, estas lokigotaj la unuan fojon en tiu ĉi regiono soldatoj de Usono, kvankam en civilo.

Serio de novaj dekstre tendencaj puĉoj estis planita por Latinameriko. En Peruo, la gastlando por konferenco de ministroj por eksteraj aferoj de nealianciĝintaj ŝtatoj, okazis tiamaniere grava puŝo dekstren. Tiu ĉi puĉo, kiu okazis ĝuste dum la konferenco de nealianciĝintaj ŝtatoj, estu klara averto por ĉiu nealianciĝinta ŝtato. La provo realigi similan puĉon en Ekvadoro, fiaskis.

En Afriko la imperiismo kaj ĉefe la sudafrika rasista reĝimo startis novajn manovrojn kontraŭ la progresoj de la liberigaj movadoj. Sudafrikaj trupoj enmarŝis en Angolon, kaj samtempe solduloj ekatakas la verajn liberigajn fortojn, gvidatajn de MPLA.

Skismaj fortoj estas subtenataj en sia strebado fendi la Afrikan Nacian Konsilantaron en Zimbabve.

Tiuj kaj aliaj kampanjoj fare de la adeptoj de malvarma milito estas ĝuste taksataj kiel sekvo de malespero kaj furiozado de la imperiistoj pro ĉiuj iliaj malvenkoj, kies kulmino estis la pintnivela renkontiĝo en Helsinki.

Ne ekzistas kaŭzo por pesimismo. La pacfortoj fariĝis pli fortaj kaj la fortoj de la imperiismo plimalfortiĝis. La ŝanĝitaj proporcioj de fortoj kreas la bazon por tio, ke la homaro povu esti fidema kaj optimisma.

Sed same ekzistas neniu kaŭzo por memkontenteco. Gardemo fariĝis vivnecesa, ĉar CIA kaj la faŝistaj kaj reakciaj fortoj plifortigas siajn aktivecojn, ĉefe en tiuj landoj, kies registaroj rifuzas obei la ordonojn de la imperiismo.

Ĉefministrino sinjorino Indira Gandhi, kiu la 15-an de aŭgusto okaze de la jartago de la sendependeco parolis al la hinda popolo, ripetis en sia parolado la faman alvokon, kiun direktis ŝia patro, ĉefministro Javaharlal Nehru dum alia por Hindujo kritika momento al la hinda popolo:

„La libereco estas en danĝero. Defendu ĝin per ĉiuj fortoj!"

La plej grava tasko de la popoloj en la mondo estas igi la proceson de malstreĉiĝo nereturnebla.

La Monda Packonsilantaro alvokis estigi novan Stockholman movadon – movadon, kiu finu la vetarmadon.

Ĉiuj pacfortoj prave opinias, ke estas necese enkonduki malstreĉiĝon en militan sferon, por ke la politika malstreĉiĝo fariĝu nereturnebla.

Sed oni devas akcenti, ke la politika malstreĉiĝo estas endanĝerigata, ĝis kiam la vetarmado daŭras kaj plirapidiĝas, kiel nuntempe okazas.

Se ni substrekas la neceson **kompletigi** la politikan malstreĉiĝon per milita malstreĉiĝo, ni ne volas per tio veki la impreson, ke la politika malstreĉiĝo mem estas nun sekurigita kaj ne endanĝerigita kaj dum ĉiu tago, kiu pasas, povas nur plifortiĝi. Tio tute ne okazas. La adeptoj de la malvarma milito faras en tiu tempo ĉion, kio estas en iliaj fortoj por plimalfortigi kaj nuligi la politikan malstreĉiĝon mem.

La batalo pri malstreĉiĝo staras tial je la unua loko en la tagordo de la pacfortoj de la mondo, de la registaroj kaj de la popoloj.

En la Stockholma alvoko de 1975 oni prave konstatas, ke la fino de la vetarmado estas la ŝlosilo por tio, igi la malstreĉiĝon nereturnebla, estigi novan internacian ekonomian sistemon, defendi la pacon kaj konstrui novan mondon.

Samtempe la malstreĉiĝo ne povas fariĝi nereturnebla proceso, se ne plifortiĝos la lukto pri ekonomia sendependeco en la plimulto de la landoj de la mondo – ilia dua milito por sendependeco – kaj se ĝi ne ricevos la nelimigitan subtenon de la unuiĝintaj kontraŭimperiismaj fortoj de la mondo.

Evoluo estas esenca antaŭkondiĉo por la paco. Evoluo estas necesa por garantii, ke la malstreĉiĝo fariĝos nereturnebla proceso.

La vivnecesa interrilato inter malstreĉiĝo, senarmiĝo kaj evoluo devas esti ĉiutempe akcentata.

Tial koncentriĝas la streĉoj de la pacfortoj en tiu ĉi horo al tio, daŭrigi la grandajn akirajojn de la pintnivela konferenco en Helsinki. La Monda Packonsilantaro substrekas en sia agadprogramo por la estonta tempo, ke la jaro 1976 estos jaro de agado, kiu havas antaŭ ĉio jenajn ĉefajn taskojn:

– Fino de vetarmado rezulte de amasmovadoj, en kiuj povas partopreni milionoj da virinoj kaj viroj, aliĝantaj al la nova Stockholma alvoko;

– Ampleksa preparo de la Monda Konferenco por Evoluado, postulata de la Monda Packonsilantaro, per intensivigo de la dua milito por sendependeco en ĉiu unuopa evoluanta lando;

– Aktivecoj por garantii pacon kaj sekurecon en Azio kaj agadoj por krei sistemon de kolektiva sekureco sur tiu ĉi kontinento.

Helsinki donis novan materian enhavon al la malstreĉiĝo. Helsinki donas ankaŭ novan forton kaj potencon al la monda pacmovado por la grandaj kaj honoraj taskoj de hodiaŭ kaj morgaŭ.

(El „neue perspektiven", revuo de la Tutmonda Packonsilantaro, vol. 5, 3/1975)

Trad. D. Berndt

K. Kalocsay

Ezopa fablo

La ĉeval' kaj bovo ie
Ekdisputis energie
Pri l'merito en milito.
Diris la ĉeval' incite:
– „He! malsprite estas dubi
Nian gloron kaj valoron.
La ĉevalo al batalo
Kuri ĉiam estas preta
Je trumpetaj sonoj.
Ion helpis ankaŭ spronoj.
Kaj la ŝarĝon de l'kanonoj
Tra abruptaj ŝtonoj,
Kiuj trenis? Nur ni!"
La ĉevalo henis.
Bov' respondis dum remaĉo:
– „Ĉevalaĉo! vi ja vane fanfaronas,
Ĉar ni donas tamen
La plej grandan servon.
Ja al si la cerbon
La marŝalo vane rompas,
Vane pompas la kuraĝo,
Se l'furaĝo mankas.
Kaj al kiu dankas
La viandon la soldat' malsata?
Al la bovo malŝatata!
Via gloro sole ŝajnas.
Ĉiun venkon bovo gajnas."
Paŝtis sin melankolie
Ankaŭ la azeno tie.
Li malplaĉe aŭdis,
Ke sin ili laŭdis
Ĝi hiais kaj balais
La aeron per oreloj
Kaj ekkriis:
– „Bagateloj! Jen la vero:
Sur la tero se azenoj
Ne amasus, la milit'
Eĉ ne okazus!"

Fino al la vetarmado! Alvoko de Stockholm 1975

La venkoj, atingitaj en la sfero de paco kaj malstreĉiĝo, venigis novan internacian klimaton, novajn esperojn, novajn fidon kaj optimismon inter la popoloj.
La paco *povas* esti defendata. Mondo de paco *povas* esti konstruata.
La unueco de la pacfortoj kapablas venki la obstaklojn, kiuj ankoraŭ baras la vojon en novan mondon, el kiu por ĉiam estas forigataj agreso, ekspluatado kaj subpremado, malsato kaj malriĉeco.
La vetarmado estas la decida obstaklo, kiu malhelpas la klopodojn por fari la malstreĉiĝon nereturnebla.
La vetarmado ankoraŭ ĉiam minacas nian planedon per nuklea detruo. Kaŭze de la malstreĉiĝo tiu ĉi danĝero iom post iom estas repuŝata, sed la vetarmado endanĝerigas la daŭradon de la malstreĉiĝo.
En multaj landoj de la mondo, kiuj ĉiam troviĝas vidalvide kun plialtiĝantaj vivtenaj kostoj, inflacio kaj ekonomiaj krizoj, la vetarmado ege pezas sur la vastaj popolamasoj. Ĝi forrabas de la popoloj grandan parton de iliaj riĉaĵoj kaj rimedfontoj.
La malstreĉiĝo ebligis novajn venkojn en la batalo pri nova internacia ekonomia ordo kaj pri la rajtoj de la popoloj disponi pri la riĉaĵoj de sia propra grundo. Ĝi estas armilo en la batalo pri finigo de la disrabado per la monopoloj kaj multnaciaj kompanioj.
La vetarmado kaj la amasigado de armiloj en la manoj de la imperiistoj kuraĝigas kaj fervorigas la agresemajn, militarismajn, koloniismajn, rasismajn fortojn. La malstreĉiĝo estas grava faktoro por plifortigi la klopodojn pri nacia sendependeco, justeco kaj socia progreso en ĉiuj landoj.
La malstreĉiĝo kreas novajn eblecojn por solvi la hodiaŭ plej akutajn problemojn kaj por forigi la fokusojn de streĉiteco kaj konfliktoj. La ĉesigo de la vetarmado ebenigus la vojon al la granda celo de la homaro: malpermeso de ĉiuj nukleaj kaj aliaj amasneniigaj bataliloj, ĝenerala kaj plena senarmiĝo – mondo sen armiloj.
La monda publiko havas pli grandan respondecon kaj pli grandan potencon ol iam ajn antaŭe. Ĝi estas kapabla repuŝi pli kaj pli la militprofitulojn, la adeptojn de la malvarma milito, la malamikojn de la homaro.
La Monda Packonsilantaro alvokas ĉiujn registarojn kaj parlamentojn, ĉiujn pac- kaj aliajn movadojn, politikajn partiojn, sindikatojn, virinajn kaj junularajn organizaĵojn, religiajn, sociajn kaj kulturajn rondojn, kiuj penas pri progreso de la homaro, al si doni reciproke la manon por nova, granda, mondvasta ofensivo kontraŭ la vetarmado.
Fino al la vetarmado – por ke la malstreĉiĝo fariĝu nereturnebla!
Fino al la vetarmado – por ke nova internacia ekonomia ordo efektiviĝu!
Fino al la vetarmado – por ke estu defendata la paco kaj konstruata nova mondo!
Batalu komune por malpermeso de ĉiuj nukleaj armiloj kaj aliaj amasneniigaj bataliloj!
Batalu komune por ĝenerala kaj plena senarmiĝo!
Batalu komune por baldaŭa kunvoko de mondkonferenco de UN pri senarmiĝo!

Monda Packonsilantaro
– Prezidantara kunsido –
Stockholm, la 2-an de junio 1975

Trad. D. Berndt

Philip Noel-Baker

Senarmiĝo-urĝa tasko!



Foto: Zentralbild

Ĉiu prudente pensanta homo sin devas okupi hodiaŭ ĉiam denove pri la bomboproblemo.
Ĉu la grandegaj provizoj de nukleaj armiloj en Usono kaj Sovetunio kaj la pli malgrandaj provizejoj en aliaj landoj vere estas, kiel diras multaj fakuloj, danĝero por la plua ekzistado de la homaro? Ĉu vere ekzistas la danĝero, ke ili estos ekuzataj?
Kaj se oni ekuzus ilin, ĉu la katastrofo estus tiom detrua, kiel oni asertas?
La ĵurnalistoj ofte provas trankviligi niajn timojn. Mi kolektis ĉi tie kelkajn, unu de la aliaj sendependajn pruvojn, kiuj konvinkis min, ke la danĝero esta ege granda kaj la mondvasta senarmiĝo de ekstrema urĝeco.

Diversa pruvmaterialo pri bomboj

Antaŭ nelonge amiko rakontis al mi, kio okazis al li antaŭ kelkaj jaroj en Italujo. Li sidis sur la balkono de sia hotelĉambro kaj matenmanĝis. Li estis sola, legis la matengazeton aŭ rigardis la belegan bildon, kiu prezentiĝis al li – la golfo de Napoli en la somera matensuno. Subite li ekaŭdis de sur la balkono sub si konversacion, kiun li senpene povis sekvi.
Du junaj oficiroj, anoj de iu okcidenta aerfloto, interparolis pri tiu tago, kiam ili ricevus la ordonon ĵeti siajn atombombojn sur malamikajn celobjektojn, pri la danĝeroj, kiuj povus ekesti por ili de malamika flanko, pri la celobjekto aŭ celobjektoj, kiujn ili atakus, kaj pri la grandioza kaj timige-emocia detruo, kiun ili kaŭzus. En la pensoj de tiuj du junaj viroj ne ekzistis dubo pri tio, ke tiu tago venus; por ili ne ekzistis „ĉu", sed nur „kiam".
Estas miloj da junaj oficiroj en la armeoj de la mondo, kiuj apartenas al taĉmentoj de militŝipoj kaj submarboatoj kun porraketaj depafekipaĵoj kaj de bombaviadiloj aŭ kiuj servas kiel komandantoj de kampartilerio, kiu elpafas atomajn pafaĵojn – miloj da junaj viroj kun la sama edukado, kun la sama fakinstruo kiel tiuj du en Napoli. Ekzistas miloj da aliaj, kiuj estas same konvinkitaj, ke tiu tago venos, kiuj same kiel ili estas decidemaj obei siajn ordonojn kaj kiuj ĉe tiu penso sentas tiklan emocion.
Dum la solenaĵoj okaze de la 100-a fondiĝtago de la Instituto por Tekniko, de la mondfama MIT en Massachusetts, en marto 1961 mi paroladis de sur la sama podio kiel Dr-o Herman Kahn. Kahn raportis al siaj aŭskultantoj, ke la generalstaboj ellaboras planojn pri venonta milito, dum kiu pereus almenaŭ 200 milionoj da homoj. Estas tute normale, tiel diris Herman Kahn, kalkuli kun tia nombro da viktimoj, ĉar en la unua mondmilito estis 10 milionoj da mortintoj, en la dua mondmilito 53 milionoj, kaj sekve al la generalstaboj kaj iliaj popoloj ŝajnus nature, ke en tria mondmilito oni registrus denove la kvinoblan nombron da viktimoj.
Kahn tiam estis konata „komentisto de militaferoj". Troviĝis neniu ano de iu generalstabo, kiu kontraŭdiris al liaj kategoriaj deklaroj.
Jes, ankoraŭ pli, la usona generalstabo komisiis al la Hudson-instituto, gvidata de Kahn, diversspecajn strategiajn esplorojn, kiuj kostis multajn milionojn.
Antaŭ du jaroj rakontis al mi iu eŭropa politikisto, civitano de malgranda NATO-lando, sekvan epizodon: Antaŭ dek jaroj li estis tre bone konata kun armekolonelo de sia lando kaj havis ĉiun kaŭzon rigardi la kolonelon kiel viron de eksterordinara homeco kaj altanima prudento. Dum rea renkontiĝo kun la kolonelo en la jaro 1973 li eksciis, ke li avancis al ege alta rango. Post negrava konversacio rimarkigis mia amiko: „Kiel oni diras, sinjoro generalo, la stabo de NATO supozas, ke dum la unua tago de la venonta milito estos mortigotaj 100 milionoj da homoj." „100 milionoj", respondis la generalo, „ridinde, maksimume 40 milionoj".

Kontrakto pri malpermeso de nukleaj armiloj

Fine de la sesdekaj jaroj la tiel nomataj „nuklearmilaj potencoj" helpis efektivigi per interkonsentoj la Kontrakton pri malpermeso de nukleaj armiloj, kiu estas konata al la anglan lingvon parolantaj ĵurnalistoj kaj diplomatoj sub la mallongigo NPT.
Ĝi enhavas la artikolon 6, per kiu la nuklearmilaj potencoj sindevigas agi kiel eble plej baldaŭ por la plena atoma senarmiĝo. La ĉefa celo de tiu ĉi kontrakto estis malebligi la disvastigon de nukleaj armiloj per la 5 potencoj (Usono, Sovetunio, Grandbritio, Francio kaj Ĉinio), kiuj posedis tiujn armilojn, inter la multajn ŝtatojn, kiuj ne posedis ilin. La kontrakto ekvalidiĝis en 1970 kaj estis varme salutata de la ĉefministroj kiel granda paŝo al senarmiĝo. En decembro 1974, ses monatojn antaŭ la okazonta konferenco por kontrolo de plenumo de la kontrakto, la brita „Internacia Instituto por Strategiaj Esploroj" (IISS) publikigis du ampleksajn broŝurojn kun la titolo „Atomaj militfortoj por mezgrandaj potencoj".
En tiuj ĉi broŝuroj oni pritraktis, kiun specon de atomaj militfortoj bezonus ekzemple Hindio kaj Japanio, kiel tiuj militfortoj povus esti lokotaj kaj ekuzotaj. Ekzistas proksimume dudek aliaj „mezgrandaj" ŝtatoj, kiuj same facile kiel Hindio kaj Japanio povus produkti nukleajn armilojn. En la broŝuroj oni eĉ ne mencias la kontrakton pri malpermeso de nukleaj armiloj respektive la konferencon por kontrolo de ĝia plenumo en majo 1975.
Estas malfacile kredi, ke IISS publikigis tiujn broŝurojn sen scio kaj konsento de la brita ministerio por defendado. Ŝajnas nur tro probable, ke la ministerio kaj Pentagono interkonsentiĝis silente meti flanken la kontrakton pri malpermeso de nukleaj armiloj kaj ke ili – eble konsidere al estonta eksporto de nukleaj armiloj – pretas subteni ĝeneralan disvastigadon de tiuj armiloj en la tuta mondo. Sendube tiuj broŝuroj povus servi nur al tiu celo.
Tiuj unuopaj pruvoj kaj ankoraŭ multaj aliaj, kiujn mi pro manko de spaco ĉi tie ne povas trakti, vekis en mi la konvinkon, ke la registaroj kun la plej grandaj arsenaloj kontentiĝas per tio, lasi sin peli pluen de la nuntempa vetarmado ĝis nedeterminita momento, eĉ se tio kondukus al ĝenerala disvastigo de nukleaj armiloj tra la tuta mondo, kaj ke ili konsentas, se iliaj popoloj opinias estontan nuklearmilan militon verŝajna okazontaĵo, kiun oni devas vole-nevole akcepti.

Minaco de Kissinger

Mi opinias tion en la plej alta grado alarma. Nuklearmila milito signifus neimageblan katastrofon por la homaro.

La ebla eksplodo de tia milito plifortiĝas kaŭze de tiaj okazintaĵoj kiel la „alarmo" por la usonaj militfortoj inkluzive de la nukleaj militfortoj, proklamita de D-ro Kissinger dum la araba-izraelia milito en 1963 kaj lia antaŭ nelonge proklamita minaco, ke Usono ekuzos armilan perforton kontraŭ la naftoproduktantaj landoj.
Eĉ ne unu momenton mi kredas, ke D-ro Kissinger en la jaro 1973 konsideris uzi perforton aŭ havas konkretan planon fari tion nun aŭ en baldaŭa estonteco. La danĝero ekzistas en tio, ke iu fanatikulo aŭ iu, kiu estas obsedita de la Mesia iluzio povi „meti finon al la komunismo" aŭ „al la kapitalismo", rigardus tiajn rimarkojn, kiel tiujn de D-ro Kissinger, kiel supozatan pravigon por elpafo de atompafaĵo. Kaj se nur unufoje iu nuklea armilo estos uzita, neniu povas diri, kiun kontraŭfrenezecon ĝi elvokos.
Tiu ĉi danĝero kreskas ĉiutage kaj kreskos tiel longe, kiel longe ekzistos provizoj de nukleaj armiloj. Ĝenerala kaj radikala senarmiĝo en la tuta mondo fariĝas tial afero de pli granda urĝeco ol kiam ajn antaŭe.

Malsato furiozos

Ekzistas ankoraŭ plia kaŭzo, kiu urĝigas la aferon de mondvasta senarmiĝo. La loĝantaro de la mondo kreskas pli rapide ol la produktado de nutraĵoj. Ekzistas landoj, kie naturkatastrofoj kiel inundoj, periodoj de sekeco aŭ apero de akridoj povas kaŭzi malsatmizeron por grandaj partoj de la loĝantaro. Centmiloj da homoj mortis en la jaro 1974 pro malsato en Etiopio, Okcidentafriko kaj Bangladeŝo. Kaj la mortado pludaŭras. La perspektivoj por la venontaj 12 monatoj en marto 1975 estas pli malbonaj ol estis la indikoj. La spertoj montris, ke la registaroj – dum la vetarmado daŭras – rifuzas havigi la necesan monon por ekonomia helpo aŭ por kreado de monda nutraĵfonduso. Ili simple asertas – tute tiamaniere kvazaŭ nura aserto konvinkus – ke ili *devas* anstataŭ tio utiligi siajn rimedojn por la „nacia defendado".
Estas terura penso, ke viroj, virinoj kaj infanoj devas suferi la longdaŭran turmenton de morto pro malsato, nur ĉar iliaj kunvivantoj, kiuj al ili povus kaj devus helpi, elspezas grandegajn sumojn por militpreparado. Sed ĝuste tio okazas nuntempe kaj mokas al tiuj kondutnormoj de individuoj kaj registaroj, al kiuj sin konfesas hodiaŭ ĉiuj civilizitaj popoloj.

La spirita infekto de la homoj

Pli danĝera ol ĉiu fizika aŭ materia rezulto estas la infektado, kiu okazas en la pensado kaj moralo de la registaroj kaj publiko de post 1945. La pereigaj eraroj de la militarismo kaj potencpolitiko disvastiĝis dum tri jardekoj inter la popoloj kiel rapide kreskanta kancerulcero. La principoj, validaj por la strategia planado kaj evoluado de armiloj, estas pli barbaraj ol ĉio, kion Adolf Hitler aŭ lia sadista stabo elpensis.
La senvalorigo de la moralaj normoj de la internacia ŝtataro fariĝis dum la lastaj tridek jaroj ĉiam pli alarma.
Estas timige, ke la granda plimulto de UN-membroj en la jaro 1973 malakceptis la sovetian proponon pri dekprocenta malpliigo de la armea budĝeto. Ankoraŭ pli timigaj estis la argumentoj por pravigi la rifuzon.
Bezonata estas nun radikala, eĉ revolucia ŝanĝiĝo en la pensado, ŝanĝiĝo, kiu forpelos la nuntempan aprobon de la potencregado kaj anstataŭigos ĝin per regado de justeco kaj leĝo en la internaciaj aferoj.

La rolo de neŝtataj organizaĵoj

Tio ne estos facile. Sed mi kredas, ke tio estas atingebla, se ĉiuj, kiuj deziras daŭran pacon kaj mondvastan senarmiĝon, estos pretaj batali komune por la plej alta celo kaj ĝis ĝia fina atingo forgesi la diversecon de opinioj, kiuj nuntempe fendas ilin aŭ rezulte de kiuj ili estis fenditaj en pasinteco.
Agante komune, la neŝtataj organizaĵoj posedas egan forton. Mi esperas, ke ili havigos ampleksajn rimedojn kaj milionojn da libervoluloj por starigi mondvastan informkampanjon.
Mi salutus, se la neŝtataj organizaĵoj aliĝus al la „Alvoko por organizi Mondan Konferencon pri senarmiĝo", proklamita de Sean Mac Bride kaj de la Internacia Pacoficejo dum kunsido en la universitato Bradford, Anglujo, en aŭgusto 1974.
Por prepari la mondan publikon al tiu ĉi konferenco pri senarmiĝo, en ĉiu lando devus esti organizata kampanjo, kiu sin apogas sur kelkajn tiel klarajn kaj facilajn, sed fundamentajn proponojn kiel la sekvantajn:

1) Ĉar scienco kaj tekniko detruis la limojn de tempo kaj spaco, la popoloj de ĉiuj kontinentoj vivas en internacia ŝtataro.

2) La vivinteresoj de la popoloj ne kontraŭas sin reciproke; estas komunaj interesoj por ĉiuj el ili: daŭra paco, bona vivo, sano, feliĉo kaj bonstato por ĉiuj civitanoj.

3) En la epoko de atom- kaj hidrogenbomboj la mondvasta senarmiĝo sub internacia kontrolo estas la unusola realisma formo de la nacia defendado.

4) Mondvasta senarmiĝo signifas pli grandan nombron da laborlokoj kun pli altaj salajroj kaj pli altan vivnivelon por ĉiuj nacioj, grandaj aŭ malgrandaj.

5) Dum la vetarmado ne ĉesos kaj la monsumoj disponataj por militpreparado ne estos elspezataj por plibonigo de la ekonomio, en multaj landoj furiozos malsato.

6) Tiel longe, kiel la scienco restos la publikulino de la milito, pligrandiĝos la danĝero, eliranta de la amasneniigaj armiloj, de jaro al jaro.

7) La amasneniigaj armiloj devas esti forigotaj helpe de mondkonferenco pri senarmiĝo. La sama validas por kelkaj armiloj, nomataj „kutimaj". La spertoj de modernaj militoj montris, ke kelkaj armilspecoj servas al nacia defendado kontraŭ agreso, ekzemple pafiloj, mitraloj, malpeza kampartilerio. Aliaj armiloj, ekzemple tankoj, militaj aviadiloj, submarŝipoj kaj aviadilaj ŝipoj estas „ofensivaj armiloj"; ili helpas al agresanto venki la nacian defendadon de lia viktimo. La likvidado de „ofensivaj armiloj" pligrandigas la sekurecon de ĉiuj popoloj, kaj la paco estos pli stabila. Tio estas unu el la antaŭrangaj celoj de kontrakto pri senarmiĝo.

La neceso de informkampanjo

Se ĉiuj gazetoj kaj ĵurnaloj de ĉiuj neŝtataj organizaĵoj kunlaborus laŭ komuna plano, ili povus informi la publikon de ĉiu lando pri la enhavo de tiuj ĉi proponoj. Tio signifus, ke ĉiu gazeto publikigu analoge komentitan artikolon, kiu klarigos la nepran pravecon de ĉiu propono kaj ke poste, ĉiusemajne kaj ĉiumonate, estos represata la ĉefa propono, ĝis ĝi enpenetros en la konsciencon kaj subkonsciencon de ĉiu unuopulo. Tiuj, kiuj volas elvoki ŝanĝon de opinioj, ne forgesu la malnovajn komercistajn vortojn „reklamo valoras la penon" kaj varbu per senĉesa ripetado por la fundamenta vero, por kiu ili volas gajni la homojn. Por ĉio tio estas bezonataj prudento, diligenteco, milionoj da helpemaj libervoluloj kaj multe da mono. Ĉu eĉ nur unu el tio manku, se temas pri pluekzistado de la homaro?

(El „neue perspektiven" 2/75)

Trad. D. Berndt

■

MEM partoprenis la Mondkongreson en la Internacia Jaro de Virino

Laŭ la propono de la Internacia Demokratia Virina Federacio (IDFF), kies sidejo troviĝas en Berlin (GDR), kaj subtenita de pliaj organizajoj el 130 landoj, la Unuiĝintaj Nacioj proklamis la jaron 1975 Internacia Jaro de la Virino. Se en Meksiko okazis la Internacia Kongreso de la Virino ĉefe sur registara ebeno kaj estis rekte organizita de UN, la Mondkongreso en la Internacia Jaro de la Virino, okazinta de 20a ĝis 24a de oktobro 1975 en Berlin (GDR), estis kongreso de la publika opinio, la ĝis nun plej reprezenta internacia forumo, kiu okazis en la historio de la virina movado. La laboron de tiu kongreso partoprenis preskaŭ 2000 delegitoj, observantoj kaj gastoj el 141 landoj. 707 ĵurnalistoj el 45 landoj, 12 televidaj stacioj kaj multaj radiostacioj raportis.

La kongreso laboris sub la slogano „Samrajteco, evoluo, paco". En la solena inaŭguro la prezidantino de la Internacia Prepara Komitato, Freda Brown (Aŭstralio), malfermis la kongreson. Multe atentataj estis la paroladoj de Erich Honecker, Unua Sekretario de CK de Socialisma Unuiĝinta Partio de Germanio, de Helvi Sipilö kiel ĝenerala sekretariino de la Internacia Jaro de la Virino, kiu ankaŭ voĉlegis salutmesaĝon de la Ĝenerala sekretario de UN, d-ro Kurt Waldheim. Pluaj 900 salutmesaĝoj atingis la kongreson, i.a. de L. Breĵnev, Indira Gandhi, Fidel Castro, arkiepiskopo Makarios, Simiravo Bandaranaike, k.a. La ferman plenkunsidon ankaŭ partoprenis Romesh Chandra, ĝenerala sekretario de la Tutmonda Packonsilantaro. Dum tri labortagoj la kongreso laboris en du plenkunsidoj kaj en 9 diversaj komisionoj. La komisionoj okupiĝis pri samrajteco de la virino en leĝo kaj realo (1a komisiono), virino kaj laboro en industrio kaj agrikulturo (2a kom.), virino kaj ŝia kontribuo al la socia, politika, ekonomia kaj sociala progreso (3a kom.), familio kaj socio (4a kom.), klerigo de la virino kaj batalo kontraŭ analfabetismo (5a kom.), la virino en batalo por paco, internacia sekureco, malstreĉiĝo, malarmado kaj por gardo de la homa medio (6a kom.), la virino en la batalo por nacia sendependeco (7a kom.), la influo de la amaskomunikiloj, de literaturo kaj arto je la publika opinio pri la virino (8a kom.), kunlaboro kaj komunaj agadoj de la virinoj de la mondo en ŝtataj kaj neŝtataj organizoj kaj en UN (9a kom.).

En la komisionoj kaj plenkunsidoj, en kiuj virinoj kun plej diversaj politikaj kaj ideologiaj konceptoj partoprenis la diskuton oni ofte alvokis al solidareco

- kun la vjetnama popolo rekonstruadanta sian detruitan patrolandon,
- kun la ĉilia popolo en sia batalo kontraŭ la faŝisma junto,
- kun la arabaj popoloj,
- kun la popoloj batalantaj kontraŭ koloniismo, novkoloniismo, rasismo kaj rasdiskriminacio.

La raportoj substrekas, ke la virinoj de la mondo prezentas gigantan politikan potencon, se ili unuece agos. Ili povas grave kontribui al la realigo de la homara revo; konstrui mondon de la paco kaj de socia progreso.

La raportoj plue substrekas, ke necesas daŭrigi la agadon iniciatitan de UN. La kongresoj en Meksiko kaj Berlino ne estas finpunktoj sed ekiniciatoj por novaj aktivecoj. Estis akceptita „Apelo al la virinoj de la mondo".

La laboron de la kongreso ankaŭ partoprenis reprezentantoj de Mondpaca Esperantista Movado (MEM).

Estas simptomo por la kreskiĝanta internacia prestiĝo de MEM kaj ĝenerale de la Esperanto-movado, ke la reprezentantinoj tuj estis akceptitaj kun la statuso de delegitinoj (ankaŭ eblis gasto aŭ observanto). La delegitinoj estis

- Hella Sauerbrey, Berlin (GDR), membro de la Internacia Komitato de MEM,
- Ingrid Schödl, Potsdam (GDR), membro de la MEM-Komitato de GDR.

Krome dum la kongreso lerte aktivadis kiel tradukistino por la rusa lingvo la



Berlin: Mondkongreso dum la Internacia Jaro de Virino. La MEM-delegitino s-ino Hella Sauerbrey (kun teko) informas pri Esperanto kaj pri MEM. Maldekstre de ŝi la alia MEM-delegitino s-ino Ingrid Schödl.

esperantistino Rita Krips, prezidantino de la Junulara Komisiono de Centra Laborrondo Esperanto en Kulturligo de GDR. Hella Sauerbrey partoprenis en la laboro de la 5a komisiono kaj tie skizis la laboron de MEM, speciale akcentante la solidarecon de MEM kun Vjetnamio kaj la kunagadon inter MEM kaj la Tutmonda Packonsilantaro. Ŝi krome atentigis pri la ekzisto de lingva problemo, kiu grave malhelpas la kunagadon de la virinoj de la mondo por realigi iliajn noblajn celojn. Hella Sauerbrey akcentis la pretecon de MEM, subteni la internacian disvastigon de la rezultoj de la kongreso. En simila senco ankaŭ Ingrid Schödl parolis en la 9a komisiono. La du delegitinoj krome transdonis al la Kongresa Komitato mesaĝon de la prezidanto de MEM, Nikola Aleksiev, en la Esperanta originalo kun germana traduko. En la oficialaj kongresdokumentoj MEM estis korekte menciita.
Kvankam la kongreso estis bonege organizita kaj estis disponigita ampleksa tradukista aparato, la lingva problemo akre sentiĝis. En la plenkunsido oni tradukis en (resp. el) 21 lingvoj! La ĉiutagaj bultenoj aperis en la lingvoj: angla, franca, rusa, germana, hispana, araba, kaj ne ĉiam estis facile haveblaj en la dezirita lingvo, Tiuj 6 lingvoj ankaŭ funkciis en la 9 komisionoj.
Pro tiu por ĉiu internacia kongreso tipa situacio la agado de la MEM-delegitaro estis tre valora, ne nur por MEM sed entute por la internacia Esperanto-movado. En multaj individuaj interparoloj la delegitinoj klarigis la celojn de MEM kaj de la internacia Esperanto-movado kaj atentigis ankaŭ pri la agado de UEA lige al la Internacia Jaro de la Virino. Ili parolis kun virinoj el Japanio, Hindio, Vjetnamio kaj afrikaj ŝtatoj same kiel kun delegitinoj el eŭropaj landoj kaj aliaj eminentuloj. La reprezentanto de UN, s-ro Ferrera, bone rimarkis la esperantistinon en la 9a komisiono, titolinte ŝin „Miss Esperanto". Vjetnamino estis tre surprizita pri la fakto, ke la du MEM-delegitinoj tiel boninformite parolis pri vjetnama literaturo. Valoras mencii, ke pere de la traduko el Esperanto de vjetnama novelo (Geedzoj Fu) de Hella Sauerbrey estis produktita radia scenaĵo, kiu estis disaŭdigita. „Radio GDR" ne nur la 6. 11. 1974 emisiis la scenaĵon. Ĝi denove estis disaŭdigita okaze de la kongreso 1. 11. 1975, 16.05 per „Voĉo de GDR" (kp. „der esperantist" 69 (1/75) p. 9).
Ĉiukaze, la partopreno de internacia esperantista organizaĵo en tia grava kaj prestiĝa kongreso ne nur montris la progresemon de multaj esperantistoj sed ankaŭ ĝenerale utilis al la plialtigo de la prestiĝo de Esperanto.

D. Blanke

Tradukistoj dum la virina kongreso

En oktobro 1975 en Berlin (GDR) okazis granda internacia Kongreso en la Internacia Jaro de la Virino, kiun ankaŭ partoprenis delegitaro de MEM. El „Nachrichten für Sprachmittler", Berlin, 4/75 (Informoj por interpretistoj) ni ĉerpas jenajn informojn pri la situacio de la fremdlingva tradukado dum tiu-ĉi kongreso[1]).
Entute 175 simultanaj tradukistoj laboris dum la kunsidoj en pleno kaj komisionoj, zorgantaj por la interkomprenado de ĉirkaŭ 2000 delegitoj, observantoj kaj gastoj. La kongreso laboris ĉefe en 6 lingvoj. GDR mem de disponis pri sufiĉe da tradukistoj por ĉiuj tiuj 6 lingvoj (angla, rusa, franca, hispana, germana, araba) kaj tial devis helppeti tradukteknikon kaj 75 tradukistojn el kelkaj socialismaj landoj. Dum tagoj de plej altaj laborpostuloj samtempe aktivis 16 simultane interpretantaj tradukistaj grupoj (en kabinoj).
Dum la plenkunsidoj oni certigis la simultanan tradukadon en 21 lingvoj „en akcepteble bona kvalito". Oni legas en la raporto (p. 4):
„Pri la por kaj kontraŭ de tia multeco da lingvoj oni multe diskutis kaj diskutas inter la kolegoj, kaj certe tio ankoraŭ estos diskutmaterialo. Sed unu afero restas nekontestebla: La venko pri la „lingva barilo" eksterordinare plifaciligis kaj plibonigis la laborkondiĉojn por la ĉiurilate larĝa demokratia konsisto de la kongreso, por la multeco de la delegitaroj el landoj, naciaj kaj internaciaj organizaĵoj".

D. B.

[1]) Rolf Birkigt: Weltkongreß im Internationalen Jahr der Frau – Bewährungsprobe für Simultandolmetscher.

Mirdzo-Tursun Zade
La suno kaj virino

(fragmento)

Ĉio – de la suno: vintro kaj somero,
De hirundoj alflugantaj ĝoj'.
Laŭ orbito suna nia tero
Iras en la rondvojaĝa voj'.
Ĉio de la suno: la lili' ĉe bordo
Kaj kronita per brilado nordo,
Ĉielarko el pluver'.
Kvankam estas suno iam
senkompata, –
Ĉiam mi deziras, kiel nun:
– Estu vi eterna, hela sun'.
Kaj rimarkis jam delonge ni,
Ke similas al virino ĝi.
Ho, virin' karesas, nin amante,
Tamen, se en kor' forestas am',
Ŝi turmentas, nin pereigante,
Per la sune bruliganta flam'.
Jen per tuko, kiel per nubeto,
Honte kovras belon de vizaĝ',
Jen ŝi malicete, jen ŝi fierete
Jetas ridon kun spritaĵ'.
Jen ŝi vekas eron da espero,
Jen fridigas per glacio nin
Diras mi kun amo:
– Sur la Tero
estu ĉiam suna la Virin'.

Tradukis Andreo Rogov

Nasreddina logiko

Veniginte al la muelejo sakon da tritiko, Nasriddin Afandi disŝutis la tritikon en la sunplena loko de la korto, por ke ĝi sekiĝu. Apude sekiĝis aliula tritiko. Proksime neniu estis. Verŝajne ĉiuj foriris en la tetrinkejon. Nelonge meditante, Afandi komencis ŝuti la fremdan tritikon en sian sakon. Subite eniris en la korton la muelisto kaj indigniĝis pri la vidata faro. „Hej, Afandi, kion vi faras, kial vi ŝutas en vian sakon la fremdan tritikon?" „Ne atentu tion, lastatempe mi ofte havas paroksismojn de idiotismo". „Sed kial, pro idiotismo, vi ne ŝutas vian tritikon en la fremdan sakon?" „Nu, se mi tion farus, mi certe estus plenplena idioto!" respondis Afandi.

Trad. P. Polisĉuk

SOLIDARECO!




Foto: Zentralbild

Heinz Kahlau

Savu Luis Corvalan!

1. Via tago cedis plende
   Al la nokt' de Junta-Klan'.
   Murdita estis Allende;
   La faŝistoj kaptis fiende,
   Aĥ, Luis Corvalan

2. Kamaradojn li bongvidis
   En la „Unidad Popular".
   Al esper' Ĉilio fidis
   Kaj la novan vivon vidis
   En socialisma far'.

3. Kiel Thälmann li ne mortu!
   Staras li por la estont'.
   Lian vivon ni altportu,
   Vok' indigna nun laŭtfortu
   De l'solidara front'!

4. Kion „Junta" ajn pretendos, –
   Helpu ĉiu Ĉilian'!
   Sangan jugon ni disfendos,
   El murdista man' defendos
   Nian Luis Corvalan!

Trad. Ernst Wichert, Berlin

Leteroj kurieras la volon de paco

Meze de foliriĉaj arbaroj kaj malkrutaj deklivoj situas la okklasa lernejo de Ziemeri. Ĉiutage la oficistoj de la poŝto sortimentas leterojn sur kies kovertoj en la lingvo Esperanto estas skribita la adreso de ĉi tiu lernejo. Ofte la leteroj venas la longan vojon el Hanojo. Ili kurieras la volon de paco kaj forportas sciigojn pri la supreniro de nia vivo, pri la venko kaj supereco de la ideoj de socialismo. Ĉi tiu korespondado ebliĝas tial, ke la anoj de la lerneja internacia klubo „Fajrero" ekde la jaro 1965 ellernis la internacian lingvon Esperanto.
Kiam la popolo de la amikoj batalis kontraŭ la fremdlandaj invadintoj, la Ziemeri-anoj kelkfoje iris al kolektiva laboro, por helpi al infanoj de vjetnamio per rimedoj, akiritaj per la laboro. Dum multaj jaroj la pioniroj de la okklasa lernejo de Ziemeri sendis al la amikoj lernilojn, lernejajn pakaĵojn. La amikeco de la forpasintaj jaroj ne estis unuflanka. En la fondusoj de la lerneja internacia klubo oni povas hodiaŭ trovi multajn muziknotojn, sondiskojn, sonbendojn, la interesan 100-jaran kalendaron, diafilmojn. Oni povas trovi ĉi tie revuojn kaj librojn en la vjetnama lingvo, fotojn, kiuj rakontas pri la jaroj de batalo kaj novkonstruo en Sudorienta Azio. Aparte estas kolektitaj desegnaĵoj de vjetnamaj infanoj. Ĉi tiujn materialojn alsendis la Vjetnama Pacdefenda Esperantista Asocio el Hanojo kaj malgrandaj Vjetnamoj.
En la komenco de septembro, en la 30a datreveno de la proklamo de la Vjetnama Demokratia Respubliko la partoprenantoj de la solena pionira kunveno en la okklasa lernejo de Ziemeri subskribis gratulleterojn por la amikoj okaze de la festo de ilia popolo.

I. Aizupe
la ĉefa pionirgvidantino de la okklasa lernejo en Ziemeri

Traduko el ĵurnalo „Oktobra Standardo" („Oktobra Karogs", N-ro 114 (1316) de 25. IX. 1975.



Claus Weber: Solidareco

Ni ne forgesu!

Pro la longa severa milito, sur la duoninsulo Hindoĉinio, ĉefe en Vjetnamio, mortis aŭ vundiĝis eĉ 6 000 000 da homoj laŭ usona publikigo. El la 6 000 000, vundiĝis 3 600 000, mortis 2 400 000. Kaj el la mortintoj ĉirkaŭ duono estis senfortaj infanoj. Tie vjetnamoj mortis en la raporto de 1 al 35, dek-kvinono de ili vundiĝis, kaj sesono de ili perdis sian domon. Kaj la pezo de la bomboj kaj la kugloj uzitaj de usona armeo estas entute 15 300 000 tunoj. Por tiom ŝarĝi necesas 3 000 000 ŝarĝaŭtoj 5-tunaj. La kvanto estas ĉirkaŭ 3,5-obla de la uzitaj de la usona armeo dum la dua mondmilito. Aŭ sama al 764 atombomboj hiroŝimaj. La bombado restigis 26 000 000 kavojn. Por plenigi tiujn kavojn, necesas 2 600 000 000 kubaj metroj da tero. En Vjetnamio ne ekzistas tiom da tero. La kavoj, similaj al nesto de abelo, restos tiel dum iom da tempo aŭ en urboj, aŭ en vilaĝoj, aŭ en montoj . . . Sed, se estos plenigita la kavoj surteraj, neniam plenigeblas la kavoj en la koro de homoj.

(El „Danjo en Vjetnamio")

Tanta, urbo 100 km norde de Kairo.
Aplaŭdo por la artisto montrinta tradician baston-dancon.
Foto: Zentralbild



Rudi Graetz

Kutimoj kaj moroj

En arabaj landoj mi ofte estis deĵorante. Ĉiam denove altiraj por mi estis la kutimoj kaj moroj en tiuj landoj. Tial mi skribu iomete pri ili. Iutage mia araba amiko, la UEA-reprezentanto en Bagdad, Husen M. Al-Amili, invitis min viziti sian naskiĝurbon Naĵef kaj Babilon. Survoje al tiu urbo mi subite vidis personan aŭtomobilon, ankaŭ veturintan al Naĵef, sur kies tegmento troviĝis ĉerko. La enigmo baldaŭ solviĝis por mi, kiam ni alvenis en la urbon vidante grandegan ŝajne senfinan tombegejon. En Irako kutime la mortintoj el la tuta lando estas entombigataj sur grandega tombejo, kiu troviĝas ĉe la rando de la sankta urbo Naĵef.

Iutage en Kairo mi observis ĉe strata angulo funebrantajn virinojn. Iom pli poste alvenis funebra veturilo kun ĉerko, akompanata nur de viroj. Ĝi preterveturis la plorantajn virinojn, kiuj en tiu formo lastfoje adiaŭis de la mortinto. La viroj akompanis la ĉerkon al la urbo de la mortintoj, kiun mi nur vidis en Kairo. El malproksimeco kaj de supre de monto la tombejo aspektas kiel urboparto de Kairo. Alveturante al ĝi tiam estas videblaj la tomboj inter dommuroj. Tamen tre diversaj estas la formoj de la entombigo de la mortintoj en diversaj arabaj landoj. En Siria Araba Respubliko ekzemple ekzistas tombejoj, similaj al la niaj. Nur mankas tie la freŝaj verdaĵoj sur la tomboj, ĉar mankas akvo.

Tamen ni turnu nin nun al la vivantoj. En la parko de la hotelo en Kairo, kie mi loĝis, ĉiusemajne unufoje okazis dancposttagmezo por la gejunularo. Estis tre agrable por mi, vidi kiel ili dancis ritme kaj elegante laŭ la sama muziko, kiun ni konas ankaŭ de niaj dancejoj por junuloj, sen iuj muzikaj aŭ kantaj missonoj. Ankaŭ geedziĝfestoj okazis sur la sama areo. Dum la tuta festado la juna paro estis laŭvide la ĉefaj personoj, sidanta sur altaj orumitaj seĝoj.

Ofte mi aŭdis en Arabio ankaŭ pri la sankta monato „Ramadan". Sed neniam ĝis la jaro 1968 mi havis la okazon, ĉeesti en iu araba lando tiun monaton. En tiu jaro komenciĝis Ramadan fine de novembro kaj per ĝi ankaŭ la fastotempo, ĉar fastado kaj Ramadan apartenas kune. La fastado apartenas al la kvin fundamentaj devoj de praktika ekzerco de la religio – devo kiu por la fastotempo egaligu la malriĉulojn kaj la riĉulojn en la komunumo de la kredantoj.

Kairo estas grandurbo kun forte pulsanta trafiko. La ĉefstratoj de la ĉefurbo kaj la ĉefpontoj trans Nilo estas plenŝtopitaj per aŭtomobiloj, aŭtobusoj, ŝarĝaŭtoj kaj aliaj veturiloj, inter ili multaj biciklistoj. La stratoj kaj la kafejoj estas plenaj da homoj. Tio estas la ĉiutaga bildo. Sed ĝi ŝanĝiĝas dum la Ramadana tempo subite antaŭ la sunsubiro.

La fastado postulas absolutan abstinadon de sunleviĝo ĝis sunsubiro, tio signifas, neniu ion nek mangu nek trinku. Tiu strikta regulo kompreneble ne nur ŝanĝas la vivritmon de la unuopulo, sed ankaŭ de la tuta socio kaj de la ekonomio. Pro la konstanta minaco flanke de Israelio nur la soldatoj dum tiu jaro estis esceptitaj speciale de la fastado. Dum la Ramadan-tempo post tagmezo la pulsanta vivo videble lamiĝas. Mi utiligis la eblecon en la unuaj tagoj de Ramadano per mia ŝoforo veturi en la centron de la urbo antaŭ sunsubiro. Adiaŭante lin, mi vidis, ke la trafiko ŝveliĝis. Ĉiu rapidis hejmen, por esti en sia familio antaŭ la tondrado de la Iftar-kanonoj – la signo por la unua taga manĝo post la sunsubiro.

Post la sonegoj de la kanonoj kaj post kiam en radio finiĝis la „Allahu akbar" de la ŝejko milionoj da kreduloj scias, ke la penigoj de la fastado por tiu tago

finiĝis. La ĵus ankoraŭ plenŝtopitaj stratoj nun estas senhomaj. La plej multaj vendejoj estas fermitaj. En kelkaj malfermitaj mi vidis la vendistaron aŭ familion komune manĝi sidanta ĉirkaŭ tablo. Sed vespere la stratoj denove pleniĝas. La homoj trairas la bazaron, vizitas tendojn, kie popolkantistoj dum la tuta nokto prezentas siajn versojn. Ankaŭ mi vidis tendojn, kie antaŭpreĝanto legis versojn de la korano. (La araboj prononcas ĝin: „Kor – an").

Jam depost preskaŭ 1400 jaroj por la muzulmanoj la Ramadan estas la monato de la abstinado. Kiel memoro al la malkaŝo de la Korano, tiel fiksis la profeto Mahometo, la kredantoj nun fastadu ĉiun naŭan monaton de la islama kalendaro. Ĉar la islama lunjaro nur havas 355 tagojn, migras la Ramadan. Tial ĝi okazas ofte ĉe tagaj temperaturoj de 35 gradoj Celsius. Tio signifas por la kredantoj specialan strečan oferaĵon, ĉar eĉ dum la plej varmegaj tagoj ili rajtas nek trinki nek manĝi kaj nek fumi. Esceptoj estas soldatoj batalantaj, malsanuloj, gravedulinoj, maljunuloj kaj infanetoj.

Tiu moro estas tre severa, kiel mi povis observi en nia ekspoziciejo, kie ni havis multajn arabajn helpantojn. Frumatene ili kiel kutime freŝe laboris, sed tagmeze kaj pli poste ili komenciĝis pli kaj pli laciĝi kaj pli malforte ili povis labori. Niaj kolegoj el GDR matenmanĝis, tagmanĝis kaj posttagmeze trinkis kafon, kiel kutime. Sed ĉiuj araboj malakceptis ion ajn.

Sed se vi posttagmeze promenadis tra la stratoj, vi ĉie jam povas flari la odoron de la plej bona araba kuirejo. Kaj ĉiuj atendas malpacience la momenton, kiam la unua pafo estos aŭdebla. La signo por la fino de la fastado. Abunda Iftar-manĝado rekompencas la kredantojn por la fastado dum la tago kaj ankaŭ la nekredantoj partoprenas ĝin volonte. Preferataj estas manĝoj kun multe da oleo kaj sukero. Longe dum la nokto la familio sidas kune, dum radio kaj televido sendas facilan „nutraĵon".

Dum jarcentoj la mahometa fastada ordono helpis vualigi la socialajn kontraŭdirojn, ĉar de la ordono same estas trafataj la riĉaj kiel la malriĉaj homoj. Konservativaj fortoj tial estas interesitaj, ke tiu kutimo ankaŭ estonte restu. La vivo en la Ramadan-monato havas siajn proprajn leĝojn. Entreprenoj kaj oficejoj havas pli mallongigitan labortempon kaj la lernejoj instruas laŭ limigitaj instruplanoj. La laborproduktiveco falas rimarkinde. Ĉar tio kaŭzas esencajn komplikaĵojn en la moderna ekonomia kaj socia vivo, progresemaj fortoj strebadas paŝon post paŝo venki tiun tradicion. Tamen, ĉar la Islamo havas profundajn radikojn en la arabaj landoj, laŭ la fakuloj tio certe ankoraŭ postulas longan tempon.

Rudi Graetz

PACO EN LIBANO?

Laŭ la ŝajno en Libano dum la lastaj monatoj de la jaro 1975 okazis sanga militado „religia", sed fakte ĝi estis militado inter klasoj, ekzistantaj en Libano kaj ekstere. La reganta klaso ĉefe konsistas el kristanoj kaj la regata el mahometanoj. Kompreneble la situacio estas multe pli komplika ol tiel simple dirite. Ni tion iom esploru.

La civitana milito en Libano, kiu daŭris ĉirkaŭ naŭ monatojn, finiĝis meze de januaro 1976 kaj ekde tiu tempo ekzistas relativa trankvileco en la lando. Dekdu mil homoj perdis sian vivon dum tiuj monatoj, la plej multaj el ili ne havis armilojn. Dudek mil estis tre lezitaj, tricent mil civitanoj fuĝis eksterlanden, tio estas dekono de la loĝantaro. Pli ol 100 000 laboruloj perdis siajn laborlokojn. La domaĝoj, kiujn suferis la lando, ciferas per miliardoj da libanaj pundoj.

Ne eblas nomi en tiu ĉi artikolo ĉiujn kontraŭdirojn, kiuj kondukis al la bataloj de la lastaj monatoj. La tezo de religia milito nur estas preteksto, kiu kaŝas multnombrajn socialajn problemojn. Kunludas vico da religiaj komunumoj. Ĉe la kristana flanko la maronitoj kaj ĉe la islama flanko la druzoj, sunitoj kaj ŝiitoj.

En Libano loĝis 3,2 milionoj da loĝantoj. Ĉirkaŭ 40 % el ili estas kristanoj. La aliaj estas ĉefe muzulmanoj, inter ili la montaranoj de la oriento, la druzoj, kaj de la nordo, la nazarianoj. Krome ankoraŭ en Libano loĝas tricentmil palestinanoj. Dum jarcentoj sektanoj kaj politikaj grupoj trovis sian rifuĝejon en Libano. Post provokita masakro inter druzoj kaj maronitoj dum la kvardekaj jaroj de la lasta jarcento la francoj entrudiĝis en la landon. Ili venis kiel ŝirmantoj de la „Fratoj en Kristo", kies gvidantaj tavoloj baldaŭ fariĝis kompradoroj kaj ne nur de la franca kapitalo. Tiamaniere la maronitaj „grandaj" familioj en Bejrut riĉiĝis, kiel komercaj agantoj de la eŭropa kapitalo. Post la dua mondmilito la francoj devis forlasi la landon, sed antaŭe ili instigis la reprezentantojn de la kristana kaj islama grupiĝoj, subskribi tiel nomatan nacian paktón. Ĉar la bazo por ĝi estis la popola nombrado de la jaro 1907, kies rezulto estis kristana plimulto, ĝi donis al la maronitoj la ĉefpotencon. Tial ili lokigis ankoraŭ hodiaŭ la preskaŭ ĉionpovan prezidenton, la plejmulton en la parlamento, kiel ankaŭ la oficirkorpuson kaj ili kontrolas ankoraŭ hodiaŭ la plej multajn bankojn kaj grandkomercajn firmaojn.

En la sepdekaj jaroj Bejrut perdis sian rolon kiel komerca kaj financa centro de Araba Duoninsulo pro la oleo-gajnoj de Kuvajtio kaj pro la kreskanta ekonomia sendependeco de aliaj ŝtatoj. Krome ĉiuj tavoloj de Libano perceptas la sekvojn de la pli akriĝanta ĝenerala krizo de la kapitalisma mondo kaj ĉiu reagas laŭ sia maniero.

La maronita burĝaro provas malhelpi la formiĝon de popolunueco inter kristanoj kaj muzulmanoj per la ekscito de religiaj kontraŭdiroj. Ili provis realigi la malnovan koncepton de la partigo de Libano en religie definitaj ŝtatoj. La celo de la faŝista Kataeb-partio kaj de ekstremaj dekstraj grupiĝoj estis la fondo de maronita ŝtato ĉirkaŭ Bejrut, kie nun la kristanaj kaj islamaj landpartoj inter si estas miksitaj.


Kaj tial la celo de la ekstremistaj privataj armeoj estis, forpeli la muzulmanojn el centra Libano kaj provoki per tio la forpelon de la kristanoj el la aliaj regionoj de la lando. La Kataeb sukcesis fiagiti por tiu celo 20 000 precipe junajn homojn kaj gajni ilin per relative malmulte da mono, servi al tiu celo murdante kaj rabante. Ili semis malamon kaj sukcesis, ke centmiloj forlasis siajn vilaĝojn.

La situacio por la palestinanoj en Libano fariĝis danĝera. Kvankam ili simpatiis kun la libana popolmovado, ili tamen ne partoprenis la batalon, por ne doni la deziritan pretekston al la Israelanoj okupi la sudan parton de Libano. Ili nur ŝirmis sian propran popolon kaj nur kiam faŝistaj bandanoj ĉe la fino de la civila milito atakis kelkajn kampejojn de la palestinaj rifuĝintoj kaj murdis multnombrajn palestinanojn, ili devis agi.

La Palestina Liberiga Organizo (PLO) tial nur devigite ekagis, kiam estis blokita per malsato la kampejo Tall az-Zaatar kun 50 000 rifuĝintoj. Tuj Israelio kuntiris trupojn ĉe la limo. Nova milito minacis en Proksima Oriento.

Feliĉe oni sukcesis atingi politikan solvon, tiel nomatan trio-solvon, militista komitato el oficiroj de la siria, palestina kaj libana armeoj, kiuj devas kontroli unue la batalhalton kaj poste la realigon de minimala reformprogramo. Paŝoj al politika solvo de la problemoj ankaŭ estas konstituciaj demandoj nun diskutataj: La libana parlamento konsistu estonte el samaj partoj de kristanoj kaj mahometanoj: ĝis nun la kristanoj havis absolutan plimulton. La muzulmana registara ĉefo estonte estu elektota de la parlamento kaj ne plu dekretata de la kristana ŝtata prezidento.

Se ne malhelpotaj per novaj provokoj de la Kataeb kaj de Israelio, tiuj planoj kreus antaŭkondiĉojn por redukti la danĝeron de nova milito. Nur pli poste eblos solvi la socialajn problemojn de Libano.



La murdo je Ernst Thälmann

Prof. Walter Bartel

Plastiko de F. Rogge.

La antifaŝistoj de la koncentrejo Buchenwald scias pri multaj mortigoj fare de SS, la speciala taĉmento de la fasista ŝtato. La ekstermigo de judaj civitanoj, la laŭplana nuligo de polaj kaptitoj okazis ĉiutage. Kun indignego ni devis konstati la diablan murdon je 8000 sovetaj kaptitoj laŭ la t.n. nuka pafmortigo. Kaj krom tio la ĉiutaga murdo: pafmortigita de SS, dispecigita per piedpremado, pendigita, sufokita, venenita, injektita per mortigaj medikamentoj, pereigita per malsato kaj epidemio. Jen la sorto de patriotoj el 32 eŭropaj landoj. Se oni demandas politikan kaptiton de Buchenwald, kiu tago estis la plej nigra en la historio de tiu koncentrejo, tiam li senhezite respondos: la 18a de aŭgusto de 1944.

En la unua horo de tiu tago, SS-taĉmento en la kremaciejo de Buchenwald pafmortigis E. Thälmann embuske de malantaŭe. Kelkajn horojn antaŭe venis telefona ordono de la Regna Ĉefsekurejo al la komandanto de Buchenwald, Pister, ke li ekhejtigu la fornon de la kremaciejo por meznokto. La tie okupitaj kaptitoj estis kazernigitaj en siaj loĝejoj. Anoncita estis la alveno de du anoj de la Regna-Ĉefsekurejo. Ili alportis kaptiton, kiu tuj estu ekzekutota. Kiam la anoncita transporto alvenis en Buchenwald, kunvenis en la korto de la kremaciejo la SS-oficiroj Otto, Gust, Hoschulte, Warnstedt, la adjudanto de la komandanto Schmidt, la SS-kuracisto de la koncentrejo Schiedlausky, la SS-oficiroj Berger kaj Stoppe. El la aŭtomobilo aperis tri civiluloj. La viro en la mezo, granda, larĝŝultra, sen ĉapelo, kalva, devis iri antaŭen kaj tuj ekkrakis tri pafoj el pistoloj, post duona minuto sekvis kvara, verŝajne la mortiga pafo. Tiamaniere finiĝis la vivo de la estro de la Komunista Partio de Germanio, Ernst Thälmann, sub la kugloj de la SS-murdistoj.

Ni, politikaj kaptitoj aŭdis dum tiu nokto, ke E. Thälmann estis pafmortigita en la kremaciejo. Sed la fontoj estis malklaraj: onidiroj trakuris ĉiutage la koncentrejon. Oni ne volis kredi la teruraĵon.

La bombatako de la amerikanoj kontraŭ la armigaj laborejoj an la koncentrejo kaŭzis la morton de 400 kaptitoj. Multaj devis morti, ĉar la SS pafmortigis la kaptitojn, kiuj serĉis protekton en la proksima arbaro.

Inter tiuj mortigitoj ankaŭ troviĝis Rudolf Breitscheid, la estro de la socialdemokrata frakcio en la germana parlamento.

Sed kio estis kun E. Thälmann? Nia esplora servo ĉiam venigis novajn faktojn, kiuj finfine supozigis la mortigon. Tri semajnojn la nazia registaro silentis. Nek unu vorto pri la mortigo de E. Thälmann, nek unu vorto pri la perdo de R. Breitscheid.

Fine, la 16an de septembro 1944 la „Völkischer Beobachter", la centra organo de la nazia partio, publikigis la mensogan informon: „Koncentrejo bombardita". „Dum terora atako al la ĉirkaŭjo de Weimar la 28an de aŭgusto 1944 estis ankaŭ trafita la koncentrejo de multnombraj eksplodiloj. Inter la pereintaj kaptitoj troviĝis ankaŭ la iamaj parlamentaj deputitoj Thälmann kaj Breitscheid.

Tio estis triobla mensogo. Unue la bomba atako ne okazis kontraŭ la ĉirkaŭaĵo de Weimar, sed kontraŭ la armilaj laborejoj de la koncentrejo de Buchenwald; due estis falsigita la dato kaj trie dum la bombado pereis nur Breitscheid kaj ne Thälmann.

SS-ulo cinike komentis al unu de niaj kamaradoj, ke Thälmann jam estis mortpafita en la kremaciejo kelkajn tagojn antaŭ la bombatako kontraŭ Buchenwald.

Ne plu ekzistis dubo: Ernst Thälmann ne plu vivas, pafmortigita de la SS. Tiu sciigo rapide trakuris la koncentrejon. Ni germanaj antifaŝistoj, profunde emociigitaj pri la murdo, travivis laŭ la cirkonstancoj en koncentrejo, respektan kondolencon. Eksterlandaj kamaradoj, antifaŝistoj el multaj eŭropaj landoj, premis nin la manojn kun funebra mieno kaj nur diris unu vorton: Thälmann. Ni sentis la estiman respekton kaj amon al nia kamarado, la funebron pri lia morto, sed ankaŭ la firman decidemon, pli forte daŭrigi lian batalon. La kamaradoj de la vestaĵa labortaĉmento organizis funebran manifestacion en la kelo desinfekteja. La ejo estis dekorita per nigra kaj ruĝa ŝtofoj. En la fundo de scenejo staris rapide produktita bildo de Thälmann. Tiun manifestacion partoprenis 90 kamaradoj el preskaŭ ĉiuj regionoj de Eŭropo okupitaj de la nazioj. Willi Bleicher, post 1945 longjara estro de la metal-sindikato de Württemberg-Baden, inaŭguris la manifestacion. Robert Siewert, poste alta funkciulo en la Germana Demokratia Respubliko (GDR) parolis la memorigajn vortojn. Funebran marŝon ludis violinisto kaj la ĉeestintoj mallaŭte kunkantis la saman melodion. Kamarado Karl Schnog deklamis. Finfine oni komune kantis la „Varŝavjanko-n". Per fermita, levita pugno restis la anaro por kelkminuta silento. Sed ankaŭ kaŝe enviciĝis spiono. Li perfidis la aranĝon al SS, sed ne povis nomi iujn nomojn. SS arestis trafe maltrafe kaptitojn el la vestaja labortaĉmento, inter ili Robert Siewert kaj la estron de la kaptitoj, Erich Reschke. Ili estis fitraktitaj de SS. Sed ili silentis. SS ne eksciis, kiu apartenis al la neleĝa estraro de la germana kaj internacia rezista movado. La batalo estis daŭrigita. En la spirito de Ernst Thälmann ni preparis nin por la liberigo el la teroro de la faŝistoj.

(Laŭ eldono de „Internaciisto", N-ro 19)

M. Gorkij

Kanto pri ŝtormobirdo

Super griza marebeno vento nubojn kunpeladas.
Inter nuboj kaj la maro flugas ŝtormobird' fiera,
nigran fulmon similanta.
Jen per korp' tuŝante ondon, jen al nuboj leviĝante, krias ĝi,
kaj nuboj aŭdas ĝojon en kuraĝa krio.
En la kri'-dezir' de ŝtormo,
kolerforton,
flampasion
kaj pri venko konvinkiĝon aŭdas nuboj en la krio.
Mevoj ĝemas antaŭ ŝtormo,
ĝemas, flugas maltrankvile,
kaj sur fundon maran volus kaŝi timon de la ŝtormo.
Kaj kolomboj ankaŭ ĝemas,
ĉar al ili nekonata estas ĝu' de l'vivbatalo:
tondro ilin fortimigas.
Kaj pingven' malsaĝa kaŝas korpon grasan en la rokoj . . .
Nur fiera ŝtormobirdo flugas brave kaj libere
super griza ŝaŭma maro.
Pli kaj pli malgaje nuboj super maron malleviĝas,
kantas, dancas la ondaro al la vent' renkonten alte.
Tondras.
En la ŝaŭm' kolera ĝemas ondoj protestante.
Jen la vento ĉirkaŭkaptas per kunpreno firme ondojn
kaj kun forto ilin ĵetas kolerplene sur la rokojn,
en ŝprucerojn kaj en polvon smerald-montojn disŝutante.
Flugas ŝtormobird' kun krio,
nigran fulmon similante,
kiel sago pasas nubon,
per flugil' forŝiras ŝaŭmon.
Ĝi demonsimile flugas, bela, nigra ŝtormdemono,
ploregante kaj ridante . . .
Pri la nuboj nigraj ridas, pro la ĝojo ĝi ploregas!
En kolera tondr', akresenta, ĝi delonge aŭdas lacon;
certe estas, ke ne kaŝos nuboj sunon,
jes, ne kaŝos!
Vent' ĝemkrias . . .
Tondro blekas . . .
Blueflame aroj nubaj ardas super marabismo.
Aro kaptas sagojn fulmajn,
en la profundaĵ' estingas.
Kvazaŭ flamaj serpentegoj,
kuras, saltas, malaperas rebrilaĵoj de la fulmoj.
Ŝtormo! Baldaŭ ŝtorm' ektondros!
Tiu ŝtormobird' fiera
brave flugas inter fulmoj super mar' kolerblekanta;
de la venk' profeto krias:
Pli freneze tondru ŝtormo! . . .

El la rusa tradukis S. Obruĉev




Foto: Zentralbild

Maksim Gorkij kaj Esperanto

Por sovetiaj esperantistoj jam ne estas novaĵo, ke la fama rusa soveta verkisto, Maksim Gorkij pozitive taksis Esperanton kaj kelkfoje skribe aŭ buŝe esprimis pri ĝi sian opinion. Pri tio antaŭnelonge memorigis la libro, eldonita en Jakutia Aŭtonoma Soveta Socialisma Respubliko sub titolo „Jakutiaj amikoj de A. M. Gorkij" (Jakutskije druzja A. M. Gorkovo, kompilantoj A. T. Timŝin, I. V. Distler; Jakutsk 1970). La libro priskribas la vivon de A. A. Semjonov, eminenta sociaganto en Jakutio dum jaroj antaŭ kaj post la Granda Oktobra Revolucio en 1917, substrekante precipe liajn rilatojn kun la granda verkisto.

La libro represis kelkajn citaĵojn pri Esperanto el verkoj de A. M. Gorkij kaj aliaj fontoj. Ni prezentas ĉi tie du erojn, tradukitajn el eldiroj de M. Gorkij.

„Historio de kulturo okulfrape montras al ni, ke plej sentimaj gvidantoj de homaro jam efektivigis ne malmultajn „senprudentajn utopiojn", pli kaj pli ofte tiuj absurdaj revoj iĝas laboraj hipotezoj de scienco. Nun al la afero de efektivigo de utopio aliĝas volo de miloj kaj milionoj da homoj kaj nun la homaro bezonas unuecan internacian lingvon pli ol iam ajn antaŭe. Se oni forte volas, oni bone faras. La bezonon de unueca lingvo por la internacia proletaro elvokas unueco de klasaj aspiroj kaj celoj de proletaro.

Esperanto laŭ mia opinio estas sana ĝermo de internacia lingvo plene kapabla por plua evoluo. Jam nun Esperanto havas sufiĉe abundan literaturon kaj estas sukcese ellaborata teorie. Tiu ĉi laboro iros konsiderinde pli sukcese kaj pli rapide, se eblus al ĝi altiri sciencistojn – filologojn el medio de la konvinkiĝintoj pri neceso de unuiĝo de homaro.
Oni asertas: „lingvo ne evoluas artefare", tamen la lingvo, evaluante sufiĉe rapide, iĝas tute natura fenomeno, ĉar ĝi konformas la bezonon de nuntempa homo trovi, krei komune kompreneblan lingvon.
En 1910 mia konato, jakuta civitano Aleksej Semjonov ĉirkaŭveturis tutan Eŭropon, scipovante nek unu el eŭropaj lingvoj kaj parolante nur Esperanton, faris tion por persone kontroli, kiagrade estas disvastiĝinta la „artefarita" lingvo.
Preskaŭ en ĉiu pli-malpli grava eŭropa urbo li trovis esperantistajn organizaĵojn, hotelojn por ili, literaturon. Precipe riĉaj per tiaj organizaĵoj evidentiĝis Italio kaj havenurboj de Mediteraneo.
Mi estas profunde konvinkiĝinta, ke organiza volo de vastaj popoltavoloj kapablas „artefaritan" transformi en naturan.
Ĉu nia kulturo ne estas „artefarita" fenomeno?
Tamen – ni ĝisvivis la tempon, kiam ŝajnas al ni, ke nekultura homo estas fenomeno, malamika al niaj celoj, obstaklo en kreado de plua kresko de kulturo.
Por triumfo de kulturo ni kreas revolucion, fordonas ĉiujn fortojn de nia prudento, de nia volo, oferas nian personan liberon, vivon.
Ĉu oni povas kontesti, ke la lingvo, unueca por ĉiuj homoj, donos potencan antaŭenpuŝon al procedo de kultura evoluo?
Ne eblas!
Do – oni devas agnoski la neceson de kreo kaj evoluo de tia lingvo." (pĝ. 25–26).
En artikolo „Pri unuo" M. Gorkij skribas pri A. Semjonov:
„Semjonov... en libera tempo ,pro enuo' okupiĝis pri lernado de Esperanto, sed finlerninte komencis dubi, ĉu ekzistas homoj, parolantaj tian lingvon. Dubo instruas, sen dubo oni ne konvinkiĝas. Aleksej Semjonov pri ekzisto de Esperanto konvinkiĝis per tre originala maniero: li sendis telegramon en Esperanto al londona firmao, komercanta per ĉasaĵoj, kun propono liveri al la angloj frostitajn tetraojn. La tetraojn li, certe, ne disponis, sed la angloj respondis al li ankaŭ en Esperanto, do – tiu lingvo ekzistas kaj, scipovante ĝin, oni povas vojaĝi tra Eŭropo" (pĝ. 72).

A. Vaičiulis

(El „Horizonto de Soveta Litovio" 3/71)

Famo pri doktoro Faŭsto en Leipzig

En la jaro 1325 la vastkonata sorĉisto doktoro Faŭsto venis al Leipzig dum tempo, kiam la paska foiro ĵus komenciĝis.
La foira konstruaĵo „Auerbachs Hof" estis mondfama. Ĝi enhavis multajn altajn ĉambregojn, salonojn kaj ĉambrojn. Komercistoj el la plej diversaj landoj ekspoziciis ĉi tie grandamason da belegaj varoj kaj valoraj objektoj. Estis multkolora bildo. Tra ĉi tiu komerca loko nun promenis doktoro Faŭsto, valorvestita per silko kaj pelto, kaj lia servanta spirito, nomita Mefistofelo. Tiu aspektis kiel nobla kavaliro, ankaŭ vestita per multekosta ruĝa ŝtofo: ĉe la flanko li havis spadon. Kiu vidis ĉi tiujn ambaŭ miris kaj timetis. Mefistofelo lametis, kaj multaj, kiuj lin vidis, poste opiniis, ke ili estis rimarkintaj odoraĉon kiel sulfuro kaj peĉo. Sed doktoro Faŭsto kaj Mefistofelo nur rigardis moke, se la popolo gapis al ili kaj faris spacon. En tiu ĉi foirejo ankaŭ estis vinejo malsupre en la kelo. Ĝi havis la nomon „Auerbachs Keller" (kelo je nomo Aŭerbach) kaj estis malhela volbo. Sed estis gaja trinkejo kun la plej diversaj vinspecoj. Kantado, ridado kaj muziko elfluis el la kelo, kiam doktoro Faŭsto kun sia spirito Mefistofelo preterpasis, kaj ili emis, viziti la kelon. Tra malalta pordeto ili eniris. Tie sidis gaja muzikantaro kaj studentoj el Germanio, Hungario, Bohemio kaj Pollando. Ili muzikis, kartludis, bonmanĝis kaj ŝercis. La kelmastro kaj liaj helpantoj multfoje devis iri por plenigi la glasojn kaj pokalojn de la trinkemuloj. Faŭsto kaj Mefistofelo petis, ke ili iomete sidiĝu. Ili ambaŭ kunbabilis, kuntrinkis kaj kunridis. Doktoro Faŭsto rakontis pri siaj grandaj vojaĝoj tra Francio. Italio kaj Hungario kaj kiel li flugis tra la aero al Napolio, al paganoj, turkoj kaj al Kairo en la lando Egiptio. La aŭskultintaro tre primiris la rakontojn de la doktoro kaj opiniis, ke li estus vera diablo. Mefistofelo tre ĝojis pri iliaj vizaĝoj kaj decidis mistifiki ilin.
Li ordonis, ke oni alportu borilon kaj boris truojn en la tablan platon. Poste li fermis la truojn per ŝtopiloj el vakso. Li diris, ke la vino de la kelmastro estus ja sufiĉe bona, sed el la tablaj truoj fluus pli bongusta vino – al ĉiuj laŭ sia gusto. La ĉeestantoj pensis, ke estas ŝerco, simile al iuj farataj dum la foiro, por akiri monon. Tamen ili tenis la pokalojn kaj glasojn sub la truojn en la tabla plato kaj eltiris la vaksajn ŝtopilojn. Kaj laŭ ordono de la diabla majstro elfluis la plej bongusta vino. Kaj ĉiuj trinkantoj ĵuris, ke ili ankoraŭ neniam en siaj vivoj vidis aŭ gustumis tian vinon. Unu el la trinkuloj prenis grandan gluton, kaj elverŝiĝis kelkaj gutoj sur la teron. Tie ekkreskis fajra flamo, kaj li kaj la tuta trinkularo miregis. Tiu, al kiu okazis tio, volis preni la spadon por venĝi la malgloron. Sed la aliaj firmtenis lin opiniinte, ke estus sensenco, batali per la spado kontraŭ la diablo. Ĝuste en tiu momento venis kelkaj servistoj por elporti grandan plenan barelon el la kelo. Sed iliaj klopodoj estis vanaj; ili ne sukcesis, la barelo estis tro peza. Tion vidis doktoro Faŭsto kaj diris: „Kiel mallerte vi laboras, vi estas multaj kaj ne sukcesas, dume unu sola sufiĉas por transporti la barelon el la kelo". La servisto ne konante lin, koleris kaj insultis. La kelmastro aŭdis tion kaj diris al Faŭsto kaj Mefistofelo: „Kiu el vi sole elportas la barelon, al tiu mi ĝin donacos". La mastro esperis, ke ili forlasus la kelon senhonore. Sed Faŭsto, ne maldiligente, sidiĝis sur la barelon kiel sur ĉevalon kaj rajdis rapide el la kelo. Ĉiuj ĉeestantoj miregis kaj tumultis. Sed Mefistofelo tuj transformiĝis en nigran hundeton kaj antaŭkuris la barelon. Vokite, la magistrata servisto aperis, ĉar la rajdado sur la strateto antaŭ la kelo estas malpermesita. Tamen ambaŭ, doktoro Faŭsto kaj Mefistofelo jam malaperis, kaj neniu ilin revidis en Leipzig.

Tr. Schönbrodt

M. Lermontov

Nuboj

Nuboj ĉielaj, eterne migrante
Vi perlas, vaguloj en bluo sen bordo,
vi, al mi simile, kuras tralande,
ekzilaj al Sudo el belo de Nordo.

Kiu vin pelas? Sorto? Omeno?
Envio sekreta? Malamo sen kaŝo?
Krimo detrua? Fata malbeno?
Amikoj iamaj kun kalumniaĵo?

Ne. Pri l'sterilaj kampoj enue,
en frido eterna, eterna libero,
sen ia pasio vagas vi plue,
ĉar sen patrujo vi, do, sen sufero.

Trad. A. Logvin (El „Heroldo de Esperanto")

Mihály Gergely

Soleca telefonulo



Mihály Gergely (Mihaj Gergej) naskiĝis en 1921 en nord-hungara minvilaĝo. Li estis ferindustria faklaboristo, soldato, fabrika oficisto, teknika ĉefo, redaktoro de ĵurnalo, literatura kontrolisto en la Hungara Radio, sekretario en la Asocio de Hungaraj Verkistoj. Depost 1957 Gergely vivtenas sin el verkista kaj ĵurnalista laboro. Li estas kunlaboranto de la Budapeŝta „Hungara Nacio" (tagĵurnalo de la Patriota Popolfronto). Ĝis nun aperis de li dekkvar volumoj da noveloj, raportaĵoj kaj sociografiaj verkoj. Kiel konate, Mihály Gergely estas krome ĉefredaktoro de la revuoj „Eszperanto-Magazin" kaj „Hungara Vivo".
Ni ĉerpis la sekvan rakonton el „Bulgara Esperantisto" 12/74.

De tagoj eĉ unu uzebla penso ne venis al li en la kapon, eĉ unu frazon li ne sciis verki, kvankam lin ege premis la limdato de eseo-volumo. Li legadis, atendante Marta-n, de kiu li esperis horojn trankviligajn kaj ankaŭ refortigajn. Esperis, jes, sed pli kaj pli malcerte; de monatoj li vidis pli kaj pli klare, ke ilia multjara amrilato jam finiĝadas. Nepre sentis kaj volis tion Marta, fragila virino de tiel aparta beleco, kiu ĝis nun apartenis nur al li. Li vivis sola. Post la unuaj rendevuoj li petis Marta-n fariĝi lia edzino. Multfoje li ripetis la peton, sed Marta ĉiam neis, neniam dirante kial.
Marta estis ĉiam akurata, kaj nun jam pasis la kutima kvina horo. Eĉ en la torporo, ĉiam pli reganta lian korpon kaj cerbon, liaj nervoj jam kvazaŭ ektintis pro la streĉo.
En la ĉambro estis agrabla varmo, ĉar li amis la varmon. Ne tiom korpe li suferis pro la malvarmo, kiom interne li frostetis, kaj tio ĉiam paralizis lin en la laboro. Li iris al la fenestro, atentis la kontraŭflankan aŭtobushaltejon. Unu post alia pasis kvar aŭtobusoj, sed Marta ne venis. La horloĝo batis tri kvaronoj post la kvina. Almenaŭ ŝi telefonu!
Kaj nun eksonis la telefono. Kun ekscita rapideco li levis la aŭdilon.
– Halo!
– Ĉu la Johan-hospitalo? – aŭdiĝis virvoĉo.
– Ne! Privata loĝejo.
– Pardonu, ĉu 154 030?
– Ne! Misa interkroĉo.
– Pardonon, sinjoro!
– Nenio okazis.
Li demetis la aŭdilon, sed apenaŭ li faris du paŝojn direkte al la fenestro, la telefono lin postkriis.
– Jes!
– Ĉu Aleĉjo?... Ha, terure malfacile mi ricevis kontakton kaj...
– Pardonu, sinjorino, sed se vi deziras daŭrigi, vi devas scii, ke mi ne estas via Aleĉjo.
– Ĉu vere ne? Kun kiu do mi parolas?
– Ne kun Aleĉjo.
– Pardonu.
– Mi petas.
Li turnis sin ree al la fenestro, sed la telefono denove tintegis.
– Jes!
– Ĉu la Akademio Zrinyi? – La voĉo apartenis al junulino.
– Ne.
– Do?
– Mi ne estas la Akademio Zrinyi.
– Tial oni ne devas malĝentili.
– Kial do mi malĝentilis, filinjo?
La nekonatino senvorte forpasis el la linio.
Li rezignaciis, ekfumis, sidiĝis en la fotelon ne malproksime de la kahelforno, apud la freneziĝinta telefono. Prenis en manon literaturan revuon, sed la telefono tuj anonciĝis.
– Halo, Aleĉjo, ĉu estas vi ĉe la telefono?
– Bedaŭrinde, sinjorino, sed...
– Ho, denove vi!
– Kion fari? Jam la duan fojon okazas, ke freneziĝas mia telefono. Mia ĉirkaŭaĵo ŝajne estas malbona telefontereno. En tri minutoj vi estas la kvara, kiu estas alkroĉita erare.
– Kial vi ne anoncas tion al la centralo?
– Mi faris jam foje. Oni rekomendis atendi kelkajn horojn.
– Kion nun mi faru? Pro via freneza aparato elĉerpiĝis miaj telefonmoneroj.
– La centralo eraradas, ne mia aparato.
– Ankaŭ tiukaze! Ho, vi!...
Li sciis, ke la difektiĝinta centralo lin ne lasos trankvila, sed hodiaŭ li devis resti ĉe la telefono. Anonci li intencis la difekton al la centralo, sed ia stranga inerteco lin detenis.
Dume, la telefono ne silentis eĉ minuton.
– Halo!
– Ĉu la loĝejo Lekencei?
– Tute ne.
– Do kiu?
– Ĉu ne estas tute egale por vi, sinjoro?
– Sed jes, kaj ankaŭ tio, se vin tuj trafos apopleksio! Idioto!
– Vere, vi estas de delikata sentimento. Dankegon!
– Krevu!
Li senresponde demetis la aŭdilon kaj atendis novan viktimon.
– Halo, ĉu Florprodukta Kooperativo Rozmareno?
– Ne! Kafejo Mortofloro.
– Ĉu? Ĉu do ne Koopo Rozmareno?
– Ne! Papilio-kaptejo Papavo.
– Kial vi arlekenas? Ĉu vi volas amuziĝi? Saĝega kapo!
...
– Halo! Ĉu nervosanatorio?
– Ankoraŭ ne!
– Kion signifas, ke ankoraŭ ne?...
Mi volus paroli kun doktoro Varga, se li troviĝas tie.
– Mi diris, ne nervosanatorio.
– Kio do?
– Privata loĝejo.
– Kial vi ne komencis per tio?...
Kelkaj havas multe da tempo!
...
– Laĉjo? Salut', karulo! Do mi povas al vi supreniri?
– Ĉu vi insistas pri Laĉjo?
– Halo! Kial do-ĉu mi insistas? Kiu estas tie?
– Iu, same atendanta iun; iun, kies voĉo estas ĝuste tiel agrabla kiel la via, sed...
– Kun kiu mi parolas?
– Mi bedaŭras, sed ne kun Laĉjo.
– Kial vi ne komencis per tio, ke vi prezentu vin?
– Ĉis nun mi kredis, ke tiu prezentas sin, kiu ien enpaŝas.
– Pereu, vi... abomena etiketinstruisto.
...
– Aleĉjo, ĉu estas vi?
– Ŝajne, vi povis do aĉeti telefonmonerojn.
– Halo, kiu estas tie?
– Ne Aleĉjo.
– Ho, denove vi!
– Parodonu, sinjorino.
– Diru vi, nevidebla monstro, ĉu vi amuzas vin per tio, ke vi sidas apud via aparato kaj ĝojas pri la misa alkroĉigo de sensuspektaj telefonuloj?
– Mi vere bedaŭras, ke vi malŝparis pro



Soleca telefonulo

mi tri telefon-monerojn; ĉi-vespere mi ne povas eliri el la hejmo.

– Kaj kial ne?... Ĉu vin ne nervozigas la nekonataj telefonantoj?

– Ne ĉiu. – Ekzemple vi tute ne. Mi plezuras pri tia velura, plensonora alda voĉo. Ĝi memorigas pri Elizabeta Komlósi.

– Flata komplimento, sed min ne konsolas.

– Mi scias.

– Diru, ĉu mi aŭdos ĉiam vin, se mi volas ĉi-vespere paroli kun Aleĉjo?

– Provu el alia telefonejo, eble vi havos sukceson.

Pasis la sesa, li certiĝis, ke li vane atendas. Io malhelpas Marta-n, aŭ ŝi... simple ne volas veni. Ankaŭ nun tiu fortanima, decidema Marta faros la unuan paŝon, kiel ĉe ilia konatiĝo, pro kio li duoble estimis ŝin dekomence.

Li vokis la oficejon de Marta, sed de tie ŝi eliris je la kvara kaj duono, diris purigistino.

Al ŝia hejmo li ne povis telefoni: promeso ligis lin neniam tion fari, kio ajn okazus.

– Halo, Paŭĉjo?... Ve, mi estas tre aflikita ĉi-vespere. Ĉu vi scias, kio al mi okazis?

– Ne.

– Imagu, oni min vokis por kontrolo, kaj ŝajnas, ke oni trovis ion. Kiam mi hejmeniris, jam atendis tie la invitilo de la onkologio, oni vokas min por nova ekzameno... Dio mia, mi teruriĝis!

– Ne teruriĝu. Ĝustatempe malkovrita kancero estas kuracebla diversmaniere – per radiado, per operacio... En la mondo pli ol cent institutoj studas kaj serĉas la kuracmetodojn de la kancero. La hungara profesoro Szent-Györgyi, vivanta en Usono eksperimentis...

– Halo! Paŭĉjo, de kiam vi interesiĝas tiom pri la kancer-esploradoj?

– Pri multo oni interesiĝas, pri kio oni ne parolas.

– Halo, Paŭĉjo! Ĉu estas vi? Hodiaŭ via voĉo estas tiel stranga!...
Halo! Kun kiu mi parolas? Kial vi ne respondas?

– Mi ne estas Paŭĉjo, sed kion mi diris pri la kancero, tio estas vera. Vi ne devas teruriĝi. Eble necesas pli zorga ekzamenado...

– Ĉu vi diras, ke mi ne havas kanceron?

– Kaj eĉ se vi havus! Vi devas ja esti en komenca stadio, se ĝis nun vi rimarkis nenion. Kaj tial certe oni elkuracos vin.

– Ĉu vi estas doktoro?

– Ne, sed ĉiuj gazetartikoloj scias tiom pri la kancero.

– Mi petas pardonon pro la ĝeno... Kaj dankon por la trankviligaj vortoj. Bonan vesperon!

– Bonan vesperon, sinjorino!

...

– Halo, oĉjo Eŭgeno?

– Ne.

– Pardonu.

– Ne grave.

...

– Paŭĉjo?

– Ne, sinjorino.

– Ho, ne koleru.

– Mi ne koleras. Ĉi-vespere mi havas tempon.

– Sed se ni jam renkontiĝis nun denove, ĉu vi ne parolus al mi pri la nuntempaj kancer-esploroj?

– Mi estus blufulo, se mi tion farus. Certe vi havas doktor-konaton, mi proponas, serĉu lin anstataŭ Paŭĉjon, li informos vin pli bone ol ni duope.

– Ĵus vi menciis la nomon de Szent-Györgyi. Ĉu estas li, kiu ricevis Nobel-premion pro siaj paprik-esploroj kaj elmigris al Usono?

– Ĉu vi scias ĉion ĉi el libroj?

– Ho, mi jam ne estas kokideto... Ĉu li vere esploras nun la kanceron?

– Kaj eĉ per tre interesa metodo kaj kun esperigaj rezultoj. Antaŭ nelonge la gazetoj publikigis lian deklaron. Ĉu vi ĝin ne legis?

– Ŝajne mi pretervidis. Kion do li deklaris?

– Li nomis skandala stulto, ke malgraŭ la bonaj rezultoj de la esplorado, la usona registaro fortiris de lia instituto la provizan sumon bezonan por definitiva sukceso, kvankam ĝi estus malpli ol unutaga kosto de la Vjetnama milito.

– Terure! Dio mia, kiaj estas la homoj! Ve, mi devas fini, jam tri personoj atendas por telefoni. Kion do vi konsilas?

– Prenu trankviligilon, provu bone dormi kaj morgaŭ iru al la kontrolekzameno. Ne timu!

– Dankon. Mi ĝojas, ke kun tia bonfarulo mi parolis.

...

– Halo! Oĉjo Eŭgeno?

– Oĉjo Eŭgeno hodiaŭ elmigris.

– Kion li faris? Kio okazis al oĉjo Eŭgeno?

– Mi diris: la oldulo iris translimen en angla maniero.

– Sepdekjarulo?... Kun kiu mi parolas? Ĉu onjo Maria estas hejme?

– Ankaŭ onjon Maria kunportis la maljuna sinjoro.

– Aĉe, misguste vi, telefon-bandito! Kial vi ne diras tuj, ke la interkroĉo estas falsa? Tiajn oni devus eltiri el la trafiko, ke ili ne ronĝu la nervojn de la homo.

...

– Aleĉjo, ĉu estas vi?

– Jes.

– Ho, se vi scius, de kiam mi vin vokadas! Jam trifoje al ia malfeliĉulo min ligis la centralo. Ĉu vi scias, kion novan?

– Mi aŭskultas.

– Ĉu nur „mi aŭskultas"? Vi parolas nun tiel flegme, kiam ni jam interparolis, ke hodiaŭ mi metos klara la aferon kun mia edzo kaj poste tuj mi vokos vin.

– Mi scias, scias, daŭrigu. Kio estas?

– Imagu, Georgo konsentis la eksedziĝon. Dio mia, fine mi estas libera kaj de nun sole kaj vere, tute kaj ĝismorte la via! Espereble ankaŭ Katerina konsentis eksedziniĝi. Vi vidos, kiel belegajn infanojn ni havos! Fine ni havos infanon! Ĉu vi komprenas?... Halo! Kial vi ne respondas?... Halo! Aleĉjo, kial vi mutas? Diru jam ion, dio mia! Aŭ ne estas vi? Halo! Ĉu vi estas tiu? Denove vi?...

Li ekhontas, rompas la interkroĉon, demetas la aŭdilon sur la tablon, ekfumas, iradas tien-reen: li estis tro bombardata de hazardaj dialogoj. Poste li iras al la fenestro. Malvarma novembra vespero. Nebulo. Eĉ unu aŭtobuso el la alvenantaj ne alportis Marta-n. Li paŝadas al la forno, sin apogas dorse al ĝiaj varmegaj kaheloj, tamen frostotremetas. De nun – li pensas – se Marta ne venos plu, li havos multfoje tiajn solecajn vesperojn, ĉar viro en tia aĝo, ĉe la sojlo de la kvindekaj jaroj, havante iom da memkritiko, devas rekoni, ke li malfacile jam trovos tian virinon kiel Marta.



LA KVARA NOVELO DE LA KVINA TAGO



Antaŭ ne multe da tempo estis en Romanjo unu kavaliro de bona nobeleco kaj situacio, kiun oni nomis sinjoro Liĉio de Valbona. Li havis la fortunon, jam proksimiĝante al la maljuneco, ke lia edzino, nomata damo Ĝakomina, naskis al li filinon, kiu fariĝis, kreskante, la plej bela kaj gracia en la tuta lando. Kaj ĉar ŝi estis ilia sola infano, ŝiaj gepatroj ŝin ege amis kaj tenis kara, kaj gardadis ŝin kun mirinda zorgo, esperante fari per ŝi ian altan boparenciĝon.

Nu, en tiu sama domo ofte vizitadis kaj ties mastron preskaŭ ne delasadis unu bela junulo, kun vigla korpo, nomata Riĉardo, el la familio de la Menardoj el Bretinoro. Sinjoro Liĉio kaj lia edzino ne pli gardis sin kontraŭ li, ol ili farus kontraŭ sia propra filo; kaj tiu ĉi, de temp' al tempo vidante la knabinon, kiu estis tre bela kaj ĉarma, kun afablaj manieroj, kaj jam proksima al la aĝo de edziniĝo, senespere enamiĝis al ŝi, sed li tre penadis kaŝi sian pasion. La knabino tamen ĝin rimarkis kaj, ne evitante la rebaton, tute simile komencis lin ami, kio tre plezurigis Riĉardon. Plurfoje li provis alparoli ŝin, sed ĉiam li hezitis kaj silentis; unu fojon tamen li elektis sian momenton kaj kuraĝe diris: „Katarina, me petegas vin, ne igu min morti de amo!" Al kio la knabino tuj: „Volu Dio, ke vi mem ne igu min ankaŭ morti!" Tiu respondo donis al Riĉardo multe da ĝojo kaj da kuraĝo, kaj li diris plu: „De mi neniam venos io, kio al vi malplaĉus; sed al vi apartenas trovi rimedon, por savi niajn ambaŭ vivojn!" „Riĉardo, diris tiam la knabino, vi vidas, kiel mi estas prigardata kaj pro tio mi ne kapablas vidi, kiel vi povus veni ĝis mi; sed se vi vidas ion, kion mi povus fari sen hontiĝo, diru nur kaj mi faros." Riĉardo, pripensinte diversajn rimedojn, diris subite: „Katarina mia dolĉa, mi ne vidas alian solvon ol jenan: ĉu vi povus maldormi kaj veni sur la galerion, kiu najbaras la ĝardenon de via patro? Se mi scius, ke tie vi troviĝas dum la nokto, mi nepre aranĝos por veni tien, kiel ajn alta ĝi estas." Kaj tuj Katarina: „Se vi havos la kuraĝon vin ŝovi tien, mi kredas, ke mi trovos eblon, por iri tien dormi." Riĉardo promesis, kaj ĉe tiuj vortoj ili kisis sin unu solan fojon, kaj disiĝis.

La sekvantan tagon, kiu jam estis ĉe la fino de majo, la juna amantino komencis plendi antaŭ sia patrino, ke la pasintan nokton ŝi ne povis dormi pro la tro granda varmo. La patrino ekmiris: „Filinjo, kia varmo do estis? Ververe, tute ne estis varme!" Sed Katarina: „Patrino mia, vi devus diri: kiel ŝajnas al mi – kaj eble vi dirus la veron; sed vi devus ankaŭ pensi, kiom pli varmiĝemaj estas la knabinoj, ol la plenaĝaj virinoj!" La sinjorino tiam diris: „Filinjo mia, vi pravas; sed mi ja ne povas fari varmon aŭ malvarmon laŭ mia plaĉo, kiel vi eble deziras. Oni devas toleri la veteron, kiel ĝin donas la sezono; eble la venontan nokton estos pli friske, kaj vi pli bone dormos." „Nu, Dio volu! ĝemis Katarina; sed ne estas la kutimo, ke, kiam oni antaŭeniĝas en somero, la noktoj pli malvarmiĝadas." „Kion do vi volas, ke mi faru?" diris la patrino. „Nu, se al mia patro kaj al vi mem tio plaĉus, respondis la filino, mi pretigus volonte liteton sur la galerio, kiu kondukas al lia ĉambro kaj rigardas al la ĝardeno, kaj tie mi dormus; kaj aŭdante la kanton de la najtingalo kaj ĝuante lokon pli malvarmetan, mi sentus min multe pli bone ol en via ĉambro." La patrino tiam diris: „Filineto, konsoliĝu; mi parolos pri tio kun via patro, kaj ni faros laŭ lia volo."

Sed kiam sinjoro Liĉio aŭdis tiun peton el la buŝo de lia edzino, ĉar li, jam maljuna, havis iom malfacilan karakteron, li ekkriis: „Kiu do estas tiu najtingalo,

ĉe kiu ŝi volas dormi? Mi tiel faros, ke ŝi endormiĝos eĉ je la kanto de l'cikado!" Katarina, eksciinte tion, turmentate pli de spitiĝo ol de varmiĝo, ne nur pasigis la sekvantan nokton en maldormo, sed eĉ ne lasis dormi sian patrinon pro siaj konstantaj plendoj pri la varmo. La patrino, suferinte ilin, ĉe la unua eklumo de la mateno iris al sinjoro Liĉio kaj diris: „Sinjoro, vi malmulte zorgas pri ĉi tiu nia knabino; kiom grave estas al vi, ke ŝi kuŝos en la galerio? Dum la tuta nokto ŝi ne povis ripozi pro la granda varmo; kaj krome vi miras, ke al ŝi, kiu estas nur infano, plaĉos aŭdi la kanton de la najtingalo! La infanoj ĉiam deziras la aferojn, kiuj similas al ili." Tion aŭdinte, sinjoro Liĉio respondis: „Nu, bone! Ordonu aranĝi liton tian, kian vi volos, kun serĝaj kurtenoj ĉirkaŭe, kaj tie ŝi dormu kaj aŭskultu la najtingalon ĝissate!" Apenaŭ la knabino eksciis tion, ŝi tuj zorgis, ke la lito estu pretigita tie kaj, havante la intencon dormi tie jam la sekvantan nokton, ŝi tiom klopodis, ke ŝi renkontis Riĉardon, kaj ŝi faris al li la interkonsentitan signon, per kiu li komprenis sian devon.
Kiam sinjoro Liĉio aŭdis, ke lia filino jam iris dormi, li fermis la pordon, kiu de lia ĉambro eliris sur la galerion kaj mem enlitiĝis. Riĉardo atendis, ĝis ĉio fariĝis plene kvieta, kaj per la helpo de ŝtupetaro grimpis sur unu muron, kaj de tiu muro, alkroĉante sin al la atendoŝtonoj de alia muro, kun laciga penado kaj granda danĝero, se li estus falinta, li atingis la galerion, kie sen granda bruo sed kun grandega ĝojo lin akceptis la knabino. Ili longe interkisis, kuŝiĝis kune, kaj dum preskaŭ la tuta nokto ili donis unu al la alia agrablon kaj plezuron, plurfoje kantigante la najtingalon. Ĉar la noktoj estis jam mallongaj kaj forta la volupto, ili tute ne atentis, ke alproksimiĝis la aŭroro: sed varmiĝinte kaj de la temperaturo kaj de sia petolado, ili endormiĝis sen ia ajn kovrilo; Katarina havis la dekstran brakon ĉirkaŭ la kolo de Riĉardo kaj ŝia maldekstra mano tenis lin je tiu parto, kiun vi, damoj, plej hontas nomi – almenaŭ kiam vi estas inter viroj.
Dum ili dormis en tiu ĉarma pozo, sen ilin veki alvenis la mateno, kaj sinjoro Liĉio leviĝis. Memorante, ke lia filino dormas en la galerio, li kviete malfermis la pordon, dirante al si: „Mi vidu, kiel la najtingalo dormigis nian Katarinan!" Kaj irinte plue, li delikate levis la serĝan kurtenon, kiu ĉirkaŭfermis la liton, kaj ekvidis ilin tute nudaj, malkovritaj kaj enbrakigitaj en la maniero ĉi-supre dirita. Li tuj rekonis Riĉardon, sed senbrue formoviĝis, eniris en la ĉambron de sia edzino kaj vokis ŝin: „Rapidu, virino, leviĝu kaj venu vidi: via filino estis tiel avida je la najtingalo, ke ĝin ŝi kaptis kaj tenas en la mano!" – „Kiel estus eble?" diris la sinjorino. „Tion vi vidos", li respondis, „se vi rapidos veni." La sinjorino vestis sin haste, kviete sekvis sian edzon, kaj, kiam ambaŭ estis ĉe la lito kaj levis la kurtenon, damo Ĝakomina povis vidi kun plena certeco, kiel ŝia filino kaptis kaj tenas la najtingalon, kiun ŝi tiel forte deziris aŭdi. Kredante sin trompita de Riĉardo, ŝi volis krii kaj lin insulti, sed sinjoro Liĉio ŝin admonis: „Virino, kiom kara al vi estas mia amo, atentu ne diru vorton; en certeco, ĉar ŝi lin kaptis, li estas ŝia. Riĉardo estas nobelo kaj riĉa heredonto; kun li ni povas fari bonan parenciĝon; kaj se li volos deiri pace de antaŭ ni, necesos unue, ke li ŝin edzinigu: li ja trovos, ke li metis la najtingalon en sian propran kaĝon, kaj ne en fremdan." La damo trankviliĝis, vidante, ke la edzo ne koleras pro la afero; kaj konsiderante, ke ŝia filino ĝuis bonegan nokton kaj agrable ripozis kaj kaptis la birdon, ŝi preferis silenti.
Ne longe post tiu konversacio, Riĉardo vekiĝis, kaj, vidante la tagon jam luma, opiniis sin jam mortinta; li vekis Katarinan kaj diris al ŝi: „Ho ve, koro mia! Kion fari? Jen la tago venis kaj min surprizis ĉi tie!" Ĉe tiuj vortoj sinjoro Liĉio antaŭenpaŝis, levis la kurtenon kaj respondis: „Ni faros tre bone!" Kiam Riĉardo ekvidis lin, ŝajnis al li, kvazaŭ oni ŝirus al li la koron el la brusto; li sidiĝis sur la lito kaj diris: „Sinjoro mia, mi petegas de vi indulgon! Mi konfesas, ke, kiel mallojala kaj malica homo, mi meritis la morton – faru do pri mi, kion vi volos. Mi tamen petegas vin, ke, se tio estas ebla, vi domaĝus mian vivon, kaj mi ne mortu!" Sinjoro Liĉio tiam: „Riĉardo, tion ĉi ne meritis la amikeco, kiun mi sentis por vi, nek la fido, kiun mi havis en vi. Tamen, ĉar tiel estas, kaj la juneco pelis vin al tia granda kulpo, por ke vi mem evitigu al vi la morton kaj al mi la honton, prenu Katarinan por via leĝa edzino, por ke, same kiel ŝi estis via ĉi tiun nokton, tia ŝi estu ankaŭ dum ŝia tuta vivo: jen la maniero, kiel vi povas akiri mian paciĝon kaj vian saviĝon. Se tion vi ne volas fari, rekomendu vian animon al Dio!"
Dum tiu interŝanĝo de paroloj Katarina, kiu allasis la najtingalon kaj rekovris siajn belaĵojn, komencis forte ploradi kaj petegi sian patron, ke li pardonu Riĉardon; kaj aliflanke ŝi petegis Riĉardon fari, kion ŝia patro volis, por ke ili ambaŭ kune, sendanĝere kaj longatempe, povu ĝuadi tielajn noktojn. Sed ne tro multaj petoj estis tiam bezonataj: unuflanke la honto pri la farita kulpo kaj la intenco kompensi, aliflanke la timo antaŭ la morto kaj la volo eskapi, kaj krome la arda amo kaj dezirego posedi la amataĵon, ĉio tio igis lin libere kaj senprokraste diri, ke li estas preta fari tion, kio plaĉas al sinjoro Liĉio. Tiu ĉi do pruntis de sia edzino unu el ŝiaj ringoj, kaj Riĉardo, sur la loko mem kaj en ilia ĉeesto, edzinigis al si Katarinan. Post la plenumo, sinjoro Liĉio kaj la edzino eliris, dirante: „Ripozu nun, ĉar tion vi probable pli bezonas ol leviĝi!"
Kiam ili estas for, la gejunuloj denove brakumis unu la alian kaj, ne rajdinte dum la nokto pli ol ses mejloj, ili plu rajdis du aliajn, kaj tiam metis finon al sia unua tagvojo. Ili do leviĝis, Riĉardo havis pli trankvilan konversacion kun sinjoro Liĉio, kaj, ne multe poste, kiel decas, li denove edziĝis al la knabino en la ĉeesto de siaj amikoj kaj parencoj, kun granda ceremonio kondukis ŝin en sian domon, kaj tie faris belan kaj honoran nupfeston. De tiam, dum longa tempo, en paco kaj kontenteco li ĉasis kun ŝi la najtingalon tage kaj nokte, kiom al ili plaĉis.

El la itala tradukis G. Waringhien
(El „Heroldo de Esperanto")

ALKEMIO

Viajn okulojn en l'okuloj
kaj kisojn en surlipaj bruloj
mi portas kun mi ĉie.
Memor' de via korpo-varmo
obsedas min kaj ĝis eklarmo
min tuŝas emocie.

Kaj antaŭ la okul' fidela
ĉiu virinvizaĝo bela
kovriĝas per nebuloj
kaj el post la nebulvualoj
alridas min la stelkristaloj
de viaj du okuloj.

Jen kiel ĉiu bel' kaj mildo
fariĝas por mi via bildo
per ŝanĝo alkemia,
kaj nur pli forte al vi ligas,
kaj nur pli arde dezirigas
vin, ho ebrio mia!

Kalman Kalocsay

Henri Vatré

Iom pri humoro

La mondo svarmas je motivoj por incitiĝo, indigno, kolero. Kiam aperas tiuj sentoj, vera humoro ne eblas. Necesas trovi alian vojon por esprimi la internan emocion, pretendi al pli alta kvalito kaj supera nivelo.

Estus banale aldoni, ke humoristo ne ŝatas konformismon.

Humoro en Esperanto: Kiam ni konsideras la socian fenomenon de nia movado, ni konstatas, ke Esperanto vokas, interalie, nian liberemon. Ĝi ne estis aŭtomate trudita. Ĝia uzo rezultas el elekto. Almenaŭ ĝis nun tiel okazis, se ni esceptas devigan instruon en lernejoj, aŭ la privilegian staton de la denaskaj esperantistoj. Ĝia sukceso fontas precipe el entuziasmo, idealo, solidaro. Kaj ĝuste tiuj noblaj motivoj kaj la iom naiva fervoro de multaj samideanoj ekscitis la vervon de niaj humoristoj. Inter la ŝatataj temoj troviĝas la senbrida propagando, la movado kaj ĝia organizo, la publika kaj privata agado de la membroj, la kongresoj, kaj eĉ lingvaj demandoj kaj neologismoj!

Niaj verkistoj plej konataj kiel humoristoj estas, kronologie, Ned Katryn, Merchant, Raymond Schwartz, Lejzerowicz, Thorsen, R. kaj C. Rossetti, Baupierre. Tiuj produktis almenaŭ po unu libron de humoro.

Multaj aliaj aŭtoroj montras humorajn tendencojn en kelkaj linioj aŭ paĝoj, kaj ofte pli sukcese, ol iuj en la antaŭa listo. Ni nomu: Lengyel, Cseh, Beraru, Kalocsay, Baghy, Szilàgyi, Forge, Maura, Waringhien, Ribillard, Auld, Francis, M. Boulton, Clelia Conterno. Kaj mi forgesas eble dekon da aliaj, kiujn mi iam legis kun ĝuo. Ili certe pardonos, ĉar ili posedas humoron.

Ĉar ne eblas ilin ĉiujn prezenti, mi elektos unu el ambaŭ kategorioj. La plej populara estas sendube Raymond Schwartz, kiu disponas tre riĉan klavaron ekde la petole simplaj vortludoj ĝis rafinitaj kreaĵoj vere altnivelaj. Lia arsenalo surprizas per sia abundo kaj vario. Oni trovas ĉe li **preskaŭ** ĉiujn formojn de komiko ofte nuancita per delikata emocio. Mi diris **preskaŭ**, ĉar kompreneble neniu homo kapablas ampleksi la tuton de la internacia humoro.

Por la studanto, Schwartz prezentas apartan intereson, ĉar li majstras la teknikon, verve manipulas la materialon kaj trovas ĉiam novajn ideojn por formo kaj enhavo. Plie, li konstante progresis tra 40 jaroj da senĉesa kreado por atingi la kulminon en sia lasta romano KIEL AKVO de L'RIVERO.

Pli frue, li ofte aŭdacis ĝis regionoj iom malkomfortaj por pruduloj. Tamen lia vera talento pruviĝas en la pentrado de simplaj, ordinaraj, kutimaj scenoj, el kiuj li scias kapti la tutan sukon kaj aromon. Liaj plej sukcesaj pecoj fontas el observo al la ĉiutaga vivo. Li konas la francan vilaĝon same bone kaj intime kiel la grandurbon. Schwartz estas ne nur granda artisto, li estas ankaŭ homo por kiu nenio homa estas fremda.

La humoro pri karakteroj, en kiu tiel eminentas Schwartz, estas eble la plej interesa kaj altnivela. Ĝi rivelas al ni aspekton de la homo kaj tuŝas plej proksime al la vivo mem. Ĝin oni trovas ĉe Baghy, kiu kreis almenaŭ tri bone motivitajn figurojn inter multaj aliaj ekstere pli imponaj, sed malpli validaj. Jen kiel Baghy prezentas ilin:

1. **Mihok:** Lia nomo estas Miĥaelo Mihok. Eble li ŝajnas iom komika figuro, sed la tuta hometo estas knedita el koro kaj helpema boneco.

2. **Izor Steiner:** La malalta mizera figuro de Izor Steiner aperis sur la sojlo. Li estis la brokantisto de la militkaptitoj el la najbara barako. Kun larĝa rido li haltis antaŭ la pordo.

3. **Paŭlo Pàal:** Ĉe la komenco de nia historieto, sur tiu ĉi ŝoseo paŝetadis paro de vastaj botegoj kaj super ili kolorperdinta ĉapelo. Inter la du karakterizaj ekstremaĵoj modestadis la preskaŭ diafane maldika figuro de Paŭlo Pàal.

Dum la aliaj herooj de Baghy estas kreitaj de lia fantazio, ne ĉiam konvinke, tiuj ŝajnas prenitaj el la realo, preskaŭ fotitaj. Ilin povus tre bone aktori la granda Charlie Chaplin. Ili aspektas naivaj, mallertaj, timemaj, sed tuj iĝas al ni simpatiaj, karaj, memorindaj. Ili ja estas komikaj, sed samtempe kompatindaj, kiel diris John Francis. Legante pri iliaj malfeliĉoj, komplekso de emocioj nin invadas: ni ridas kaj ploras samtempe, ne sciante, ĉu la situacio estas pli kortuŝa, ol rigida.

Kaj tiel devas esti, ĉar la homa emociaro estas kompleksa. La artisto vekas reagon, kiun oni ne povus nete difini, nek antaŭvidi. Baghy multe predikis pri homaranismo, kaj lia homamo estas tute sincera. Sed tra la simplaj figuroj de Mihok kaj Izor, renkontitaj en siberiaj militkaptitejoj, li iĝas por ni plej kara pro la frata varmo de la koro.

En la individua, kiel en la socia vivo, HUMORO ludas modestan, sed nepreterindan rolon. Unu el ĝiaj avantaĝoj estas moderigi la ekscesojn por akiri pli serenan mondrigardon. Ni do provu ĝin praktika ĉie kaj ĉiam laŭeble. De ĝi ne ni atendu miraklojn, sed almenaŭ, faciligon. Kaj se nia provo ne sukcesos, ni nin konsolu, pensante, kiel la ĉinoj, ke ne la puto tro profundas, sed nur la ŝnuro ankoraŭ tro mallongas.

(Svisa Espero 8/72)

Epigramoj de Sztaudynger

Traduko de Andrzej Pettyn

MALNOVA VERO
La vivo-fino kaj viv-aŭror
Kostas ĉiam multe da plor.

SPURO
Ofte pli firmas spur' sur argilo,
Ol vivo plena de fam' kaj brilo.

SNOBECO
Multe pli da aplaŭd' en teatro
oni aŭdus,
Se nin la surduloj ne plu aplaŭdus.

KONFESO DE RECENZISTO
Pri viaj roloj mi sinceras:
En rol' de Ev' mi vin preferas.

PRI UNU ĈARMULINO
Ĉiu ŝia opono
Jam estas propono.

PREZENTO DE NOVA SLOGANO
(parafrazo)
Nova slogano, samideanoj:
„Ni ne deziras sloganojn"!

PAĈJO NE REVENAS
Nokte, nek tage paĉjo revenas,
Bone, ke panjo fenestrojn kurtenas.

IDILIO
Estis arbaro, musko, gres',
Ŝi diris: „jes".

BLOVAS VENTO
Blovas vento, blovas,
Kiel ĝi scipovas.

FESTO DE L'VIRINOJ –
ESTAS FESTO DE L'VIROJ
Ni solenas ĝoje, kun am' kaj admiro
Tagon de l'virinoj, tutjaron
de l'viroj.

APELO
Lavu vin ĉiam, knabinoj,
Vi ne scias pri tag' kaj hor'
de l'destino.

LA VERA VIRECO
Ne povas ekzisti vera vireco
Sen dozo de delikateco.

INSTRUO
Ne donos al vi patro, ne donos la
patrino,
Kion povas doni ĉarma najbarino.

Fragmento el TRIGROŜA ROMANO

de Bertolt Brecht

Trad. d-ro Karl Schulze

Kiel konate la esperantlingva traduko de la romano „Nuda inter lupoj" de Bruno Apitz (trad. D-ro Schulze) fariĝis granda sukceso. Tial la sama ŝtata eldonejo Edition Leipzig decidis eldoni novan romanon en la internacia lingvo.
Ĉi-foje temas pri la mondfama „Trigroŝa romano", denove en la traduko de d-ro Schulze. Sube ni aperigas fragmenton el la romano.

Persikfloro

La domoj, en kiuj sinjoro Jonathan Jeremiah Peachum entreprenis sian strangan fabrikon, havis multajn ejojn. Inter ili estis ankaŭ malgranda, roze kalkita ĉambro por fraŭlino Polly Peachum. Du el la kvar etaj fenestroj rigardis antaŭen al la strato, la aliaj du al unu el la kortoj, sed antaŭ ĉi tiuj fenestroj etendiĝis koridoro el ligno kaj traboj laŭ la ekstera muro de la domo, tiel ke la fenestroj devis havi tolkurtenojn, aliokaze eblus enrigardo. Ili estis malfermitaj nur dum la plej varmegaj noktoj de la sezono, por ke la aero povu trablovi, ĉar la ĉambro estis sufoka tiutempe. Ĝi situis en la dua etaĝo, tuj sub la tegmento.
En la tuta kvartalo fraŭlino Polly Peachum estis ĝenerale nomata „persiko". Ŝi havis tre belan haŭton.
Kiam ŝi havis dek kvar jarojn, oni aranĝis por ŝi la ĉambron supre en la dua etaĝo; laŭ la diroj de la homoj tio okazis, por ke ŝi ne tiel ofte vidu sian patrinon, kiu ne povis venki sian preferon al alkoholaĵoj. Ekde tiu aĝo oni nomis ŝin fraŭlino, kaj je certaj horoj ŝi aperis en la antaŭa butiko, precipe kiam Mitchgins de la policejo ĉeestis. Komence ŝi estis eble iom tro juna por tiu ĉi uzo, sed, kiel dirite, tre ĉarma.
En la aliajn ejojn, la tajlorejon kaj la selistejon, ŝi venis tre malofte. Ŝia patro instigis ŝin viziti pli la preĝejon ol liajn laborejojn. Tamen ŝi konis ilin kaj ne sentis skrupulojn pro ili.
Tiutempe la instrumentbutiko spertis egan ekfloron, kaj oni ĝenerale diris, ke sen Polly la dika Mitchgins montrus multe pli grandan intereson pri ĉi tiu vendejo. El- kaj eniris enorme multaj homoj, malgraŭ tiom malmultaj instrumentoj.
Ja veris, ke Jonathan Jeremiah Peachum estis ankaŭ honorofica malriĉula prizorganto de entute tri diocezoj, sed la malriĉuloj ne ŝatis iri al li, por tio ili vere estis tro malriĉaj. Peachum tute ne ŝatis la almozadon, krom ke ĝi okazis sub lia gvidado kaj laŭfake.
Cetere estis nur memkompreneble, ke la persiko iom penis esti afabla al la dika Mitchgins, ĉar ĉio ja okazis nur pro ŝi. Sufiĉe ofte ŝi aŭdis sian patron diri: „Se mi ne havus la infanon, mi daŭrigus tiun hundan vivon eĉ ne unu minuton, certe ne pro vi, Emma. Ne, por ke vi povu perdrinki vian tombon, Emma!"
Emma estis sinjorino Peachum, kaj kiam ŝia edzo tiamaniere esprimis malaprobon al ŝiaj malgrandaj kutimoj, ŝi ŝatis diri: „Se mi havus certajn aliajn agrablaĵojn en mia edzineco, neniam eĉ unu guto pasus tra inter miaj lipoj. Ankoraŭ hodiaŭ mi povus ĉesi."
Infanoj ofte aŭdas tiajn frazojn kaj estas certagrade impresitaj de ili.
Parenteze dirite, oni ne pensu, ke oni edukis la persikon konsidere al la komplezoj (etaj, kiel dirite) al Mitchgins aŭ al iu alia. Kontraŭe! Ŝi ne povis memori pri iu tempo de sia juna vivo, en kiu ŝi banis sin en la bankuvo de la lavejo sen sia noktoĉemizo (la fenestrojn oni ĉiufoje kovris per tukoj). Sinjoro Peachum ne ŝatis, ke ŝi ekvidus sian beletan haŭton.
Sinjoro Peachum krome neniam ekhavus la ideon permesi al ŝi eĉ nur kvin minutojn da libera tempo ekstere de la gepatra domo. Ŝi iris en la lernejon kiel ĉiuj aliaj infanoj. Sed ĉiam Sam venis por hejmenkonduki ŝin.
„Via filino estas amaso da volupto, nenio alia!" sinjoro Peachum diris al sia edzino, post kiam li surprizis Polly, kiam ŝi pendigis sur la muro de sia ĉambro la foton de aktoro, tranĉitan el gazeto. Tia restis lia opinio pri ŝi dum jaroj.
Sinjorino Peachum havis aliajn opiniojn pri volupto, antaŭ ĉio ili estis amaraj. Post kiam ŝia filino pasis la dekokan vivojaron, ŝi kunprenis ŝin je dimanĉaj posttagmezoj en la „Sepion". Tio estis restoracio de honesta speco, kiu malantaŭe havis malgrandan ĝardenon kun tri kriplaj kaŝtanarboj. Orkestro de ladinstrumentoj tie ludis dimanĉe posttagmeze kaj vespere. Oni dancis, memkompreneble tute honeste, la patrinoj sidis kun la trikilaro laŭ la ĝardenbarilo.
En tia loko knabino kiel Polly ne povis resti longtempe neatentita. Estis multaj kandidatoj. Du el ili povis esti konsiderataj. De ili sinjoro Beckett aperis la unua kaj sinjoro Smiles estis pli agrabla. Tamen la ŝancoj de sinjoro Beckett komencis pligrandiĝi ĝuste per kaj post la apero de sinjoro Smiles.
Sinjoro Beckett estis diktrunka, fortika kvardekjarulo kun kapo kvazaŭ rafano. Li havis butonumitajn gamaŝojn sur la ŝuoj kaj strange dikan bastonon, kiun li preskaŭ ne lasis el siaj grandaj manoj. Lia vizaĝkoloro ne estis la plej sana; kun Smiles, kiu estis multe pli juna kaj havis la sanan haŭtkoloron de junuloj remantaj sur Tamizo, oni tute ne povis kompari lin. Sed li estis negocisto kaj Smiles estis skribisto en akvokatejo, kaj tial sinjoro Beckett ŝajnis multe pli fidinda al sinjorino Peachum. Tiaj junuloj kiel Smiles ne konas senton pri respondeco; entute ili vivas senzorge, donante sin al siaj inklinoj. Pro kia profito tiaj senhavuloj submetus sin al iu devigo por firmigi sian reputacion? Por kio ili bezonas reputacion?
Dum tiu printempo la persiko iris en vesperan lernejon pri dommastrumado. Returnvoje sinjoro Smiles aperis kelkfoje. Li premis la knabinon en domniĉojn kaj parolis kun ŝi, etendinte ambaŭ brakojn dekstre kaj maldekstre de ŝi, kun la polmoj sur la muro. Ĉefe li fidis je tio, ke li odoras je kelkaj esencoj, kaj mem ne klopodis tro multe.
De kiam sinjorino Peachum flaris ion, ŝi unufoje monate traserĉis pli funde la tolaĵon de sia filino kaj ĉiumaniere

favoris sinjoron Beckett. Sinjoro Beckett estis lignokomercisto, viro kun solidaj principoj. Energie favorite de sinjorino Peachum li ŝovis sin en la antaŭon, ne nur ekstere. Al la altira forto de beleta viro li kontraŭmetis la ne malgrandan allogan forton de bonstata viro.
Lia ĉirkaŭpreno de la kokso dum dancado estis vere miriga por lignokomercisto. Ĉuste ĉi tiu feliĉo sekura, agnoskita de la patrino ŝajne havis gajajn abismojn. Tamen longtempe sinjoro Beckett ne sukcesis atingi pli multe ol tiajn publikajn intimaĵojn.
Lia handikapo kompare al sinjoro Smiles estis antaŭ ĉio, ke kiel multokupita negocisto li ne havis tiom da tempo kiel Smiles. Li ne povis ĉiam forlasi sian laboron.
Tamen li baldaŭ sentis, ke la familio Peachum estas inklina konsideri lin serioze. Bonŝance, li havis malpli multe da objetoj kontraŭ vera edziĝo ol ĉiu alia. Li invitis sinjorinon Peachum kaj ŝian filinon al malgranda pikniko sur Tamizo, kiu okazis iun dimanĉan antaŭtagmezon. Ĝia efektivigo preskaŭ ne eblis. Ĉar sabate posttagmeze ĉirkaŭ la kvina sinjoro Peachum venis hejmen en tre suferanta stato. Per kompatinda voĉo li postulis infuzaĵon de kamomilo, tuj enlitiĝis kaj ordonis al sia edzino meti brikon envolvitan en sekaj, varmegaj tukoj sur lian ventron.
De kelka tempo li implikiĝis en iu negoco ekstere de sia cetera agadsfero; temis pri iuj transportŝipoj. La afero ŝajne evoluis ne favore, kaj ekscitoj afekciis ĉe li la stomakon. Dimanĉe matene li ja estis ankoraŭ tre kaduka, sed tamen li iris kun edzino kaj filino en la preĝejon kaj poste por interkonsiliĝo. La virinoj havis bonŝancon: ŝajnis, ke li trafis en seriozajn malfacilaĵojn.
Sinjoro Beckett, kiu aperis en blanka kostumo, luprenis por la ekskurso „break"-on. Tio estis aera veturilo sur du altaj radoj kun nur du sidlokoj. La koĉero sidis sur benko malantaŭe supre.
Ne sen peno la lignokomercisto eltrovis veturilon kun tiel mallarĝa sidejo.
Dum la veturado sinjorino Peachum sin premis inter Beckett kaj Polly, sed el la korbo, kiu ankaŭ devis trovi lokon antaŭ la piedoj de la tri, eliĝis dum la pikniko krom ovoj, ŝinkaj sandviĉoj kaj kokaĵoj ankaŭ tri boteloj da likvoro, kaj tiel sinjoro Beckett bonŝance sukcesis sidiĝi apud la knabino dum la reveturo. Pluvis iomete; la lana kovraĵo, en kiu oni sin envolvis, ne tute sufiĉis, kaj sinjorino Peachum pelis la koĉeron per sia basvoĉo, ĉar jam la dua alproksimiĝis.
La adiaŭo de la du sinjorinoj antaŭ la „Sepio" estis mallonga, kaj oni ne faris pliajn interkonsentojn. Disiĝante la lignokomercisto staris en la sama sinteno antaŭ sia „break" kiel je la komenco de la malgranda veturo; sed li ne estis plu la sama viro.

Zigzage tra la mondo

Mi ĉiam admiris la inventemon de la homoj, sed mia admiro leviĝis ĝis kulmino, kiam mi eksciis pri organizo de la internaciaj vetkuroj de limakoj en Gundaroo (Aŭstralio) kaj plenentuziasme partoprenis (nur kiel rigardanto) Venkis aŭstralia limako el Canbery kun numero 806 surdorse, kiu trarampis dum 20 minutoj 182 centimetrojn.
Ŝajnas, ke per mia „eŭforio" por brila limaka sukceso, mi pekis kontraŭ certaj Esperantaj organizaĵoj, (sen ekskludo de iuj landaj MEM-sekcioj) kiuj dum la multjara agado trairis tamen kelkajn centimetrojn pli longan vojon ol la mondfama limaka ĉampiono. Se vi eĉ opinias, ke tio estis la vojo malantaŭen, ni riproĉu ilin. Moviĝo returnen ankaŭ bezonas tempon kaj forton.
Ni ne forgesu pri tio, ke modo „retro" subigis lasttempe al si la mondon. Ĝi invadis eĉ en la sferon de la intimaj homaj sentoj. Atestas pri tio la entuziasma akcepto flanke de gejunuloj kaj geolduloj, de la usona filmo „Love Story".
Unu el la filmentuziasmuloj – londona ĝardenisto Charlie (Ĉarli) Roberts eĉ elprovis en sia ĝardeno la influon de „Love Story" – muziko je kresko de plantoj. Li asertas, ke varmbedaj tomatoj pli rapide kreskas kaj maturiĝas, se en ilia proksimo aŭdiĝas diska muziko kaj kanzonoj el „Love Story".
Kaj inverse la samspeca kreskaĵo „protestas" per velkado kontraŭ la „fortebata", junulara muziko.
Mi tute ne miras. Ofte la tondra bruo kaj voĉtintado nomata moderna muziko, kapablas ne nur surdigi, sed ankaŭ „velkigi" (psike) la aŭskultanton, kvankam ne ĉiu estas kreskaje delikata.
Sed eĉ la plej sovaĝa kaj surdiga muziko efikas kiel anĝela fioro kompare kun rumoro, bruo, hurlo, tinto, raslo kaj krako de armiloj, penetrantaj el diversaj mondanguloj, kie laŭ la vortoj de Zamenhof „Popolo popolon atakas kruele – Frat' fraton atakas ŝakale . . .
Kaj, se oni povas forkuri aŭ ŝtopi la orelojn antaŭ la bruega, kriema muziko, per kiu nin regalas la filo aŭ filino, ni ne rajtas fari la samon vidalvide al armila raslo, eble prologo de la mondincendio.
Ni protestu per vortoj kaj agoj – kun larĝe malfermitaj okuloj, kun malŝtopitaj oreloj.
Eĉ guto malgranda konstante frapanta . . . asertis la Majstro. Ne pri la guto, sed pri plena glaso da freŝa akvo el la puto, petis junan knabinon en la korto de hindia vilaĝo Ŝaĥpur, (regiono Raĝa) studento Mandal – migranta sur motorbiciklo tra la mondo. Kiam ŝi plenumis la peton de la juna migrulo, ĉirkaŭis lin subite aro da lokaj junuloj firme postulantaj, ke li laŭmore edziĝu al la akvodonintino.
Antaŭ la neatendita edziĝo savis la studenton montro de dokumentoj pruvantaj, ke li jam estas edzo kaj patro de du infanoj. La juna homo estis tre kontenta, ke li ne renkontiĝis kun simila moro en Eŭropo. Tie ne malhelpus eĉ posedo de la edzina dekduo . . . Se jam pri strangaj moroj la parolo, ni menciu tiujn regantajn en Respubliko de Suda Afriko. Ministerio de Laboro en Pretoria devigis ĉiujn labordonantojn provizi per orelkovriloj la dungitaron laborantan en kondiĉoj de troa bruo.
Ke oni tamen ne forgesu, en kia lando tio okazis la Ministerio ordonis: kontraŭbruaj orelkovriloj havu kvar malsamajn kolorojn respektive por blankuloj, Afrikanoj, Hindoj kaj „koloruloj".
Alie povus al blankuloj minaci danĝero surmeti erare orelkovrilojn portataj de „malpura" nigrulo. Feliĉe la eventoj en Angolo montras, ke RSA registaro havas nun aliajn ĉagrenojn.

L. F -CR-

András Sugár

Ĉe komenco de nova, rapida prospero

Interparolo kun la prezidanto de la sovetaj esperantistoj en Moskvo

Magomed Isaev, la prezidanto de la komitato okupiĝanta pri la internaciaj interrilatoj de la sovetaj esperantistoj, estas 48-jara scienculo, devenanta el la Nord-Kaŭkaza oseta gento. La oseta kaj la tadjika lingvoj apartenas al la persa lingvo-familio. Tio estas la kaŭzo, ke Magomed jam de infanaĝo estis altirita al la studado de la iranaj lingvoj.
– *Al Esperanto mi venis per la lingvoscienco – li diras. – En mia libro „Lingvo kaj nacio" la lasta ĉapitro traktas la lingvon de la estonteco. En ĝi mi eksplikas, ke la internacia lingvo de la estonteco povos esti nek iu el la ekzistantaj naciaj lingvoj, nek la „natura" miksaĵo de la hodiaŭaj naciaj lingvoj. La kunfandiĝo de la disvolviĝintaj lingvoj estas praktike neebla. La ĝisnuna historio de Esperanto estas unusola grandega kaj sukcesa eksperimento: pruviĝis, ke artefarita lingvo estas vere ebla, ĝi ekzistas kaj floras. Miaj kolegoj sciencistoj ofte demandas, ĉu estas eble esperantigi ekz. Puŝkin-on. Kiam anstataŭ respondo mi deklamas al ili iun poemon de Puŝkin, ili kapitulacas. Belega – ili diras.*

Kaj ĉu la rusa lingvo?

– Kiel soveta homo, ĉu vi ne pensas, ke la rolo de la internacia lingvo atendas la rusan lingvon? – mi demandas.
– *Ne, nome pro pluraj principaj kaj praktikaj kaŭzoj. Lenin malaprobis ankaŭ tion, ke la rusa estu la ŝtata lingvo de Sovet-Unio. Rigardu, jen vi trovas en la 24a volumo de la Lenin-kolekto, sur la paĝo 294 la sekvantan artikolon de Lenin: „Ĉu estas necesa deviga ŝtata lingvo?" La deviga ŝtata lingvo estas bastono kaj per bastono oni povas peli neniun en la paradizon – skribas Lenin.*
La rusa restos ankaŭ plu la natura peranta lingvo inter la nacioj kaj gentoj en nia lando kaj mi scias, ke ankaŭ eksterlande multaj lernas ĝin. Sed la rolon de sola internacia lingvo ĝi ne povos ludi, same kiel nek la angla, nek la franca aŭ hispana.

Interlingvistiko?

– En la lingvoscienca instituto de la Soveta Scienca Akademio vi estas la prezidanto de la „grupo por la problemoj de la interlingvistiko". Pri kio okupiĝas tiu grupo?
– *Pri la demando de la internaciaj lingvoj. Nia grupo ekzamenis pli ol sescent projektojn kaj lingvo-sistemojn, inkluzive de Interlingua, Ido kaj diversajn natursciencajn eksperimentojn por la kreo de internacia faklingvo. Eĉ estis ankaŭ pluraj sovetaj aŭtoroj, kiuj kreis novan internacian lingvon. Ekzemple Juŝmanov, la elstara arabologo ellaboris artefaritan lingvon kun la nomo Etem (ekonomi tempor, energi, medi). Nia laborgrupo rifuzis ĉian provadon kaj konkludis, ke inter la 600 projektoj sole Esperanto estas vivkapabla, eĉ: perfekta internacia lingvo.*
– Kaj kio estas la „oficiala" opinio, se tia ekzistas?
– *La prezidantaro de la Scienca Akademio en 1973 faris decidon de historia signifo. Ĝi estis vera trabato tra la fonto. Tiam fondiĝis ankaŭ nia laborgrupo; pri ĝia konkludo pli frue mi jam parolis. Ekde la decido de la Scienca Akademio jam neniu povas nomi la esperantistojn iaj kapricaj hobiuloj aŭ stranguloj.*
– Jes, sed vi bone scias, ke la disvastiĝon de Esperanto oni ne povas efektivigi per decidoj. Ja multaj estas la obstakloj . . .
– *Rigardu, juna planto rapide disvolvas siajn branĉojn, kaj se la cirkonstancoj estas favoraj, ĝi bone kreskas. Sed se oni rompas la trunkon de la disvolviĝanta arbeto, poste multe pli malfacile ĝi kreskos plu.*
– Do, pli konkrete?
– *La nutra grundo de Esperanto estas la paco, la evoluo de la internaciaj rilatoj. En militaj tempoj malmultaj lernas internacian lingvon. La unua plago, kiu trafis Esperanton, estis la unua mondmilito. En nia lando tiun plagon ĝi rapide transvivis kaj post la revolucio ĝi bele ekprosperis. Poste denove venis tempoj pli malfacilaj, kaj nun mi ne pensas nur pri la konataj subjektivaj kialoj, sed unuavice pri la nova objektiva malfeliĉo: pri la dua mondmilito, kaj poste pri la jaroj de la malvarma milito. La komenco de la renesanco estis en 1957 la Renkonto de la Tutmonda Junularo en Moskvo, kiam ni formis junularan esperantistan grupon. De tiam la evoluo estas seninterrompa kaj rektalinia, sed pri tio ni tute ne povas esti kontentaj. Miaopinie en nia lando Esperanto staras ĝuste nun ĉe la komenco de sia florado, de sia plej granda evoluo.*
– Kial ĝuste nun?

Lingvokomisaroj

– *Mi klarigos ĝin. En la unuaj jardekoj de la soveta reĝimo oni devis oferi ĉiujn lingvistikajn fortojn, talenton kaj ambicion al la disvolvo de la 130 naciaj lingvoj de la lando. Dum dek jaroj per nekredebla energio oni kreis kvindek literaturajn lingvojn! Por komparo, jen la hodiaŭa Afriko, kiun ankaŭ vi bone konas: tie eĉ eksperimenton oni ne faras por krei la alfabetismon de kelkaj triboj kun centmil aŭ miliono da membroj, sed trudas devige la anglan aŭ francan lingvon, kvankam la plimulto de la loĝantaro eĉ ne komprenas ĝin. Ĉe ni la konstruado de la lingvoj estis same tiel grava ŝtata, eĉ partia tasko, kiel la industriigo. La gvidantoj de la lando, Kalinin, Mikojan kaj aliaj de tempo al tempo vojaĝis al la tero de tiu aŭ alia gento en ofico de „alfabetismo-kreaj komisaroj" (komisar po sozdanjiju pismennostji) kaj ekhavis literaturan lingvon ankaŭ multaj nacioj nombrantaj apenaŭ dutri mil animojn. Tiu laboro hodiaŭ estas jam sukcese finita. Ofte malgranda popolo simple rezignas pri sia literatura lingvo, ĝiaj lernejoj malpleniĝas, la gepatroj enskribigas siajn infanojn en lernejojn, kie oni instruas en lingvo de pli granda popolo.*

– Kie troviĝas tiaĵo?
– Ekzemple en la montaro Pamir dek gentoj kalkulis sume kvardekmil animojn. Ilia lingvo similas al la tadjika. Nun la ruŝana, la bartanga kaj ok aliaj gentoj – sen ajna desupra premo – decidis rezigni pri sia lingvo kaj aliĝi al la tadjika. Je la deziro de la gepatroj iliaj lernejoj jam pli frue iom post iom transiris al la tadjika. Ĉion ĉi mi rakontas, por ilustri, ke ĉe ni la problemo de la naciaj lingvoj jam solviĝis kaj la grandega lingvistika forto de dekmil sciencistoj, interesiĝantoj kaj amatoroj serĉas novan taskon. Niaj internaciaj interligoj floradas, la mondpaco regas de tridek jaroj kaj ĝiaj perspektivoj estas tre bonaj. Estas donitaj do ĉiuj kondiĉoj por la rapida prosperado de Esperanto kaj ĉiam pli oni sentas interesiĝon, la scivolon, eĉ, mi diras: la soifon de la publika opinio por nia lingvo.

Esperantistoj en USSR

– Kiom da esperantistoj vivas en Sovet-Unio?
– Neniu scias tion precize. La kreaĵon de Bokarev, la Esperanto-rusan vortaron, aperintan en sepdek-mil ekz-oj, dum minutoj oni disportis, kiel varmegan „pirojki"-on (buĥto farĉita per viando) en vintro... Lokaj radio- kaj televido-stacioj dissendas kursojn.
Li aldonis, ke jam maturiĝas la planoj pri la fondo de la Soveta Esperanto-Asocio. La populareco de la lingvo alternas laŭ regionoj. Estas strange, ke ekzemple unu el la plej grandaj esperantistaj centroj estas la Siberia urbo Barnaul – onidire en la caraj tempoj ekzilito disvastigis tie la lingvon. En Ufa, la ĉefurbo de Baŝkirio, la vespera gazeto publikigas kurson, en Baltiko plej antaŭe estas Litovio, sed ankaŭ Latvio kaj Estonio ne tre postrestas. Belajn rezultojn atingis la armenaj esperantistoj kaj interese, ke la moskvanoj estas nur en la tria-kvara loko. Multaj eldonoj aperas. Oni ofte publikigas en Esperanto la verkojn de Jesenin, Puŝkin, Ŝoloĥov kaj Gajdar, la oficialan materialon de la Soveta Komunista Partio kaj la paroladojn de Breĵnev. Ĝis nun oni sinkronizis tri filmojn en la internacian lingvon (Lenin; Mia Dagestano; La tero, kiun mi amas). Estas pretigata ankaŭ kvara filmo.
– Kun granda interesiĝo mi aŭdis pri la deklaro de kamarado Sándor Gáspár – li daŭrigas – kaj pri tio, ke la hungaraj sindikatoj volas fari Esperanton la interkomunika lingvo de la internacia laborista movado. Se tio sukcesos, baldaŭ oni komprenos, ke per tio – krom la ideaj avantaĝoj – oni povas efektivigi grandegan ŝparon de elspezoj! Tiu iniciato estas saĝa, kuraĝa kaj precipe: venis en ĝusta tempo, ĝi meritas ĉian apogon.
[El Hungara Vivo 4/75]

Gravaj artikoloj pri Esperanto en sovetaj ĵurnaloj

En la revuo „Kulturo kaj Vivo", kiu estas eldonata de la Asocio de sovetaj societoj por amikeco kaj kulturaj ligoj kun eksterlando (SSOD) kaj kiu aperas en la rusa, germana, angla, franca kaj hispana lingvoj, en 1975 aperis du ampleksaj kaj gravaj artikoloj pri Esperanto. En n-ro 1/75 (paĝo 44) D. Armand kaj S. Podkaminer sub la titolo „Esperanto" informas pri la praktika internacia apliko de la internacia lingvo. En n-ro 8/75 de la sama revuo la prezidanto de MEM, Nikola Aleksiev, amplekse traktas la agadon de MEM. En n-ro 44/1975 de „Nova Tempo", internacipolitika ĵurnalo de USSR, kiu aperadas en rusa, germana, angla, franca, hispana, pola, ĉeĥa kaj araba lingvoj, sur paĝo 30/31 d-ro M. Isaev, respondante al demando de leganto, amplekse argumentas ĝenerale por internacia planlingvo kaj substrekas la ĝisnunajn atingaĵojn de Esperanto. Li i.a. skribas (paĝo 31) „En USSR same estas entreprenataj esploroj pri la problemo de helplingvo por la internacia komunikado. Je la decido de la prezidio de la Akademio de Sciencoj de USSR tiu-ĉi laboro estis komisiita al la Instituto por Lingvoscienco. Tie estas fondita esplorgrupo pri demandoj de internacia helplingvo, kies gvidanto mi estas".

Universitata lernolibro

Kiel konate jam dek jarojn funkcias oficiale la fako Esperanto (lingvo kaj literaturo) en la Eötvös Loránd Universitato Budapest. Prof. d-ro Istvan Szerdahelyi ne nur gvidas la fakon kaj faras elstaran kaj unikan laboron en la universitatnivela instruado de Esperanto, li ankaŭ devas verki la bezonajn universitatnivelajn lernolibrojn, kiuj ĝis nun plene mankas en Esperanto. Aperis ĝis nun unu gramatiko kaj laste, en la jaro 1975 la ampleksa verko „Metodologio de Esperanto", verkita de la fakestro (Eötvös Loránd Tudományegyetem, Bölcsészettudományikar, Dr. Szerdahelyi István: Metodologio de Esperanto, Kézirat, Tankönyviadó, Budapest 1975, 378 paĝoj). La esperantlingva titolo estas „Metodologio de Lingvostudado kaj parolalproprigo". Tiu, ŝajne en vendejoj ne aĉetebla, scienca libro estas dividita en 5 partoj:

1-a parto: La teorio de lingvoinstruado
2-a parto: La selektado kaj segmentado de la lingva materialo
3-a parto: La programo de la organizado
4-a parto: La programo de instrueduka aktiveco
5-a parto: Esperanto en lernejoj (historia trarigardo).

La libro estas abunde provizita per tabeloj kaj skemoj. Sian multinformitacon la aŭtoro dokumentas per notoj kaj bibliografiaj indikoj sur pli ol 30 paĝoj. La libro (bezonanta de kompetentulo kritikan sciencan analizon kaj recenzon, ĉi-tie kontentige ne doneblan) estas unu el la ankoraŭ tro malmultaj provoj, verki pri Esperanto kiel scienca objekto. Kiel oni kun intereso ekscias (paĝo 343) estas planataj jenaj pliaj lernolibroj:

1. Literatura Krestomatio, la parto (1976)
2. Gramatikaj studoj (1976)
3. Interlingvistiko (1976)
4. Literatura Krestomatio, IIa parto (1977)
5. Interlingvistika Glosaro (1978)
6. Sistema Gramatiko (1978)
7. Literatura Krestomatio, IIIa parto (1979)
8. Historio de Esperanto-movado (1979)

La necesego de tiaj libroj certe evidentas. La jaro 1976 ŝajnas fariĝi tre fekunda. Ni atendas kun scivolemo la titolojn 1–3.

D. B.

Detlev Blanke

La antikvaj lingvoj kaj la problemo de internacia lingvo*

Pro la rapidega evoluo de la produktivaj fortoj en nia jarcento la kvanto de utiligendaj sciencaj informoj grave kreskas. Laŭ esploroj de UNESCO la duono de la sciencaj informoj estas publicita en lingvoj, kiujn la duono de la enketitaj scienculoj ne scipovas /1/. Do objektive ekzistas problemo de informado, kies komplikeco pligrandiĝas pro la kreskanta nombro de lingvoj gajnantaj internacian signifon. Pro tio estus dezirinde, ke demandoj de la raciigo de la internacia lingva komunikado pli ol ĝis nun incitu la intereson de la scienculoj, precipe de la prognozistoj, informatikistoj, heŭristikistoj kaj sciencteoriistoj. Tial la problemo de planlingvo estu pritraktata sobre, senemocie kaj sen antaŭjuĝoj.

Provoj, utiligi malnovajn lingvojn por la solvo de la problemo de internacia lingvo, povas esti diferencigitaj kiel sekvas:

1. Antikvaj lingvoj, plej ofte la latina, estis proponitaj kiel internacia lingvo ĉefe por la bezono de la scienculoj.
2. Antikvaj lingvoj, ĉefe la latina, estis plisimpligitaj por taŭgigi ilin por la funkcio de moderna internacia lingvo.
3. Estis konstruitaj lingvoprojektoj, kiuj leksike precipe konsideris la internacie uzatajn latinajn aŭ grekajn elementojn.

La limoj inter la 2a kaj 3a grupoj estas ofte fluantaj. La klopodoj pri reenkonduko de antikva lingvo, precipe de la latina, estas tre diversaj.

1. La latina kiel internacia lingvo

La fortega politika potenco de la Roma Imperio zorgis por la disvastigo de la latina en grandaj regionoj de suda kaj okcidenta Eŭropo, Proksima Oriento kaj norda Afriko. La lingvo de la konkerintoj larĝe forpremis la enlandajn lingvojn kaj tiamaniere fariĝis relative unueca komunikilo inter la romiaj kolonioj, kiu elradiis ekster tiujn regionojn kaj akiris internacian signifon. Post la disfalo de la Imperio en la 4a jarcento p.k. la mezlatina lingvo pluvivis kiel lingvo de la eklezio. Latino fariĝis la internacia lingvo de la eŭropaj diplomatoj, juristoj, scienculoj kaj administrantoj. La latina lingvo, ĝis fino de la mezepoko neniam serioze interrompita en sia lingva kontinuo /2/, facile kapablis adaptiĝi al la sociekonomiaj ŝanĝoj de la feŭdalismo (ĉefe rilate sian leksikon) kaj pruvis per tio sian grandan vivoforton. Tion ankaŭ atestas riĉa mezlatina literaturo.

La pozicio de la latina estis skuita nur, kiam en la XVIIa jarcento la evoluo de la produktivaj fortoj gvidis al formiĝo de la progresema burĝaro kaj kun tio de la eŭropaj nacioj. Racionalismo anstataŭis pli kaj pli skolastikon kaj mezepokan mistikismon. Komenciĝis la epoko de la naciaj lingvoj. En la jaro 1687 Christian Thomasius (1655–1728) en la universitato de Leipzig prelegis unuan fojon germanlingve. The Royal Society of London (Londona Reĝa Socio) uzis la anglan ekde sia fondiĝo en la jaro 1660, kaj 1710 sekvis la Academie

* Aperis germanlingve en „Das Altertum", Akademie-Verlag, Berlin 19 (1973) 3, p. 184–194. Tradukis: Linde Knöschke.

des Sciences (Akademio de la Sciencoj) en Paris, oficiale uzante la francan.
La mezepokaj humanistoj, kiuj kiel idealon rigardis la antikvan epokon, kritikis tiutempe la latinan de la mezepoko kaj denove preferis la klasikan latinon. Tio signifis la morton de la mezlatina. La rigide stilizita klasika latina malpli ol la pli fleksebla mezlatina taŭgis por la nomigo de la novevoluinta nociaro. Dum la plua historia evoluo la latina ĉiam malpli estis uzita kiel lingvo de la scienco. Ankaŭ la nombro de la devigaj latinlekcioj en la lernejoj ŝrumpis je minimumo. Ekde la XVIIa jarcento la latina estis perdinta sian signifon kiel internacia lingvo.
Aliflanke ni scias, ke la latina kiel unueca lingvosistimo spite al tiu historie kaŭzita evoluo ĝis hodiaŭ gardis certan seninterrompan tradicion pro sia uzo flanke de la katolika eklezio, kvankam la komunika valoro estas forte limigita. La enciklikoj de la papoj tradicie (sed ne ekskluzive) estas publicitaj en la latina lingvo. Radio Vatikano krom en 20 naciaj lingvoj ankaŭ disaŭdiĝas en la latina. Dum la IIa Vatikana koncilio oni debatis latine. Apartan signifon posedas la vivanta kiel internaciismoj kaj fakterminaroj latinida kaj greka vorttrezoro, kiu laŭ Eugen Wüster /3/ povus reprezenti unuecan terminologian partolingvon.
Do ne estas surprizo, kiam baze de tiuj faktoj ĝis la hodiaŭa tago troveblas klopodoj revivigi la latinan kiel internacian lingvon de la scienco. La ĉi-rilatajn strebojn fine de la XIXa kaj komence de la XXa jarcentoj resumas André /4/ kaj Kent /5/. Precipe menciindas M. Georg Henderson, kiu fine de la XIXa jarcento propagandis la klasikan latinon kiel internacian lingvon kaj eldonis la tute latine redaktitan ĵurnalon „Phoenix" /6/. La vortsekvo de la Hendersona Latino estis mezepoka, respektive pli moderna ol klasika. Serio da modernaj nocioj estis nove kreita, ekzemple Poŝta unio – unio postalis; vaporŝipo – naves vaporiae. 1845–1902 aperis, same tute latinlingve, en Philadelphia „Praeco Latinus" (Folia Gentium Latina Menstrua Litteraria ac Critica ed propagandum Sermonem Latinum, nec non ad fovendas Litteras Latinas) kiel ankaŭ en Romo 1898 „Vox Urbis" (de Litteris et bonis artibus commentarius). Ankaŭ en „Vox Urbis" ni trovas novkreaĵojn kiel „electrica lux" aŭ „loricata navis" (militŝipo). 1889–1914 aperis entute 10 diversaj latinlingvaj ĵurnaloj /6a/. Kiam 1922 antaŭ komisionoj de la Ligo de Nacioj oni disputis la „por kaj kontraŭ" de Esperanto, apartan pezon havis la ekspertizo de Gonzague de Reynold kontraŭ Esperanto kaj por la latina kiel internacia lingvo /7/. De Reynold pledis por plisimpligita mezepoka Latino, kies morfologio kaj sintakso estu regulitaj de internacia konferenco de filologoj. 1923 la Ligo de Nacioj enketis ĉe la germana regna ministerio por internaciaj aferoj, ĉu en Germanio en pli grava grado la latina kiel internacia lingvo estas praktikata, kion oni neis /8/. Ankaŭ en la ĵurnalo „Das Humanistische Gymnasium" fine de la respubliko de Weimar oni multe diskutis la demandon de Latino kiel internacia lingvo /9/.
Plej grandan intereson por „vivanta Latino" kompreneble montras la Vatikano. Sed en la de ĝi eldonita „Latinitas", la sola ĝis hodiaŭ aperanta en latina lingvo ĵurnalo, kaj en la vortaro de Antonio Baccis /10/ tre klare videblas la malfacileco de la traduko de modernaj nocioj en la latinan, ekzemple atombombo – pyrobolus; globus atomica vi displodens (fajroglobo, globo eksplodanta per atomforto), bombaviadilo – velivolus ignivomis globis verberans (aviadilo pafanta fajrovomantajn globojn), komunisto – aequandorum bonorum fautor (advokato por egaleco de la distribuo de havajoj).
En pli nova tempo apartan mencion meritas la adeptoj de „Latin vivant". Grupo da latinistoj, ekleziuloj kaj aliaj interesitaj je la vasta uzo de la latina scienculoj 1956 en Avignon, 1959 en Lyon kaj 1963 en Strasbourg /11/ aranĝis kongresojn, en kiuj, parte per la Latina de Cicero, estis diskutitaj demandoj de la pli vasta internacia uzo de la latina kaj la por tio necesaj antaŭkondiĉoj. La diversaj prelegoj pritraktis demandojn de la prononco, didaktikajn metodojn, morfologion, sintakson kaj leksikon. La ellaboritaj rekomendoj, i.a. pri intensivigo kaj modernigo de la instruado de la Latina, pri eldono de latinaj ĵurnaloj, pri fondo de specialaj lernejoj kun nura latinlingva instruado, estis internacie apenaŭ atentitaj, ĉar ili evidente ne harmoniis kun la sociaj bezonoj. Tiujn faktojn ankaŭ konsideras la instruado de la latina en la socialisma ŝtataro. J. Irmscher atentigas en sia publicita okaze de la kongreso en Avignon raporto, ke en la socialisma ŝtataro „la premisoj por la reuzado de la latina kiel vivanta lingvo estas relative malgrandaj, ĉar latininstruado en la gimnazioj, se ĝi ekzistas, nenie celas la parolkapablon, sed la receptivan alproprigon de la lingvo kaj la per ĝi peratajn edukvaloraĵojn" /12/. En la ĵurnalo „Gymnasium" Wassermann /13/ postulis similajn solvojn kiel la kongresoj „Latin vivant". Pri la kongreso 1956 en Avignon raportas en sama ĵurnalo Stricker /14/. Ankoraŭ 1966 J. M. Borovskij (Leningrad) publicis artikolon: „La latina kiel internacia lingvo de la scienco kaj la problemoj de la popolklerigo" kaj pledis denove por la enkonduko de la latina kiel internacia lingvo de la scienco /15/. Ankaŭ Irmscher 1970 atentigas pri tiu demando /16/.
Inter aliaj povas esti cititaj jenaj kialoj kontraŭ la reuzo de la latina kiel internacian lingvon:

a) La vorttrezoro de la Latina servis al la nomigo de nocioj, kiuj ekestis antaŭ du jarmiloj. La nomigo de modernaj nocioj per la ekzistanta vortmaterialo starigas komplikajn problemojn.
b) La kreado de neologismoj parte eblus, sed vide al lingva ekonomio, precizeco kaj oportuneco la nocinomigado fariĝus ĝenerala problemo. La ligita kun tio ampleksa kaj neevitebla interveno de lingvonormistoj egalus al plena transformo de la leksiko, ĉar la necesaj por la scienco multcentmilaj terminoj plej rapide postulus latinajn ekvivalentojn. La nomigo de modernaj nocioj, ekzemple el scienco kaj tekniko, tamen estas pli facile solvebla per moderna planlingvo. Tion Wüster /17/ ekzemple konvinke pruvis por Esperanto.
c) Se la strukturo de la latina restus netuŝita, tiu lingvo restus malfacile lernebla, kaj nur edukita elito ĝuus la privilegion regi ĝin. Larĝaj laborulaj tavoloj tiam apenaŭ povus partopreni la internacian komunikadon.

Kompreneble estas prave, ke la latinida leksiko ludas signifan rolon por la nomigado de novaj nocioj el scienco kaj tekniko. Kompreneble ĝi estas konsiderenda por la solvo de la problemo de internacia lingvo. Pri tio jam atentigis Otto Jespersen: „Ne necesas atentigi pri tio, ke la latina kulturo kaj per ĝi ankaŭ la latina lingvo per miloj da vojoj enpenetris la modernan vivon kaj ankoraŭ penetras. Neniu tion neas, kaj pro tio tutaj partoj de la latina lingvo nepre devas esti enkorpigitaj en la helplingvon de la estonteco – sed tamen nur tiuj partoj, kiuj pruvis sian vivkapablon por tio, ke ili daŭras pluvivi en la lingvoj hodiaŭ fakte parolataj –, tio estas la pruvilo pri bezoneco aŭ ne". /18/
Tiun principon konsideris multaj el la konstruintoj de planlingvoj, kvankam tre diversgrade.

2. Aliaj antikvaj lingvoj kiel ilo de internacia komunikado

Kvankam tre malpli ofte ol la latina ankaŭ la greka /19/ estis rekomendita kiel internacia, dua lingvo. O. Eichthal /19a/ (1864), Boltz (1888) /19b/, Flach (1889) /19c/, Kuhlenbeck (1889) /19d/ kaj post la dua mondmilito ankaŭ Christian /20/ proponis la grekan kiel „estontan lingvon de la scienculoj". F. Sack raportas en sia verko /21/, ke ankoraŭ post la dua mondmilito la „Greek Primary Teacher Association" en memorando al la „World Organisation of

Teaching Profession" estis rekomendinta la grekan kiel propagandindan mondlingvon /21/. Ekzistis eĉ proponoj por la funkcio de internacia lingvo, utiligi la hebrean /21a/, kaj eĉ Sanskrit /21b/.

3. Modernigo kaj plisimpligo de antikvaj lingvoj

Multaj interesitaj pri la praktika solvo de la problemo de mondlingvo scienculoj vidis en la plisimpligo aŭ „modernigo" de la latina vojon por la solvo de la problemo de multlingveco /22/. La „Macaronic-Latino" de la monako T. H. Folengo (1491–1544) estis satire plisimpligita mezepoka Latino kun aldono de ĉefe italaj vortoj: „Vado per hunc boschum solus chiamando aninam" (Mi migras sole tra tiu-ĉi arbaro vokante Giannina-n) /22a/. Ĝi laŭ Manders verŝajne ne celis esti mondlingvo, kvankam kiel tia en la interlingvistika literaturo prezentita /22b/. Ankaŭ Carpophorophilus (pseŭdonimo), germana scienculo, 1734 provis plisimpligi la latinan /22c/. Ekzemple li anstataŭis la deklinacion per artikolo (nom. – ha, gen. – he, dat. – hi, ak. – ho). La finaĵo de substantiva pluralo estis „-im" (domus/domusim). Verboj konjugiĝis regule kaj analitike. Fine de la XIXa jarcento amasiĝas la projektoj de plisimpligitaj Latinoj. 1890 Henderson skribis en sia „Latinesce": „Nostre Patre, qui esse in coele, sanctificate esse tue nomine" /22d/, kaj ankaŭ „Communia" de Stempfl forte memorigas Latinon: „mi credi, tu esere kontent" /22e/. Komparo de teksto de „Linguum Islianum" (Isly, 1901) /22f/ kun la latina originalaĵo same ilustras la klopodojn gardi la bazajn trajtojn de la latina. Linguum Islianum: „Canum, dum ferabat carnum, natans, per fluminum, videavit suum simulacrum in speculo lymphorum", kaj en latino: „Canis, per flumen carnem dum ferret natans, lympharum in speculo vidit simulacrum suum".
Tiuj kaj similaj provoj neniam akiris praktikan signifon. Sed „Latino sino flexione" /23/ (1903, la verko de la itala matematikprofesoro Guiseppe Peano), pli poste ankaŭ nomita „Interlingua" (ne miksenda kun la samnoma sistemo de Gode, 1951), preskaŭ du jardekojn vekis certan intereson.
„Latino" amplekse rezignas la komplikan latinan gramatikon. La verbo, ekzemple, malhavas fleksiojn de persono aŭ nombro (me habe, te habe, nos habe). La funkcion de deklinaj finaĵoj transprenas prepozicioj (vox populi = voce de populo). Ĉar Peano estis fiksinta la bazajn regulojn de sia lingvo tre ĝenerale, ekzistis samtempe pluraj varioj de „Latino". En ili estis publicita serio da sciencaj eseoj, ekz. pri matematiko, kaj ĵurnaloj /23a/. „Latino sine flexione" memorigas en multaj rilatoj al pli postaj naturalismaj projektoj (komparu ekzemple Gode), ĉefe ankaŭ pro tio, ĉar Peano grandskale transprenis neologismojn el modernaj romanidaj lingvoj, kion montras la sekvonta teksto: „Problema de lingua internationale es proximo ad solutione. Lingua definito per maximo de internationalitate non es lingua artificale. Suos elementos es plus diffuso et plus naturale, que in omni lingua nationale." /23b/
Projektoj celintaj la plisimpligon de la hebrea devenis de F. Lenz (Pasilingua Hebraica. Neuwied, 1887) kaj A. Nilson (Lasanebr, Gefle, 1897). 1907 La Grasserie publicis „La langue internationale pacifiste ou Apoléma" (Paris), projekton bazita je la greka (antrop – homo, hipp – ĉevalo, mi ecan crexia calo – mi havas belan apetiton). Ankaŭ tiuj projektoj sen ia signifo.

4. Latinidaj planlingvoj aŭ projektoj

Alie ol la sistemoj pritraktitaj en ĉapitro 3 tuta serio da projektoj ne apogas sin sur malnovlingvaj modeloj sed estas memstaraj sistemoj kun pli aŭ malpli normita gramatiko kaj plej ofte latinida leksiko.
El la ĉ. 700 projektoj, kiuj certe ekzistas ĝis nun, nur malmultaj estis kontrolitaj laŭ la praktiko: mallongan tempon „Volapük" (1879) /24/ (Vola = world, mondo; pük = speak, parolo, lingvo) de la prelato Schleyer el Baden; plengrade „Esperanto" (1887) /25/ de la pola okulkuracisto Zamenhof; en la dudekaj jaroj la projekto de „reformita" Esperanto, „Ido", (1907) /26/ verkita de Couturat /26a/, en tre limigita grado la naturalisma projekto de la balta matematikinstruisto de Wahl „Occidental-Interlingue" (1922) /27/ kaj „Interlingua" (1951) /28/, kiun aŭtoris la germandevena usonano Alexander Gode /28a/, komisiita de la „International Auxiliary Language Association". La plej multaj planlingvoj sekvas gramatike kaj vorttrezore nacilingvajn modelojn. Ili estas precipe:

a) Modifitaj malnovaj (komparu ĉap. 3) aŭ ankaŭ novaj lingvoj (ekz. Basic English de C. K. Ogden (1930) /29/.
b) Naturalismaj sistemoj, kiuj kvankam posedantaj plisimpligitan gramatikon tamen transprenas la relative malregulan vortfaradon de la romanaj lingvoj.
c) Sistemoj de skema aŭ aŭtonoma tipo, kiuj disponos kaj pri regulita gramatiko kaj pri regula produktiva sistemo de derivaĵoj el la plej ofte same romanaj radikoj.

La limoj inter tiuj grupoj ofte estas fluaj. La projektoj por planlingvoj de la XXa jarcento ene de la cititaj grupoj diferencas ĉiam malpli, tiom, ke oni kiel Jespersen, povas ofte paroli pri „dialektoj" aŭ varioj de certa baza tipo /29a/. Sube la grupoj b) kaj c) estu mallonge prezentataj.
Precipe la kripligo de nacilingvaj (ĉefe anglaj) vortoj en la unua, relative sukcesinta planlingvo „Volapük", kiu pro tio ofertis nur malgrandan memorsubtenon, instigis multajn aŭtorojn, elekti la leksikon ekskluzive laŭ nacilingva, ĉefe romana modelo. Unu el la unuaj sistemoj, „Mundolingue" (1890) de la iama Volapükisto J. Lott („la internacian lingvon ne necesas inventi – ĝi ekzistas; oni nur devas kolekti kaj ordigi ĉiujn ĝiajn vortojn") /29b/ pro tio kiel ĉiuj sekvintaj naturalismaj projektoj ĝis inkluzive „Interlingua" de Gode prezentiĝas kiel certa „altromana": „Amabil amico, con grand satisfaction mi ha lect tei letter de la mundo-lingue. Le possibilita de un universal lingue pro le civilisat nations ne esse dubitabil". La unua tiaspeca sistemo kun praktika signifo estas „Occidental" (pli poste nomita „Interlingue") de Edgar de Wahl (1922). „It" (t.e. la lingvo, D. B.) „deve basar se sur li international formes comun a nur europan lingues in fonetica, scritura metodes des expression ... do haves li aspect de un quasi natural lingue" /30/. „Quasi natural" ĉe ĉiuj naturalisme orientitaj projektoj signifas „romana" kio laŭ lingvoscienca vidpunkto ne povas esti iu defendebla kriterio.
Dum „Occidental-Interlingue" ankoraŭ disponas pri certaj eblecoj de aktiva vortfarado, „Interlingua" (1951, Gode) jam estas tiom „natura", ke la vortfarado sekvas pure romanajn modelojn respektive sin bazas je mezlatinaj formoj. La principoj de vortfarado estas nura etimologio de la latinidaj lingvoj kaj ne plu havas ian signifon por aktiva kaj regula vortfarado /30a/ Specimenoj de tekstoj montras la parencecon de tiu grupo de planlingvoj: Occidental (1922): „Ante comensar li discussion pri li punctus, quel separa nos, noi vole emfasar, que noi concorda ..." /30/.
Novial (O. Jespersen, 1928): „Ante ke nus comensa discusione pri li punctus kel separa nus, nus voli emfasa ke nus concorda ..." /30/
Interlingua (1951): „In le jornal de heri de vostre urbe io ha legite, que vos cerca un contorista" /31/.
La fakto, ke la tekstoj „a prime vista" (je la unua rigardo) estas kompreneblaj por homoj scipovantaj latinidajn lingvojn estas la ĉefa argumento de la reprezentantoj de tiuj lingvoj. Tamen tio ankoraŭ nenion atestas pri la lernfacileco, la flekseco de la lingvo rilate nomigadon de novaj nocioj aŭ pri ĝia uzebleco por reprezentantoj de nehindoĝermanaj lingvoj.

Kontraste al Occidental aŭ Interlingua (Gode) Esperanto sekvas la romanan modelon nur tiom, kiom al Zamenhof ŝajnis necese por la praktika, facila kaj tamen precize realigebla internacia komunikado. Transpreno de la komplika historia romana ortografio aŭ de la neregula sistemo de derivoj pro tio de si mem malpermesiĝis. Esperanto hodiaŭ estas la sola ekde pli ol 80 jaroj ĉiuflanke praktike elprovita planlingvo. La taŭgeco de ĝiaj konstruprincipoj por optimuma internacia komunikado estas facile kontrolebla laŭ ĝia konkreta aplikado en la diversaj sferoj de internaciaj kontaktoj /32/.

La plej gravaj karakterizaĵoj de Esperanto estas

1. regula ortografio
2. regula gramatiko kun reguloj validaj por la tuta sistemo
3. leksiko sin bazanta sur internacia kaj pro tio ĉefe romana vorttrezoro
4. regula, aktive uzebla kaj tutsisteme valida vortfarado

En la kadro de tiuj kvar ĉefkarakterizaĵoj moviĝas la reformoj de diversaj detaloj, kiuj kaŭzis la ekeston de „Ido“ kaj de kelkdek pluraj Esperantidoj.

„Ido“ ŝanĝis precipe la ortografion, leksikon kaj vortfaradon, sed ne tiom, ke parolantoj de ambaŭ sistemoj malkomprenus reciproke, kiel atestas sekva tekst-specimeno:

Esperanto (1887): „En la hieraŭa ĵurnalo de via urbo mi legis, ke vi serĉas kontoriston . . . “ /33/.

Ido (1907): „En la hierala jurnalo di via urbo mi lektis, ke vi serchas kontoristo . . .“ /34/.

La strukturo adaptita al la praktiko tamen ne estas la ĉefa kaŭzo por la ĝis nun unika sukceso de tiu internacia planlingvo. La sekvontaj kaŭzoj certe meritas mencion:

1. La oportuna lingvostrukturo kaj la aranĝitaj en ĝi riĉaj sed sistemkonvenaj eblecoj por evoluo
2. La evoluo de Esperanto dekomence gvidiĝis per praktika aplikado kaj ne per la arbitra volo de ĝia konstruinto.
3. Streĉoj per tradukoj de altnivelaj mondliteraturaĵoj kaj la eldono de multaj originalaj verkoj akcelis kaj stabiligis la evoluon de la lingvo.
4. La decida bazo por la stabila kaj unueca evoluo de Esperanto estis la akceptata jam 1905 deklaro pri la deviga valido de la „Fundamento de Esperanto“, la sistem-dokumento de Esperanto, kiu ofertis sufiĉe da movolibero por la evoluo de la lingvo laŭ la skizitaj vojoj.
5. Fine de la XIXa kaj komence de la XXa jarcentoj la utopie-pacifisma sed burĝe-humanisme orientita ideologa fono de la evoluo de Esperanto, kiu rudimente pluvivas ĝis hodiaŭ apud realisme orientita movado, kreis la necesan interligon de lingvo kaj socio.

5. Latinaj elementoj en la leksiko de Esperanto

La defendo de la latina vorttrezoro en planlingvo (O. Jespersen) ankaŭ validas por Esperanto. La vorttrezoro de Esperanto konsistas ĉefe el latinidaj (ekz. funkcio, instituto, labori, interesa), grekaj (geografio, teleskopo) aŭ el aliaj fontoj, baziĝantaj je internaciaj vortoj. La asimilado de internacie kutimaj vortoj estas unu el la plej gravaj leksikologiaj principoj de tiu lingvo kaj estas formulita jam en la 15a regulo de la „Fundamenta Gramatiko“: „La tiel nomataj vortoj fremdaj . . . estas uzataj en la lingvo Esperanto sen ŝanĝo ricevante nur la ortografion de tiu-ĉi lingvo.“ /35/. Modernaj vortoj kiel sputniko, kosmonaŭto (apud astronaŭto), komputero (apud komputoro) aŭ prognozo pro tio facile eniris Esperanton. Kaj en la studo pri la vorttrezoro de la „Universala vortaro“ de D. B. Gregor /36/ kaj en la „Naŭlingva leksikono“ /37/ de L. Bastien, kiuj esploras la vorttrezoron de 1893 respektive 1950, klare montriĝas la latinida karaktero de la Esperanto-leksiko. Gregor publicas kiel rezulton de sia analizo: anoj de la romana lingvofamilio scipovas kompreni 79,33 %, tiuj de la ĝermana lingvofamilio 62,05 % kaj parolantoj el la slava lingvofamilio 26,29 %. Kiom ajn dubindaj la detaloj de tiu-ĉi statistiko eble estus, ĝi tamen klare montras karakterizaĵon de la leksiko de Esperanto: ĝian latinidecon. La aperinta 1970 (kun 1300 paĝoj la ĝis nun plej ampleksa) „Plena Ilustrita Vortaro“ /38/ certe indus esti analizita laŭ tiu aspekto. Elektinte la leksikon, Zamenhof lasis sin gvidi laŭ la internacie disvastigitaj formoj, sed okaze ankaŭ revenis al latinaj.

Modrijan /39/ provas dokumenti rektan influon de la latina je Esperanto kaj konstatas konsiderindan nombron da akordoj. Laŭ tio, ekzemple, tuta serio de Esperanto-substantivoj samas al la 3a latina deklinacio (inter alie hirundo, homo, ordo). Fonetike esperantigita ni retrovas ekzemple: draco (drako), carbo (karbo), visio (vizio).

La karakteriza por la Esperanto-substantivo finaĵo „-o“ estas algluita al vortoj kiel ekzemple par, aer, odor, index (paro, aero, odoro, indekso).

Fonetike kaj ortografie adaptitaj aperas latinaj vortoj kiel ekz. exemplar (ekzemplero), arbor (arbo), culex (kulo), mares (maro), aqua (akvo).

Esperanto-adjektivoj ĉiam finiĝas je -a. Pro tio ekz. el bellus, -a, -um; densus, -a, -um; crudus, -a, -um; fariĝas bela, densa kaj kruda.

La Esperanto-finaĵo -e por derivitaj adverboj (ŝi kantas bele) ekzistas ankaŭ en la latina, ekz. necesse est (estas necese), facile est (estas facile). El la latina ne-derivitaj adverboj kiel nunc, cum, heri en Esperanto fariĝas nun, kun, hieraŭ. Tre multaj verboj en Esperanto estas kompareblaj kun latinaj formoj, ekz. el la 1a konjugacio admiri, gratuli, aklami (admirari, gratulari, acclamare), el la 2a konjugacio flori, persvadi, ekzerci (florere, persuadere, exercere).

Latinaj prepozicioj kiel apud, de, inter, pro, per, sub, super, trans, troviĝas kun simila signifo ankaŭ en Esperanto, same kiel, iomete ŝanĝite, antaŭ ĉirkaŭ, kontraŭ, kun, en, sen (ante, circa, contra, cum/con, in, sine).

Tiuj malmultaj ekzemploj validu kiel pruvo por la forta latinideco de Esperanto, latinideco, kiu estas unu el la kaŭzoj de la bonega internacia memorhelpo de Esperanto.

La prezento de vojoj kaj misvojoj de lingvoplanintoj certe estas plaĉa kaj instrua, tamen necesas dediĉi al la en la praktiko funkcianta Esperanto la meritatan atenton. Tio kondiĉas komprenеble forlason de serio da ne laŭtempaj antaŭjuĝoj kaj malkorektaj imagoj, evidente nesufiĉe kontrolitaj laŭ la praktiko. La neceso de nacia lingvoplanado ne plu povas esti kontestita. Internacia lingvoplanado, kontraŭe al tio, en multaj sferoj estas rigardata kiel nenecesa, ne dezirinda aŭ eĉ ne ebla. Marx kaj Engels rimarkas en „La germana ideologio“ /40/: „Ke la individuoj siaflanke komplete prenos sub sian kontrolon ankaŭ tiun produkton de sia specio (la lingvon, D. B.) kompreniĝas per si mem“. Pro kio tio ne validu ankaŭ por la internacia lingva komunikado?

Konsiderinda materialo, plejparte tute nekonata al neinterlingvistaj rondoj, atendas sian bibliografian prilaboron kaj uzon por la esploro.

6. Notoj

1. Scientific an Technical Translating and other Aspects of the Language Problem. UNESCO, Paris 1958, p. 13
2. J. Schneider: Gesellschaft und Sprache im Spiegel des mittellateinischen Wortschatzes; *En:* Zum Nachleben des Lateinischen in der Feudalgesellschaft, Berlin 1969, p. 20 kaj poste.
3. E. Wüster: Internationale Sprachnormung in der Technik, besonders in der Elektrotechnik (Die nationale Sprachnormung und ihre Verallgemeinerung), Bonn 1966, p. 420 kaj poste.
4. Ch. André: Le Latin et la problème de la langue internationale, Paris 1903
5. R. G. Kent: Latin as the International Auxiliary Language, *en* Classical Journal, Philadelphia, 18. 1. 1922, p. 38–44
6. Mario Pei: One Language for the World (and how to achieve it), New York 1961, p. 100 kaj poste, 2a eldono.

6a. cit. loko p. 100,
- C. Agostini - P. Marelli: Il latino lingua internazionale? Federacione Esperantista Italiana, Ufficio Informazioni, Documento N. 4, Milano 1959, p. 11 kaj poste
- E. Drezen: Historio de la mondolingvo, Tri jarcentoj de serĉado, dua Esperanto-eldono, Leipzig 1931, p. 88; p. 136 kaj poste

7. G. de Reynold: Le problème de la langue internationale (Bibliothèque Universelle et Revue de Genève), Genf 1925, p. 604-632, p. 745-769

8. Dokumentita ĉe R. Krug: Die Stellung des Mittel- und Neulatein an den deutschen höheren Schulen, fil. doktora dis., Berlin 1971, p. 80.

9. - W. Reichardt: Latein als Gelehrtensprache, Das humanistische Gymnasium, n-ro 39, 1928, n-ro 40, 1929;
- H. Lamer: Über den Ursprung der Apotheken. Latein als Sprache internationaler Kongresse, Das humanistische Gymnasium, n-ro 39, 1928.

10. A. Bacci: Lexicon eorum vocabularum quae difficilius latine reduntur, Typis Poliglottis Vaticanis 1949.

11. - Premier Congrès international pour le latin vivant, Avignon 1956, eldonita de E. Aubanel, Avignon, sen jaro
- 2ième congrès international pour le latin vivant, Lyon-Villeur-banne 1959, eldonita de E. Aubanel, Avignon, sen jaro.

12. Komparu 2-ème congrès . . ., samloke, 174

13. F. Wassermann: Weltsprache Latein und der Russisch-Chinesische Vertrag von Nertschinsk, Gymnasium n-ro 61, 1954, p. 439-441.

14. F. Stricker: Der internationale Kongreß für lebendiges Latein in Avignon (traduko de ne citita franca fonto), Gymnasium n-ro 63, 1956, 544-547.

15. M. Borovski: Latinskij jazyk kak meždunarodnyj jazyk nauki i voprosy narodnogo obrazovanija
(La latina kiel internacia lingvo de la scienco kaj la demandoj de la popoledukado) en: Jazyk i stil' antičnych pisatelej, Leningrad 1966, 17-25, komparu Bibliotheca Classica Orientalis n-ro 13, 1968, p. 380 kaj poste.

16. J. Irmscher: Latein als internationale Sprache? Horizont, Berlin, n-ro 45/1970 (1. Nov.)

17. Komparu Wüster, cit. loko

18. O. Jespersen: Eine internationale Sprache, Heidelberg 1928, p. 9

19. Rilate tion komparu: L. Couturat - L. Leáu, Histoire de la langue universelle, Paris 1903
A. Guérard: A. short history of the International Language Movement, London 1922
E. Drezen: Historio . . . cit. loko
M. Pei: cit. loko

19a. Eichtal, G.: De l'usage praktique de la langue greque, Paris 1864

19b. Boltz, August: Hellenisch, die allgemeine Gelehrtensprache der Zukunft, Berlin/Leipzig 1888

19c. Flach, Johann: Der Hellenismus der Zukunft, Leipzig 1889

19d. Kuhlenbeck, Ludwig: Das Problem einer internationalen Gelehrtensprache und der Hellenismus der Zukunft, Leipzig 1889

20. M. D. Christian: Greek as an International Language, New York, 1946

21. F. L. Sach: The Problem of an International Language, Washington 1951

21a. Le Dain, A.: La linguistique vulgarisée, Paris 1886, p. 9

21b. Monnerot-Dumaine, M.: Précis l'interlinguistique générale et speciale, Libraire Maloine, Paris 1960, p. 18

22. Komparu: L. Couturat - L. Léau: cit. loko
A. Guérard: cit. loko, p. 57-71

22a. Komp. Nodier, C.: Du Langage factice appelé macaronique, Paris, Techner 1834
Komp. E. Drezen: Historio, cit. loko

22b. Komp. Manders, W.: „Latino macaronico" en Esperantologio, Kopenhago, vol. II, 2, p. 136 kaj poste
M. Pei: cit. loko

22c. Komp. Couturat, L./Léau, L.: cit. loko, p. 23-24

22d. Henderson, G.: Latinized English (Latinesce) The Referce, London, Jan. 1909

22e. Stempfl, J.: Communia oder internationale Verkehrssprache, Kempten, 1894

22f. Isly, Fred: Langue Isly (lignum islianium), Projet de Langue internationale, Paris 1901

23. G. Peano: De Latino sine flexione, La Revue de Mathematique, n-ro 8, 1903

23a. kp. Drezen, E.: Pri problemo de internaciigo de sciencteknika terminaro, Moskvo-Amsterdam (Standardgiz, EKRELO) 1935, p. 8

23b. Drezen, E.: Historio . . . cit. loko, p. 138

24. M. Schleyer: Volapük, die Weltsprache. Entwurf einer Universalsprache aller Gebildeten der ganzen Erde, Sigmaringen 1880

25. (Zamenhof) Dr. Esperanto; Meŝdunarodnij jazyk. Predislovie i polnij učebnik, Warszawa 1887

26. L. de Beaufront: Kompleta Gramatiko Detaloza di la Linguo Internaciona Ido, Esch 1925

26a. Kiel R. Berger pruvis ne L. de Beaufront sed Louis Couturat estas la vera aŭtoro de Ido, kp. Li ver historie del lingue international *en* Cosmoglotta, Nr. 5 (116), aŭgust 1937

27. E. Pigal: Occidental, die Weltsprache, Stuttgart 1930

28. A. Gode - E. Blair: Interlingua, A. Grammar of the International Language, New York 1951

28a. Estas granda farso aserti, ke Interlingua estas „kolektiva kreaĵo" de la lingvista societo IALA. Fakte Gode aŭtoris la lingvon laŭ sia imago. Kp. Cosmoglotta n-roj 258 (januaro/marto 1970), 259 (aprilo/junio 1970)

29. C. K. Ogden: The ABC of Basic English, London 1936

29a. Kp. Jespersen: cit. loko, p. 34

29b. Kp. Drezen, E.: Historio . . . cit. loko, p. 154

30. E. de Wahl - O. Jespersen: Discussiones inter E. de Wahl e O. Jespersen, Chapelle-Schweiz, 1935, p. 4.

30a. Kp.-La kritikojn i.a. de Wüster, cit. loko p. 336-342; - Manders, W.: Interlingvistiko kaj esperantologio, Purmerend, 1950, p. 20 ktp.; - Gilbert, W.: Planlingvaj problemoj, La Laguna (Stafeto) 1962

31. En la ĵurnalo de via urbo de hieraŭ mi legis, ke vi serĉas kontoriston. cit. laŭ Waringhien, G.: Lingvo kaj vivo, La Laguna 1959, p. 102

32. Kp. I. Lapenna, U. Lins, T. Carlevaro: Esperanto en perspektivo, London - Rotterdam 1974

33. Komparu citaĵon 30

34. Komparu citaĵon 30

35. L. L. Zamenhof: Fundamento de Esperanto, naŭa eldono kun enkondukoj, Notoj kaj Lingvaj Rimarkoj de d-ro A. Albauld, Esperantaj Francaj Eldonoj, Marmande 1963, p. 67, koncizige tradukita el la germana originalo.
La esperanta versio cit. laŭ L. L. Zamenhof: Unuaj libroj por esperantistoj, eldonejo Ludovikito, Kameoko (Japanio), 1973, paĝo 39

36. D. B. Greogor: La fontoj de Esperanto, Scienca Revuo, n-ro 9, 1958, p. 92-115

37. L. Bastien: Naŭlingva etimologia leksikono, London 1950

38. „Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto", SAT, Paris 1970, komparu mian recenzon *en* Zeitschrift für Phonetik, Sprachwissenschaft und Kommunikationswissenschaft, Berlin 1973, nr. 1-2, paĝoj 144-150

39. F. Modrijan: Elementoj latinaj en Esperanto, Ljubljana 1940

40. K. Marx - F. Engels: Die deutsche Ideologie, Berlin 1960, p. 448

JOZEFO PETRIN

La 30an de novembro 1975 forpasis Jozefo Petrin, prezidanto de la Rumana Kunordiga Esperanto-Komitato.

Jozefo Petrin naskiĝis je la 15a de novembro 1905 en la urbo Piatra-Neamt. Licenciulo de la estinta Akademio pri altaj studoj komercaj kaj industriaj, li estis profesie kontekseperto kaj ekonomiisto. En tiu fako, li funkciis dum longa periodo en la Ministerio de Instruado kaj Kulturo kaj lasttempe, ĝis sia pensiiĝo (1968) kaj ankaŭ poste, en la Konsilantaro de Socialisma Kulturo kaj Edukado. Jozefo Petrin esperantistiĝis en la jaro 1928 kaj de tiam ĝis sia lasta spiro li senlace laboris por nia nobla idealo. Eminenta esperantisto, li estis, post la dua mondmilito, la centra figuro de la rumana Esperanto-movado. Vicprezidanto de la Rumana Esperantista Societo dum la unuaj postmilitaj jaroj, li estis elektita poste, en la novaj organizaj etapoj, prezidanto de la Iniciata Komitato por Esperanto de la Rumana Popola Respubliko (1957) kaj de la Rumana Kunordiga Esperanto-Komitato (1970). Li reprezentis kompetente la rumanan esperantistaron ĉe diversaj internaciaj renkontiĝoj, interalie ĉe la Universalaj Kongresoj en Varsovio (1959), Sofio (1963), Budapeŝto (1966) kaj Londono (1971), al kiuj li alportis la salutparolon de nia movado.

La agado de Jozefo Petrin estis diversflankaj: kursoj, lernolibroj, vortaroj, didaktikaj kaj esperantologiaj studoj. Speciale notindaj estas liaj tradukoj el la verkoj de la plej famaj rumanaj poetoj. Krome, li mem verkis esperantlingve.

La lastajn jarojn li okupiĝis pri la traduko kaj prezentado, kun rimarkindaj sukcesoj, de diversaj rumanaj pupteatraĵoj ĉe la Pupteatra Internacia Festivalo en Zagrebo.

Li estis membro de Rumana Komunista Partio ekde 1946. Pro siaj meritoj, li ricevis la Labor-Medalon.

Nobla karaktero, progresema, modesta kaj simpatia, Jozefo Petrin estis, dum sia tuta vivo, modelo de vera esperantisto. Lia forpaso estas granda perdo, malfacile plenigebla, por nia Esperanto-movado.

Ni sekvu lian ekzemplon kaj daŭrigu lian agadon.

(Sendita de vicprezidanto
de la Rumana Kunordiga
Esperanto-Komitato Aurel Boia)

Jozef Petrin

La rolo de prepozicioj en Esperanto

1. Pri la prepozicioj la „Fundamento de Esperanto", en la gramatikaj reguloj 2, 8, 11, 13, 14, en la ekzercoj 28–29 kaj en la vortaro, donas jenajn indikojn:

a) La prepozicioj – kiuj havas definitan kaj konstantan signifon – estas: *al, anstataŭ, antaŭ, apud, ĉe, ĉirkaŭ, da, de, dum, ekster, el, en, ĝis, inter, kontraŭ, krom, kun, laŭ, malgraŭ, per, por post, preter, pri, pro, sen, sub, super, sur, tra, trans.*

b) Ekzistas nur du kazoj: nominativo kaj akuzativo; la ceteraj kazoj (el aliaj lingvoj) estas esprimataj per helpo de prepozicioj. La prepozicioj staras antaŭ substantivoj (aŭ ĝiaj egalvaloraj: adjektivo kun subkomprenata substantivo kaj pronomoj) kaj postulas la kazon nominativo (do, en Esperanto ne ekzistas la kazo „prepozitivo").

c) Por montri la direkton (aŭ almovon, aŭ translokiĝon) la substantivo ricevas la finiĝon „n" eĉ se ĝi havas antaŭstarantan prepozicion (krom „al" kaj „ĝis", kiuj per si mem montras direkton). Ekzemploj: La hirundoj flugis trans la riveron (al loko trans la rivero), ĉar trans la rivero (en tiu loko) sin trovis aliaj hirundoj;
Traduki libron en Esperanton (en E-o signifus „kiu estas en E-o"!)

d) Kiam la rekta senco ne montras al ni, nome kian prepozicion ni devas preni, tiam ni uzas la prepozicion „je", kiu estas anstataŭebla per la akuzativo sen prepozicio. Ekzemploj: Mi ridas je (pro) lia naiveco (= mi ridas lian naivecon); Obei al la patro (= obei la patron); Responde al via letero (= responde vian leteron).

2. La prepozicioj ne havas per si mem sintaksan valoron, sed ili nur enkondukas ĉefe substantivan komplementon (malrektan, disvolvitan aŭ sub influo de prepozicio) kaj montras, kiun rilaton havas la substantiva komplemento al subjekto, al predikato, aŭ al alia komplemento malsamspeca. Ekzemploj: La patro (subjekto) de Johano (komplemento klariga) dankas (predikato simpla) al Teodoro (komplemento klariga) pro la libro (komplemento cirkonstanca kaŭza).

La substantivo kun antaŭstaranta prepozicio povas esti ankaŭ nomo predikata. Ekzemple: Li estas en kolera humoro (= li estas kolerhumora).

3. Kiam la kunteksto kaj la logika esprimmaniero permesas, la prepozicioj estas anstataŭeblaj per la finiĝo „n", aŭ per finiĝoj adjektivaj, respektive adverbaj:

dum (en) ĉiu tago = ĉiun tagon
= ĉiutage
verko de Zamenhof = Zamenhofa verko
teksaĵo el lano = teksaĵo lana
labori kun fervoro = labori fervore
en komparo kun (al) = kompare al.

Tio signifas, ke oni povas transformi la komplementojn malrektajn (aŭ formojn disvolvitajn aŭ sub influo de prepozicio, aŭ formojn analizajn), en komplementojn rektajn (en formojn simplajn aŭ sintezajn).
Sekve de tio – kaj sekve de la fakto, ke la komplemento objekta (indikanta la suferanton de la ago) havas ĉiam la finiĝon „n", – la vortordo en Esperanto estas tute libera kaj oni povas facile variigi la stilon.

4. Iuj prepozicioj havas rolon de konjunkcioj: antaŭ verboj, aŭ kiam ili kunligas du samspecajn komplementojn aŭ du samspecajn prepoziciojn (esprimataj aŭ subkomprenataj). En tiaj okazoj la prepozicioj anstataŭas alian konjunkcian parolturnon. Ekzemploj: *Ni kunvenis por priparoli* (= por ke ni priparolu); *Li foriris sen diri ion* (= sen ke li diru ion); *Li parolas anstataŭ aŭskulti* (= anstataŭ ke li aŭskultu); *Li kuris ĝis li laciĝis* (= ĝis kiam li laciĝis).
En tiaj okazoj post la prepozicio povas sekvi substantivo en akuzativo, eĉ se ne temas pri direkto aŭ pri anstataŭigo de prepozicio. Ekzemploj: *Ni trinkis vinon antaŭ bieron* (antaŭ ol trinki bieron); *Anstataŭ kafon, ni trinkis lakton* (= anstataŭ trinki kafon, ni trinkis ...).

5. La prepozicioj antaŭ adverboj (lokaj aŭ tempaj) havas rolon de *adverboj:* kune kun la adverboj ili formas novan adverban parolturnon kun nova leksika senco. Ekzemploj: *Ĉiam signifas „en ĉiu tempo", sed por ĉiam signifas „por ĉiu tempo"; Tie signifas „en tiu loko", sed tien, „al tiu loko"; De tie signifas „de tiu loko".*

6. La prepozicioj *po, ĉirkaŭ, super* kaj similaj, antaŭ numeraloj (adjektivaj), kiuj determinas substantivojn, rilatas fakte al numeralo, – kaj ne al substantivo. En tiaj okazoj la prepozicio estas *adverbo* (anstataŭas alian adverbon) kaj post ĝi povas sekvi substantivo en akuzativo. Ekzemploj: *Mi atendis ĉirkaŭ (proksimume) du horojn; Ĝi pezas super (pli multe ol) 15 tunojn; Ili ricevis po (ĉiu el ili aparte) tri porciojn.* Tamen, praktike, la senco ne suferas, se oni forlasas la akuzativon ĉe determinanta substantivo.

7. La prepozicioj *de, al el,* ĝis estas konsiderataj *de movo* antaŭ aliaj prepozicioj lokaj. Ekzemplo: *La kato kuris de sub la lito ĝis antaŭ la pordo.*
En tiaj okazoj nur la prepozicio al estas anstataŭebla per akuzativo. Ekzemplo: *La kato kuris al sub la lito (= kuris sub la liton).*
Kiam la dua prepozicio staras antaŭ adverbo, tiam la grupo estas adverba parolturno. Ekzemplo: *De post tiam (= de post tiu tempo).*

8. La prepozicioj estas uzataj en *vortformado:* per aliklasigo (t.e. ŝanĝo aŭ aldono de gramatika finiĝo) kaj per kunigo kun radikvortoj aŭ kun sufiksoj.
La vortkunmetado kun prepozicioj okazas konforme al 11a regulo fundamenta, laŭ kiu „la kunmetitaj vortoj estas formataj per simpla kunigo de vortoj (la ĉefa vorto staras en la fino); la gramatikaj finiĝoj estas rigardataj ankaŭ kiel memstaraj vortoj".
Estas malprave konsideri la prepoziciojn kiel „kvazaŭ-prefiksoj", ĉar la Esperantaj prepozicioj havas en kunmetaĵoj pli grandan produktivecon formante novan leksikan unuon, dum la prefiksoj havas ĉiam la saman signifon.

9. La prepozicioj utiligataj kiel memstaraj vorteroj estas aliklasigataj per

alglu o de gramatikaj finiĝoj; ili estas tiel transformeblaj en sintezaj *o, -a, -i, -e*, vortoj, kies konkreta senco estas subkomprenata, sed esprimebla en samsignifa disvolvita formo. Ekzemploj: *ĉirkaŭo* (spaco, kiu estas ĉirkaŭ iu loko), *ekstero* (loko, kiu estas ekster io); *antaŭa* (kiu estas antaŭ io), *kroma* (kiu estas krom io; plia), *ene* (interne), *kontraŭe* (spite; male; en kontraŭa loko aŭ maniero), *anstataŭi* (esti en anstataŭa loko aŭ rolo), *superi* (esti supera; pasi aŭ agi supere).


10. *La sufiksoj algluitaj al prepozicioj* konservas sian propran leksikan signifon, sed donas al prepozicio pli grandan leksikan produktivecon. Ekzemploj: *Aliĝi* (iĝi ano al; iĝi ale al io; aniĝi; kuniĝi), *anstataŭigi* (igi, ke io estu anstataŭa; meti en lokon de alia), *subulo* (ulo subordigata al alia), *ĉirkaŭaĵo* (parto, kiu estas ĉirkaŭ iu loko), *senigi* (igi sene; liberigi de io), *transigilo* (ilo transiga; relŝanĝilo), *peranto* (tiu, kiu helpas aŭ intervenas).
Oni rimarku, ke en tiaj vortkunmetaĵoj la prepozicioj aliklasiĝas: kun verbaj sufiksoj ili rolas kiel adverboj, – kun substantivaj sufiksoj ili rolas kiel adjektivoj.

11. En kunmetaĵoj *kun verbaj ĉefvortoj*, kiam la tuta vortkunmetaĵo konservas la verban kategoriecon, tiam la prepozicio estas aliklasigata, funkcianta kiel adverbo; en aliaj okazoj la prepozicio anstataŭas alian adverbon aŭ tutan vortgrupon; alifoje ĝi transitivigas la verban ĉefvorton, aŭ esprimas verban aspekton de ĝisfina, kompleta ago. Ekzemploj: *Antaŭvidi* (vidi aŭ scii antaŭe, aŭ en antaŭa tempo), *antaŭenvidi* (vidi en antaŭan lokon), *eldoni* (doni ele el io; publikigi por disvendo), *ellerni* (lerni profunde, komplete), *interkonsenti* (konsenti reciproke), *priplanti* (planti komplete, tutan surfacon), *subaĉeti* (aĉeti iun por subigi aŭ korupti), *trabori* (tutbori; bori de komenco ĝis fino).
En tiaj okazoj la tuta vortkunmetaĵo povas esti aliklasigata aŭ ricevi sufiksojn. Ekzemploj: *Enhavo, subaĉeto, apudstaranta* (kiu staras apude), *elĉerpiĝi* (iĝi elĉerpita), *algluigi* (igi algluata).
La prepozicio estas aliklasigata ankaŭ en kunmetaĵoj kun verboj formataj el substantivoj aŭ adjektivoj kun „igi-iĝi", do kiam temas pri
Prepozicio + Substantivo aŭ Adjektivo + igi – iĝi
Ekzemploj: *Kunordigi* (ordigi en kuna maniero), *enkorpiĝi* (korpiĝi ene en), *transformiĝi* (iĝi transe formata; formiĝi transen).

12. En *kunmetaĵoj kun substantivoj* – kaj kelkfoje ankaŭ kun aliaj radikvortoj – la prepozicio konservas sian gramatikan kategoriecon (aŭ valoron) sed postulas la *aliklasigon de la ĉefvorto*. Tiuokaze la tuta vortkunmetaĵo funkcias devige kiel adjektivo aŭ kiel adverbo. Ekzemploj: Oni ne povas diri „laŭbezono", sed nur „laŭ bezono", aŭ laŭbezone (en maniero laŭ bezono), – oni ne povas diri „porpaco", sed porpaca (kiu estas por la paco), – oni ne povas diri „porĉiam", sed porĉiama (kiu estas por ĉiam), dumviva (kiu estas dum vivo), perforte (per forta maniero).
Ĉi tiuj kunmetaĵoj povas ricevi sufiksojn – precipe „igi – iĝi" – kaj tiuokaze temas pri formoj:
Prepozicio + Substantivo + igi – iĝi
Ekzemploj: *Entombigi* (enigi aŭ meti en tombon), *senvestigi* (igi ke iu estu sen vestoj), *interfratiĝi* (iĝi samkiel inter fratoj), *porvivaĵo* (aĵo necesa por vivi), *senfineco* (la eco aŭ kvalito esti senfina), *senharulo* (ulo aŭ individuo, kiu estas sen haroj).

13. La kunmetaĵoj, en kiuj la prepozicio konservas sian gramatikan valoron, kaj la ĉefvorto (do, la tuta kunmetaĵo) estas devige aliklasigata (kiel ĉe punkto 12 supra) – ne povas esti uzataj je neceso ankaŭ kun la gramatika finiĝo de la vortklaso, al kiu apartenas (laŭ naturo kaj laŭ logiko) la ĉefvorto. En tiaj okazoj temas fakte pri la *returnebleco de Esperantaj kunmetaĵoj* (spite la atakojn de kontraŭloj de Esperanto, kiuj asertas, ke ne ekzistas la returnebleco en Esperanto): la tuta kunmetaĵo estas *retroklasigata* (revenas al gramatika valoro de la ĉefvorto), sed kun nova (supera) leksika senco. Ĉe tia retroklasigo temas pri „alia vorto konkreta, sekvata de la ideo esprimata per tuta kunmetaĵo". Ekzemploj: *Antaŭĉambro* (vestiblo; atendejo, kiu estas antaŭ iu ĉambro), *interakto* (paŭzo inter du aktoj), *surtuto* (vesto, kiu estas aŭ oni metas sur tuto aŭ super aliaj vestoj), kromfolio (aldono krom la folio), *ĉirkaŭbrako* (ornamaĵo ĉirkaŭbraka, aŭ kiu ĉirkaŭas la brakon), *ĝisvivi* (atingi eventon ĝis aŭ dum la vivo), *perlabori* (akiri ion per laboro), *perflati* (obteni ion per flato).

Konklude, la prepozicioj – kvankam ili havas konstantan kaj definitan signifon – havas grandan leksikan produktivecon. Depende de ilia memstara signifo kaj de la gramatika kategorieco, al kiu apartenas la vorto, kiun ili enkondukas, aŭ kun kiu ili estas kunigataj, la prepozicioj povas havi ankaŭ rolon de adverboj kaj de konjukcioj; en vortkunmetaĵoj unu el la vortpartoj – ĉu la prepozicio, ĉu la ĉefvorto – estas devige aliklasigata. Kiam la ĉefvorto estas aliklasigata, kaj ne la prepozicio, – tiam la tuta kunmetaĵo povas esti retroklasigata, akirante novan leksikan sencon (alia konkreta vorto, sekvata de kunmetaĵa radikvorto kiel determinanto).



Etnografiaj Donitaĵoj

La ampleksa broŝuro celas konatigi kun la etnografia strukturo kaj problemoj de Vjetnamio. Ĝi same komprenigas specifikon de socialisma revolucio en tiu multnacia lando. Oni ekscias, ke en Vjetnamio ekzistas 60 malsamaj etniaj grupoj, kiuj parolas parte ĉin-tibetajn kaj parte aŭstral-aziajn lingvojn. La pli multa popolo estas la viet-anoj, kiuj loĝas en ebenaj regionoj ĉe la Ruĝa Riverego, Mekongo kaj marbordo. La malplimultaj popoloj loĝas en montaraj regiono, kiuj okupas $^{2}/_{3}$ de l'lando. Speciale la minoritatoj vivis en mizero, malklereco kaj estis minacitaj per ekstermado dum la kolonia superregado. La liberigo de Nord-Vjetnamio (1954) kaj la elekto de socialisma vojo ebligis restrukturigi la materian kaj spiritan vivon de ĉiu etnio, renoviĝo de ilia socia vivo. La politiko de la Vjetnama Laboristara Partio kaj registaro de VDR celis realigi unuiĝon, interhelpon kaj egalecon inter la naciecoj.
La broŝuro prezentas studojn pri la etniaj grupoj, kies loĝloko troviĝas ĉefe en nord-okcidento de VDR.
La faktojn pri specifikeco kaj prospero de la vjetnamaj popoloj, kiujn prezentas la libro, estas rezulto de longjara esplorado, ankaŭ dum la usona agreso-milito. Ĝi enhavas tezojn pri deveno, konatigas kun kultformoj, kun specialecoj de la lingvoj, kun historio, indikas pri loĝ-kaj vivmanieroj, priskribas domkonstruon, popolarton kaj ilaron.

Rudolf Hahlbohm

Panoramo –

printempo 1975 – Literatura almanako de STARTO, organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, Red. O. Kníchal. 36 p. Fotomekanike multobligita. Prago 1975

Jen libreto, kiu vere meritas sian nomon „Panoramo", ĉar por ĉiu, ĝi prezentas impresan panoramon pri variaj partoj el la riĉa fonduso de la ĉeĥa literaturo.

Omaĝe al la liberiĝo antaŭ tridek jaroj ĉekape troviĝas tri eroj el la verko de Doc. Václav Jíša „Paseo de la futuro", en kiuj la situacio en la postmilita Ĉeĥoslovakio estas montrita. Ĉiu el la tri eroj („Venko", „Nova Socio" kaj „Laborista Prezidento") konsistas el du partoj, el eseo kaj el samtitola soneto kiel poezia komento.

La duavicaj kontribuaĵoj okupiĝas pri Stanislav Kostka Neumann, granda revolucia poeto ĉeĥa, internaciisto kaj elstara ĉeĥa Esperanto-pioniro (1874–1947). Ni trovas lian flaman alvokon al internacia sentado kaj unuiĝo el 1922, rememorojn pri li kiel unu el la unuaj komitatanoj de la Esperantista Klubo en Prago (1902) far D-ro St. Kamarýt, fragmentojn el lia fama verko „Anti Gide" rezonantajn pri la problemaro de la homa feliĉo, la libereco, la demokratio kaj la literaturo kaj arto, fine lian poemon „Printempa Anunciacio" (1911).

Poste „Panoramo" konatigas la leganton kun Peter Jilemnický (1901–1949), slovaka verkisto kaj socialisto, donante fragmenton el lia romano „Peco de sukero" (1934), kaj kun Marie Kudeříková (1921–1943), kontraŭfaŝista batalantino ekzekutita de la nazioj, kiu sendis el la malliberejo kortuŝajn leterojn nun kolektitajn sub la titolo „Fragmentoj de l' vivo", unu el kiuj estas prezentita.

El la cetera enhavo de la libreto menciindas speciale du eroj. En la gloso „Ne nur pri la romano" N. Danovskij (Moskvo) alvokas al pli serioza kaj sistema laboro kun la Esperanto-libro kiel kondiĉo por la estiĝo kaj kultivado de vera interna Esperanto-kulturo. Aliloke ne trovebla kaj pro tio interesega por ĉiu verkisto kaj tradukisto de poemoj estas la konsideroj de Jiři Kořínek en ties artikolo „Pri korekta verkado kaj tradukado de muzikaj tekstoj"; en ĝi la aŭtoro emfazas kaj pruvas per ekzemploj la neceson zorge atenti pri la koincido de la akcentoj muzika kaj lingva, por eviti eblajn, kelkfoje ŝokajn ŝanĝiĝojn de la senco.

Ke la aŭtoro estas kompetentulo en la kampo de la poem-tradukado, evidentiĝas al la leganto de „Panoramo" el la fakto, ke J. Kořínek estas la tradukisto de la komence menciitaj sonetoj kaj poemo de S. K. Neumann. La ceteran traduklaboron plenumis J. Vondroušek, O. Kníchal, M. Šaturová-Seppová, esperantista grupo en Gottwaldov kaj A. Hejnová. Al ĉiuj oni povas danki pro senriproĉa esperantigo de la ne facilaj tekstoj.

Jen vere leginda legaĵo, al kiu oni deziras estonte pli indan, presitan eksterajon.

D-ro K. Schulze

Pupteatroj kaj Esperanto

En la Tria Internacia Arta Festivalo en Budapeŝto (1966) partoprenis ankaŭ Hungara Ŝtata Pupteatro, kiu atingis grandan sukceson per sia prezento de *Sorĉa Fajrilo* laŭ H. C. Andersen. Ĝi montris la grandajn eblecojn pri plua, multe pli vasta utiligo de la Internacia Lingvo kiel rimedo de komunikado ankaŭ en tiu aparta sfero de sceneja arto.

La ideo trovis fekundan grundon en Zagreb, kie Studenta Esperanto-Klubo sub la gvido de Z. Tiŝljar iniciatis okazigon de internaciaj festivaloj de profesiaj pupteatroj, en la komenco ankaŭ de duonprofesiaj. En tiu agado la iniciatintoj renkontis apogon kaj financan subtenon de la edukaj instancoj en Jugoslavio kaj en aliaj landoj, kies trupoj partoprenis. Ekde 1968 ĝis la fino de 1972 entute okazis 5 Pupteatraj Festivaloj (PIF), ĉiuj en Jugoslavio.

La *Unua PIF* okazis en Zagreb en julio 1968 kun partopreno de 5 teatraj trupoj el Hungario, Rumanio, Bulgario kaj Jugoslavio. Ili prezentis en Esperanto 6 scenludojn por infanoj. La festivalon rigardis ĉ. 700 personoj, sed pere de la televidaj elsendoj verŝajne pluraj dekmiloj.

La *Dua PIF* okazis en oktobro 1969 en Zagreb. Partoprenis 6 profesiaj pupteatroj el 5 landoj: Rumanio, Ĉeĥoslovakio, Pollando, Hungario kaj Jugoslavio. Estis prezentitaj 6 scenludoj 11 fojojn antaŭ 3000 spektantoj.

La *Tria PIF* okazis en Zagreb kaj en la apuda urbo Sisak en oktobro 1970. Partoprenis 7 pupteatroj el 7 landoj per 7 scenludoj. Entute okazis 26 prezentoj antaŭ ĉ. 8 000 spektantoj.

La *Kvara PIF* okazis en Zagreb, Sisak kaj Varaždin en oktobro 1971. Sep pupteatroj el 6 landoj donis 42 prezentojn antaŭ ĉ. 8000 spektantoj.

La *Kvina PIF* okazis plian fojon en Zagreb kaj Sisak en septembro-oktobro 1972. Partoprenis 11 pupteatroj el 8 landoj: Soveta Unio, Hindio, Britio, Rumanio, Ĉeĥoslovakio, Pollando, Bulgario kaj Jugoslavio. Entute estis 62 prezentoj, kiujn rigardis ĉ. 17 000 spektantoj.

El la supraj koncizaj informoj vidiĝas la granda progreso de la pupteatraj festivaloj kaj el vidpunkto de partoprenantaj ensembloj kaj el tiu de nombro de spektantoj. Ĝi estas unika siaspeca evento en la mondo de kulturo.

En la kadro de la festivaloj okazas simpozioj, dum kiuj la partoprenantoj diskutis pri aktualaj problemoj de la pupteatra arto.

La sukceso de la festivaloj kuraĝigis organizadon de turneoj de unuopaj teatraj trupoj en aliaj landoj. Ekzemple, la Zagreba Pupteatro gastis en majo 1970 en Danlando kaj donis 4 teatrajn prezentojn; La pupteatro de Cluj kaj la Pupteatro de Ploesti, Rumanio, gastis en Jugoslavio en 1971 kaj 1972 kun entute 20 teatraj prezentoj; la Pupteatro de Košice, Ĉeĥoslovakio, gastis en novembro 1971 en Danlando kaj ludis tie 8 fojojn.

(Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo, London-Rotterdam, G/IV/3(e), 1974)



Ho Chi Minh kaj generalo Giap

Recenzo pri „Neforgeseblaj tagoj“[1]

Por popolo suferinta dum jarcento kolonian jugon la elbatalo de libero kaj sendependeco, la unuaj paŝoj en paco certe prezentas la plej altan idealon. Tiujn unuajn paŝojn generalo Vo Nguyen Giap priskribas en la dua parto de „Neforgeseblaj tagoj“. Estas marto de 1946a jaro. Ho Chi Minh, ĝenerale nomita Onklo Ho, subskribis Provizoran Konvencion kun Francio. Per tio por la juna Vjetnama Demokratia Respubliko komenciĝis nova vojparto. Post milita venko „necesis intensigi la lukton sur novaj kampoj politika, ekonomia kaj kultura“. Kaj vere la tri malamikoj de la vjetnama revolucio, t.e. la francaj koloniistoj, la ĉinaj militaristaj trupoj de Ĉiang Kaj Ŝek kaj la enlanda reakciularo, ĉiel provis saboti la batalhalton kaj damaĝi la novan socian ordon. Krome la suda parto de Vjetnamio ankoraŭ troviĝis sub franca kolonia jugo. Tial „la vjetnama revolucio en tiu etapo ĉiam celis ... reunuigi la landon, plifirmigi la demokratian respublikan reĝimon“.

Estas interese legi, kiel la gvidantoj de VDR kontraŭstaras provokojn de la francoj kaj atencojn de la naciistoj, kiuj volas malpacigi la rilatojn inter francoj kaj la revolucia registaro. La libro donas multajn informojn pri la diplomatia ludo „malantaŭ la kulisoj“, pri ruzaĵoj kaj intrigoj instigataj de la francoj.

Sed samtempe oni ĉiam staris apud la abismo de milito kun Francio. Tial oni reorganizis la popolan armeon sub la politika gvidado de la komunista partio kaj realigis novan militpolitikon, edukante novan generacion de armeanoj sub la slogano: „Lojala al la patrio, servema al la popolo“. Kiom saĝa kaj necesa tio estis, montris la okazaĵoj fine de 1946a jaro: La francaj militaristoj kaj koloniistoj pelis VDR-on en novan, okjaran militon.

Kiel centra persono reliefiĝas la profunde patriota kaj modesta figuro de Onklo Ho amata de siaj sampatrianoj. Generalo Giap mem estis intima kunlaboranto de Onklo Ho kaj tie bone desegnas la ĉiutagan vivon kaj sinceran sintenadon de la prezidento.

Neforgeseblaj tagoj sendube havas ne nur historian valoron sed same aktualan karakteron. La malfacilaĵoj en la definitiva akiro de ĉiuflanka suvereneco kaj sendependeco, la fiagoj de la koloniigaj potencoj kaj la streĉa lukto de liberigaj fortoj egalas en ĉiu novfondita nacia ŝtato.

Pri lingvaĵo kaj presteknika realiĝo de la libro nur malmulto estas direbla sed multo laŭdenda. Ja fakte jam estas memkomprenebla ke VDR, tiu malgranda lando elsuĉita pro milito, eldonadas E-lingvajn librojn modelajn. Kiel ĝiaj antaŭaĵoj ankaŭ tiu libro estas bonaspekta kaj zorge tradukita.

[1] Generalo Vo Nguyen Giap: Neforgeseblaj tagoj (Dua Parto), Fremdlingva Eldonejo, Hanojo 1975 263 paĝoj

M. Lennartz

Novaĵoj pri la astroj

En Sovetunio, kelkaj astronomoj prilaboris novan matematikan teorion, kiu ebligas antaŭscii precize la movojn de l'astroj, kiuj gravitas en la spaco.

Tiujn movojn regas la leĝoj de la ĉiela mekaniko, elpensitaj en la komenco de la 17a jarcento de la fama germana scienculo Kepler. Sed la Keplera orbito estas nur idea trajektorio: ĝi estas la vojo, kiun astro sekvus, se ĝi estus altirata nur de la suno. Sed fakte la planedoj sin altiras ankaŭ unu la alian. Kaj, ĉar la reciprokaj altiroj ŝanĝas la distancojn, estas memkompreneble, ke la preciza kalkulo de la trajektorioj estas terura kaprompaĵo.

Pri la artefaritaj satelitoj, la afero estas ankoraŭ pli malsimpla. Ilia trajektorio estas sinsekve submetita al pluraj influoj: Tero, Luno, Suno, Planedoj. Nu kiam aparato estas lanĉata en la spacon, estas tre grave antaŭscii kiel eble plej precize la vojon sekvontan kaj la tempon de irado. Per la kalkulmetodoj ĝis nun uzataj, la ekzakta scio de la estontaj movoj de la artefaritaj satelitoj ekzistas nur por 120 horoj. Post tiu tempo, la diferenco inter la antaŭkalkulita trajektorio kaj la efektiva trajektorio fariĝas pli kaj pli granda. Per la *analiza metodo* eltrovita de la sovetaj scienculoj, estas eble kalkuli la movon de la satelitoj por pluraj monatoj, eĉ pluraj jaroj.

Tiu teorio helpas ankaŭ por solvi problemojn geodeziajn (mezuro de la tero), geofizikajn, kaj astronomiajn.

André Cherpillod
(Franca esperantista packomitato 2/73)

Domfabriko: 600 frazeologiaj esprimoj hungaraj-Esperantaj de Csiszár Ada-Kalocsay Kálmán. eld. Hungara Esperanto-Asocio 1975, 188 p.

Ni citas el la prefaco:


„Tiu-ĉi interesa kolekto entenas precipe konstantiĝintajn vortkonstruojn, idiotismojn, parolturnojn. La frazeologiaĵoj estas vicigitaj laŭ la hungara teksto en alfabeta ordo, tiel do la libro servas unuavice por hungaroj. Tamen, ankaŭ nehungaroj ĝin povas utiligi. Ekzemple lernantoj de la lingvo kaj perfektiĝemuloj: lernante parkere la esprimojn, ili povas pligrandigi sian vortstokon kaj sian pretecon por interligo de vortoj. La ellernon de la Esperantaj idiotismoj ĝenerale plifaciligas ilia ludeco, rima aŭ aliteracia formo“. Tiom el la prefaco. La aŭtoroj citas kiel fontverkon i.a. la Proverbaron Esperantan de Zamenhof kaj Redensarten und Redewendungen in Esperanto de Curt Kessler (der esperantist 1971/1972). Jen kelkaj ekzemploj: Kiu diras ‚a‘, diru ankaŭ ‚b‘. Kiu levis la piedon, devas ekpaŝi. Se vi prenis la violonon, prenu ankaŭ la arĉon. Entute, tre valora libreto.



Okupacio

Tio estas la malbonaŭgura titolo de romaneto verkita de Erni Krusten, eldonita 1972 en Tallinn de la eldonejo „Eesti Raamat".
La germana okupacio de Estonio en la jaroj 1941–1944 liveras la sombran kadron por la okazintaĵoj en apudfronta urbeto. Sur 100 paĝoj en 5 ĉapitroj oni renkontas homojn, kiuj estas aŭ pli bonaj aŭ malpli bonaj ol ili ŝajnigas. Kelkiuj profitas de la cirkonstancoj dum la aliaj suferas. Kalle Paggi, kies vivo estis detruita de la militaj eventoj, fariĝas la senkulpa viktimo de denuncado. Tamen – aŭ ĝuste pro tio? – li restas homa homo kaj eĉ protektas aliajn kontraŭ la suspektoj kaj persekutoj de la okupantoj. Nur en la unua ĉapitro la leganto renkontas lin mem, dum en la sekvantaj li estas prezentata per la rakontoj de siaj parencoj aŭ samurbanoj. Tiamaniere oni karakterizas ne nur lin, sed ankaŭ sin mem. Ĉion kaj ĉiun cinike primokante, Paggi akre prijuĝas la homojn kaj cirkonstancojn kaŭzitajn de la okupacio. Lin oni facilanime opinias kiel apartemulon.
Kial do li forlasis la militlernejon?
Kial li ne fariĝos pastro?
Per kio li nun vivtenas sin?
Tiaj enigmaĵoj instigas la homojn al pli aŭ malpli eraraj konjektoj. Lian heroecon perceptas nur la subkuracisto, kiu deĵorante en la pundoma hospitalo, post la fizikaj punoj estis prizorginta liajn kontuzojn kaj vundojn. La kompatindaj gepatroj nek komprenas la virtojn de la propra filo nek la kondamnindajn cirkonstancojn. Ne mirinde, ke „la ŝultroj de la patro pli kaj pli malleviĝis, kvazaŭ iu metadus sur lin nevideblan ŝarĝon. Ĉiam kaj ĉiam ankoraŭ". Liaj laŭ agoj kaj karakteroj t.n. „kontraŭludantoj" estas la urbestro kaj sinjoro Siilinder, ĉiam nur servantaj al la okupantoj. Evidentiĝas, ke reputacio ne devas inkluzivi homajn sentojn kaj noblajn pensojn.
Erni Krusten skizas delikatsente kaj psikologie trafe la homojn. Senpatose li vivigas la tiamajn eventojn kaj eĉ sentigas lirikajn momentojn.
Ne mirinde, ke por „Okupacio" li ricevis la jaran premion de la Estona SSR por 1969. Oni deziras ankaŭ konatiĝi kun la aliaj ekde la 1927a jaro aperigitaj pli ol 20 verkoj.
La eksteraĵo de la volumeto adaptiĝas al sia enhavo: ĝi estas bonkvalita kaj nobla.
La traduko de Hillar Saha estas senriproĉe trafa kaj klara. Agrable, ke per piednotoj estas klarigitaj tipe germanaj ne por ĉiuj kompreneblaj esprimoj. Tiurilate oni preteratentis „galifeo" kaj „Blutfaruno".
Redaktis ĝin Henrik Seppik, formis kaj ilustris Avo Keerend. La libro estas ricevebla ĉe Centra Laborrondo Esperanto en Kulturligo de GDR, 108 Berlin, Charlottenstr. 60.

Hella Sauerbrey



RD Vjetnamio

202-paĝa- formato 18 × 21 cm, Fremdlingva Eldonejo Hanojo 1975.

Post la „Resumo pri Vjetnamio", eldonita en 1971, la sama eldonejo nun jam la duan fojon ofertas verkon, ĉifoje pli ampleksan kaj pli detalan, de informa karaktero. La libro enhavas la ĉefĉapitrojn „La vjetnama nacio", „La institucioj", „Ekonomio", „Edukado, sano, sciencoj kaj teknikoj", „Beletroj kaj artoj", „Internaciaj rilatoj" kaj „Aldono, ĉefaj urboj kaj regionoj". La ĉapitroj konsistas el multaj subĉapitroj, kiel ekzemple „La vjetnama lingvo", „Agrikulturo", „Publika sano", „Teatro", por nomi nur kelkajn. Enkonduke mallonga historia ĉapitro bone prilumas, kiamaniere en daŭra batalo kontraŭ naturfortoj kaj fremdregado formiĝis la vjetnama nacio, kulturo kaj civilizacio. Same interesa estas la ĉapitro pri la vjetnama lingvo (bedaŭrinde nur 3 paĝoj), sed la donitaj ekzemploj ŝajnas al mi ne tre lerte elektitaj. La granda ĉapitro „Ekonomio", kompletigita per multaj tabeloj, montras reliefige la grandegajn damaĝojn fare de la usonaj agresantoj kaj la sub tiaj kondiĉoj preskaŭ nekredeblajn atingojn de la heroe batalanta vjetnama popolo sur tiu ĉi kampo. La donitaj ekzemploj pruvas, ke Vjetnamio el postrestinta agrarŝtato nun en paco rapide disvolviĝas al moderna agrar-industria ŝtato, sed same malkaŝe niaj amikoj montras al ni, kiaj malfacilegaj taskoj ankoraŭ estas solvendaj sur tiu ĉi vojo. Kvankam recenzo ne estu prezentado de enhavo, mi malgraŭ tio devas mencii nur kelkajn el multaj mirigaj faktoj, kiuj faras tiun ĉi libron leginda. Tiel ni ekzemple ekscias, ke oni jam en 1958 en la ebenaj regionoj likvidis la analfabetecon kaj jam plejparte atingis la sepjaran lernejan edukadon, ke ĥolero, variolo, malario kaj aliaj epidemiaj malsanoj estas likviditaj, ke oni eldonis de 1965 ĝis 1972 200 milionojn da libroj, ke ĝis januaro 1974 jam 67 ŝtatoj starigis diplomatiajn interrilatojn kun RDV, ktp., ktp. La lingvaĵo ne estas same bona tra la tuta libro, sed tio ne tro ĝenas, ĉar ja ne temas pri beletraĵo. Pli bedaŭrinda estas la fakto, ke pro la malbona paperkvalito la multaj fotoj ofte ne estas klare ekkoneblaj, sed ĉu mi rajtas kritiki tion, sciante pri la malfacilegaj kondiĉoj, sub kiuj niaj vjetnamaj amikoj tiel fervore laboras? Kelkajn vortojn, ne troveblaj en PIV, oni aŭ ne uzu aŭ klarigu (ekz. kompradoro, ateliero, dans). Kaj ankoraŭ unu „kritiko", kiu instigu al malpli da modesteco: Laŭ mia opinio „RD Vjetnamio" ne nur informu, sed same instigu la legantojn, pli detale konatiĝi kun la vjetnama popolo kaj ŝtato. Kial do ne mencii en la unuopaj ĉapitroj aliajn esperantlingvajn titolojn el la pli ol 60 jam aperintaj, ekzemple en la ĉapitro pri naciaj malplimultoj „Etnografiaj donitaĵoj", en la historia enkonduko „La tradicia Vjetnamio" ktp.?
Resume mi rekomendas tiun ĉi legindan libron al ĉiuj pacamaj esperantistoj, ĉar ĝi montras, kion kapablas kunage internacia solidareco kaj la firma volo de popolo aganta en la konvinko de batalo por bona kaj justa afero. Minimume min ĝi jam instigis al plia okupiĝo pri la vjetnama popolo kaj kulturo.

D. Dungert

Monda Federacio de Sciencistoj eldonas „Sciencan Mondon" en Esperanto!

La Monda Federacio de Sciencistoj (World Federation of Scientific Workers) kun sia sidejo en Londono, estas tre prestiĝa kaj renomena internacia neregistara organizo. 1946 fondita de mondfamaj sciencistoj kiel P. M. S. Blacket kaj J. D. Bernal, la Federacio deklaris „La ĉefa celo de la sciencaj societoj agnoskantaj la statuton de la Monda Federacio de la Sciencistoj, estas la plibonigo de la homa ekzistado per la apliko kaj disvolvigo de la scienco. La sciencistoj ne povas pli longe pasive rigardi la misuzon de la scienco, kondukanta ne nur al nenecesaj suferoj kaj ruinigoj, sed ankaŭ bremsanta la progreson de la scienco mem. Ĉar nur en erao de paco kaj de internacia kunlaboro la scienco povas esti utiligata plene por la bono de la homaro, tial la sciencistoj havas pli grandan respondecon por la konservo de bonaj politikaj rilatoj inter la nacioj ol la simpla civitano". (El la preamblo de la statuto)
Al la Federacio aktuale apartenas membroj-societoj en 26 landoj. En pliaj 30 landoj MFS havas korespondajn membrojn.
La profilo de la agado de MFS i.a. videblas en la temoj de konferencoj okazigitaj dum la lastaj jaroj, ekz.:
- eŭropa sekureco kaj scienca kunlaboro (Vieno 1967)
- la rilatoj inter scienco kaj tekniko (Bratislava 1969)
- problemoj de junaj sciencistoj (Enschede 1971)
- ABC-armiloj, malarmado kaj la respondeco de la sciencistoj (Berlin 1971)
- la sciencisto en la socio (Varno 1973)
- la rolo de la sciencistoj kaj aliaj organizaĵoj en la batalo por malarmado (Moskvo 1975)

MFS eldonadas la revuon „Scienca Mondo", kiu aperas kvarfoje en la lingvoj angla, franca, rusa kaj germana, ĝis nun ... Ĉar ekde 1976 tiu-ĉi grava revuo ankaŭ aperos en la internacia lingvo Esperanto. Tion sukceson akiris ISAE, nepre gratulinda. La enhavo de la artikoloj estas ĝenerale popularscienca. Speciale grava por Esperanto estas la fakto, ke tiu revuo kontribuos al la evoluigo de la scienca terminaro. Ĉiu iom science interesita esperantisto do nepre abonu la revuon ĉe la poŝto aŭ ĉe Bulgara E-o Asocio.

La akuzativo

Antonin Slanina

A. Kiel kaj kiam oni uzas la akuzativon?

(Jen kelkaj ekzemploj:

1) *Rekta objekto/komplemento/en prepozicio kun transitiva verbo*
Jozefo aĉetas libron ... /kion?
Ŝi skribas leteron ... /kion?
2) *Montras direkton:*
Petro iras en urbon ... /kien?
Karlo metas libron sur fenestron ... /kien?
3) *Dato:* La kunveno estos la 3an de majo ... /kiam?
Praha, la 1an de marto 1973/kiam? (ĉe letero)
4) *Mezuro, pezo, prezo:*
La libro kostas dudek kronojn ... /kiom?
La sukero en sako pezas 60 kilogramojn ... /kiom?
La vojo estas longa 200 kilometrojn ... /kiom?
5) *Daŭro de ago:*
Dormi la tutan nokton.
La laboro daŭros ankoraŭ tri monatojn.
6) *Anstataŭas prepozicion:*
Mi atendas vin / anstataŭ: mi atendas je vi.
Helpu lin! / anstataŭ: helpu al li!
Demandu nur specialistojn / anstataŭ: demandu nur ĉe specialistoj.

Kiam post la verbo sekvas diversaj objektoj kun diversaj signifoj, tiam atentu la diferencon: Mi sendas leteron al Parizo / ne: Parizon!
Li instruas min pri tio / ne: tion!
Li instruis min / anstataŭ: al mi.
Li instruis tion / anstataŭ pri tio.

B. Kiam oni ne uzas la akuzativon?

Post *ĉ i u j prepozicioj sekvas nominativo, sed post kelkaj oni povas uzi akuzativon.* Diferencu bone:

anstataŭ	Vi estos en kunveno anstataŭ mi. /anstataŭ Vi anstataŭos min en la kunveno. /kiun?
antaŭ	Instruisto staras antaŭ la tabulo. /kie? Iru antaŭ tabulon! /kien?
apud	Arbo staras apud domo. /kie? Venu apud min! /kien?
ĉirkaŭ	Ĉirkaŭ la vilaĝo staras arboj. /kie? Jozefo vojaĝas ĉirkaŭ la mondon. /kien?
ekster	Karlo promenas ekster la domo. /kie? Jozefo iras ekster la urbon. /kien?
en	Li iras en ĝardeno. /kie? Li iras en ĝardenon. /kien?
inter	Inter Stockholmo kaj Praha estas granda distanco. /kie? Iru inter ilin kaj dancu! /kien?
kontraŭ	La urbodomo staras kontraŭ katedralo. /kie? Iru kontraŭ malamikon! /kien?
krom	En kunveno krom mi estis 20 homoj. /krom kiu? Krom Karlon mi vidis Jozefon. /krom kiun?
po	Patrino donis al infanoj po unu pomo. /po kiom? Donu al ili po tri pomojn! /kion?
post	La trajno veturos post unu horo. /post kiom? Venu post lin! /post kiun?
sub	La hundo kuŝas sub la tablo. /kie? La hundo rampas sub la tablon. /kien?
super	Lampo pendas super la tablo. /kie? Pendigu lampon super la tablon! /kien?
sur	Sur la tablo kuŝas libroj. /kie? Metu la librojn sur la tablon! /kien?
trans	Ili loĝas en la domo trans la rivero. /kie? La birdoj flugas trans la riveron. /kien?

C. Prepozicioj, post kiuj n e e s t a s uzata la akuzativo

al	Ni venos al vi. Donu pacon al mi!
ĉe	Karlo estis vizite ĉe geonkloj. Arbo staras ĉe domo.
da	Kilogramo da pomoj. Kiom da tagoj vi estos en Londono?
de	Letero de amiko. Libro de Zamenhof
dum	Dum la nokto oni dormas, dum la tago oni laboras.
el	Maria venos el urbo. Venis leteroj el Stockholmo.
ĝis	Mi akompanos vin ĝis la domo. De Prago ĝis Beogrado.
je	Mi ĉiam atendas je vi. Mi trinkas je via sano.
kun	Ĉu vi promenos kun mi? Li iras kun ŝi.
laŭ	Mi iros laŭ rivero Vltava. Laŭ ŝoseo kreskas arboj.
malgraŭ	Vi eliris malgraŭ mia malpermeso. Malgraŭ tio ŝi manĝis.
per	Per krajono oni skribas. Ili korespondas per Esperanto
por	Mi venis por diri al vi, ke mi havas novan aŭtomobilon.
preter	En la strato preter nia domo promenas homoj.

pri	Karlo prelegas pri urbo Praha
pro	Mi venis pro serioza afero. Pro muziko mi ne povas dormi.
sen	Li pasis preter mi sen saluto. Kafo sen sukero.
tra	La lumo iras tra la fenestro. Mi vidas vin tra vitro.

(El „Bulteno de Esperantista Klubo en Praha", 2/73, 1/74)

Renkontiĝo kun poligloto

La 16an de oktobro 1974 en la gazeto, „Literaturnaja gazeta" (Soveta Unio) estis publikigita la artikolo „Angliŝ? Franse? Dojŝ?" de G. Silina, en kiu oni sciigis, ke la famekonata soveta sciencisto, akademiano Paul Ariste estas studinta kvardek lingvojn.

La pasintan someron mi havis eblecon renkontiĝi kun la fama sciencisto en la Tartua Universitato (Estonio), kie la profesoro laboras. Ekde 1944 li estas gvidanto de la katedro pri finnougraj lingvoj.

La afero estas, ke profesoro Paul Ariste estas ankaŭ granda fakulo pri Esperanto: jam 12jaraĝa li libere parolas Esperanton kaj 16jaraĝa publikigas sciencan esperantlingvan artikolon en „Esperanto triumfonta". En 1923 li ĉeestis la UK de UEA en Nurnbergo, kie li konatiĝis kun Vasilij Eroŝenko. Kiel unusola persono en Soveta Unio li ricevis la rajton oficiale ekzameni esperantistojn.

Kiam la ekzameno finiĝis, mi demandis la profesoron, ĉu li vere regas kvardek lingvojn.

„La afero estas, ke oni ne povas regi multajn lingvojn en la sama grado aŭ egale." – diris la profesoro. „Oni klasifas la scipovon de fremdaj lingvoj laŭ kvingrada tabelo:

1a grado – la homo parolas, legas kaj skribas tute libere.

2a grado – la homo devas pripensi dum la parolado kaj uzas vortaron ĉe la skribado.

3a grado – la homo devas serĉi kelkajn vortojn en Xa vortaro, ĉar li ne povas ilin rememori.

4a grado – la homo regas lingvon nur pasive.

5a grado – la homo povas nur legi pere de vortaro."

Respondante mian demandon la akademiano konsilis kritike rilati al informoj pri poliglotoj kaj li diris, ke li mem, ekzemple, laŭ la 1a grado regas nur *ok* lingvojn (inter ili ankaŭ germanan lingvon), laŭ la tria grado – *dekok* kaj laŭ la 5a grado – tridek lingvojn.

Ivan Kulakow, instruisto
de germana lingvo, USSR,
Voronej

Kie aboni al „Paco"

Abonprezo:
Por nesocialismaj landoj – 20 fr. fr. aŭ egalvaloro. Por socialismaj landoj – laŭ la subaj indikoj:

Aŭstrio:
S-rino A. Sindl. A-3108-ST-PÖLTEN. Wagram Altmanngasse 22

Belgio:
S-ano Glady Claude, II-Rue Edmond Tollnaere 1020 BRUSELO

Britio:
P. Hewitt, 1 Saltram Close, Nythe, Swindon Wilts,

Bulgario:
Bulgara MEM-komitato, Bulv. Hristo Botev 97 1303 SOFIA — 3 lv.

Ĉeĥoslovakio:
Ĉeĥa Esperanto-Asocio. MEM-sekcio, Jilska 10, 110 00 PRAHA 1 — 30 kr.

Danlando:
Egon Starup, Kong Georsvej 110-I 2000 KOPENHAGO

Finnlando:
Erkki Jarvinen, Ukonkivenpolku 2-1-68 00440-HELSINKI-44:

Francio:
Federation Esperantiste du Travail. 179, rue Ordener 75018 PARIS (p. ĝ. k. Paris N-ro 902-52):

Germana Demokratia Respubliko:
Centra Laborrondo Esperanto en Kultur-Ligo de GDR
Charlottenstr. 60. 108-BERLIN: — 6 m

Hungario:
Hungara MEM-komitato, H-1368 BUDAPEST pf. 193 — 30 f

Italio:
Mauro La Torre, via De Carolis 119, I-00136 ROMA (p ĝ k. 144162):

Japanio:
Ce Yasuo Satoo, 777 Ooizumigakuen-Tyô, Nerima-ku, 177
(Japana Pacdefenda Esperantista Asocio)

Jugoslavio:
Dim. Bjelanoviĉ, str. Zahumska 23/b 18 11000-BEOGRAD.

Kubo:
Oscar Otero, Havana Esp.-rondo, Poŝtkesto 314. HABANA 1.

Norvegio:
Olav Reiersol Nils Bays vei 86 OSLO 8

Pollando:
Pola Esperanto-Asocio, ul. Jasna n-ro 6, WARSZAWA:

Popolo Respubliko de Koreo:
Korea Esperanto-Asocio, Poŝtkesto 16, PJENJANG.

Rumanio:
S-rino Irma Fülop, str. Calan 12. etj. 1 SIBJU:

Sovetunio:
Unuiĝo de sovetaj societoj de amikeco kaj kulturaj rilatoj kun aliaj landoj
Kalinina 14, MOSKVA K-9: — 1.80 r.

Svedio:
Tomas Jansson Studenstaden 15:235 S-752 33 Uppsala

Usono:
Jim Deer, 12946, Ne Nancock, PORTLAND Oregon 97230.

Vjetnama Demokratia Respubliko:
Vjetnama Pacdefenda Esperantista Asocio, 68 Ly Thuong Kiet, HANOJ

Aliaj landoj:
Aŭ turni sin al unu el la ĉi-supraj adresoj, aŭ aboni ĉe S-rino G. ROUX, Route de Villeneuve, 47150 MONFLANQUIN (Francio (p g k. Nantes 816/-52).

Redakta komitato:

William GILBERT (Francio).
Ĉefredaktoro
D-ro Detlev BLANKE (GDR)
Kimiaki KURITA (Japanio)
Stanislaw SWISTAK (Pollando)
NIKOLA ALEKSIEV (Bulgario)
Arta aranĝo: Kiril DRAJEV (Bulgario)
Lingva konsultato: Asen GRIGOROV (Bulgario)

Kunlaborantoj:

D-ro Istvan SZERDAHELYI (Hungario)
D-ro Magomet ISAEV (Sovetunio)
doc. S. N. PODKAMINER (Sovetunio)
Mihaly GERGELY (Hungario)
Rudi GRAETZ (GDR)
Oldřich KNÍCHAL (ČSSR)
Antonie SINDL (Aŭstrio)
Dao ANH KHA (DRV)


Kien skribi?

PREZIDANTO: Nikola Aleksiev, str. Neza bravka 1, vhod II, 1113 SOFIA – Bulgario.
VICPREZIDANTOJ: Karl Kvist, Rinmansgatan 13. S. 660 – 92 DEJE, Svedio.
S. N. Podkaminer, ul. Ŝkolnaja 48/7, 197010 LENINĜRAD USSR
ĈEFREDAKTORO: William Gilbert, 30 rue Croix – Montoire, 37 100 TOURS. Francio
ĜENERALA SEKRETARIO: Drahomir Koĉvara. Haliĉska 50, 70500 Ostrava – Hrabuvka, ĈSSR.
SEKRETARIOJ: Hideo Kumaki, P. O. Box 17 Edogawa, TOKIO Japanio.
D-rino Magda Ŝaturova, Posta 1, D 10 BRATISLAVA, Slovaka Esperanto-Asocio, CSSR.
CENTRA ADMINISTRANTO: Boris Popov. Bulgara MEM-Komitato, bulv. Hristo Botev 97, 1303 SOFIA – Bulgario.
KASISTINO: Germaine Roux, Route de Villeneuve, 47150 MONFLANQUIN, Francio (pĝk. Nantes, 816-52)
GRAVE: Abonpagojn el socialismaj landoj direktu al 1303, SOFIA bul. Hristo Botev 97, por „PACO". El ne-socialismaj landoj – al la kasistino.

Eldoninto de tiu ĉi numero:

GDR-MEM-sekcio Kulturligo de GDR / asocia sekretariejo (Centra Laborrondo Esperanto de GDR). Redakcio: 108 Berlin, Charlottenstrato 60, Telefono: 2 20 29 91. Respondeca redaktoro: D-ro Detlev Blanke. Redakcia komisiono: Otto Bäßler, Ludwig Schödl, Rudi Graetz, Rudolf Hahlbohm, Werner Pfennig. Redakcia fino: 20a Februaro 1976. Presejo: Grafischer Grossbetrieb Völkerfreundschaft Dresden, Betriebsteil Meissen.

6403 - 36



Ĉi-tiu numero estas bulteno de la MEM-sekcio de Germana Demokratia Respubliko, DDR - 108 Berlin, Charlottenstr. 60, telefono 2 20 29 91

Bulgario

Dez. koresp. kun germanaj geesperantistoj pri ĉ. t.: Penka Milenova (32jara) Beron 17, Kazanlak

Dimitr Stefanov, Sâbev, ul. Komsomolska 26, dez. kor. k. GDR-ano pri ĉ. t.

Petranka Georgieva Dimitrova, 2128 S. Aprilovo, okr. Sotijski, (26-jara) dez. kor. k. germ. esp. pri ĉ. t., kol. suvenirojn 30-jara instruisto dez. kor. k. germ. geesp.: Deĉo Karaulanov, 6160 Tâja, St. Zagorski

Viktoria Sarova, Plovdiv, str. Wassil Markov 12 B, dez. kor. Esperante, germane

Dez. kor. tutmonde: d-ro Ljudmil Conov, str. Kilijna 2a, Šumen, d-ino Ivanka Marinova, str. 0. Paisi 44, Šumen

ĈSSR

Helena Hrudková, Esp.-rondeto „Stelo" ĉe la Kultúrne a spol stredisko 96001 Zvolen 1, dez. kor., kol. bk., pm.

Gekomencantoj dez. kor. pri ĉ. t., bv. skribi al L. Ryznár, Svitavy, Ant. Slavička 22. (kursgvidanto)

GDR

Junulo, 18jara, dez. kor. pri ĉ. t. kun geamikoj tutmonde, R. Köhler, 402 Halle, Südstr. 47

Inĝeniero Kurt Padel, 12 Frankfurt/O., Alte Uni 14, dez. kor., kol. bk. (41jara)

Oskar Stolberg, 705 Leipzig, Erich-Ferl-Str. 78, serĉas de „Homo kaj Kosmo": n-ro 1/1965, 3 + 4/1967, 3 + 4/1970, 4/1971, kontraŭ alia Esp.-literaturo.

Lernantino, 12jara, dez. kor. tutmonde, Bärbel Winguth, 195 Neuruppin, Rosa-Luxemburg-Str. 35

Edith Lohse, Bandelowstr. 9, 154 Falkensee, GDR, 51 j., dez. kor. pri ĉ. t., literaturo, arto, muziko, sporto, turismo, b. k.

Komencanto (diplomsportisto) dez. koresp., interŝ. bk, Joachim Kretzschmer, 9312 Kurort Oberwiesenthal, Keilbergstr.

Kiu povas helpi? Mi serĉas div. n-rojn de „der esperantist": 1–8, 18–25, 28–31, 34, 35, 43, 44. Gerhard Böttcher, 7031 Leipzig, Maurice-Thorez-Str. 38

15 gekursanoj dez. kor. tutmonde, bv. skribi al: Gerhard Böttcher, 7031 Leipzig, Maurice-Thorez-Str. 38

Dez. kor. pri ĉ. t.: Karl-Heinz Drechsel (22 j.), 9208 Lichtenberg 77

Junulo, 16jara, dez. kor. tutmonde pri ĉ. t., kol. bk. pm.: Hannjo Grosch, 402 Halle/Saale, Robert-Koch-Str. 8d

Eugeniusz Jendrysiak, Rothensee, 3019 Magdeburg, Aug.-Bebel-Damm, Flachbauten 3/15, dez. kor. k. germ. esp.

Junulino, 16-jara, komencantino, dez. kor.: Karin Margašefski, 9208 Lichtenberg 124

Peter Ritz, 608 Schmalkalden, Weidebrunner Gasse 13, (21 j.) dez. kor. tutmonde pri geografio, astronomio, vojaĝoj

Serĉas jenajn n-rojn de „der esperantist": 1–8, 11, 12, 18–25, 26–31, 34, 35, 40, 41, 43, 52–56. Mi pagos aŭ interŝ. kontraŭ alia esp. literaturo: Oskar Stolberg, 705 Leipzig, Erich-Ferl-Str. 78

Hungario

Komencanto, 15jara, dez. kor., kol. bk., Tibor Gulyás, 6640 Csongrád, Placo Marx 16, 9/49

Lernantoj dez. kor. pri ĉ. t. prec. pri lingvoj: Mihály Kiss, 5700 Gyula, Szent Lászlo 1, Károly Hajdu, 5700 Gyula, Past ut. 1

Gimnazia lernantino (17 jara) dez. koresp. Ágota Flamis, 9700 Szombathely, Kisfaluoy 55

Maria Marics, 1139 Budapest XIII, str. Teve 45/12, 37jara, serĉas korespondamikinon, ŝatas librojn, dancmuziko, kol. pm., bk.

Kulturdomestro, 28jara, dez. kor. kun germ. fraŭlino, pri muziko, pentrarto, arkitekturo: Oszkár Princz, H-9901 Körmend, pf. 2

Lernanto, 14jara, dez. kor. kun germ. knabino pri sporto, astronomio, geografio, geologio, geofiziko, kol. pm, bk. Stefano Tarjani, 6100 Kiskunfélegyháza, Pf. 549

17-jara lernantino dez. kor. pri ĉ. t. kun samaĝa lernantino, kol. kantojn: Éva Aubry, H - 1108 Budapest, Juhar u. 28

16-jara knabino dez. kor. k. geknaboj: Ágnes Greiz, 5000 Szolnok, Kossuth tér 10/b, 1.em.3.

Gelernantoj 9–10 j., el infanhejmo dez. kor. k. gelernantoj, bv. skribi al Ilona Hideg, 4080 Hajdúnánás, Fürdö ut. 1

25 jara instruistino en infanhejmo dez. kor. k. geesp. prec. kursgvidantoj pri esp.-instruado: Ilona Hideg, 4080 Hajdúnánás, Fürdö ut. 1

Erzsébet Jukász, H-5700 Gyula, Inoze pápa u. 49/d, 17 j., dez. kor. pri Esperanto k. junulara movado Esperante, ruse, france, itale

Éva Kadleczik, 8100 Várpalota, Schönherz Z. u. 2, 2/5, dez. kor. k. geknaboj 13–15 j.
Simon Árpád, 8200 Veszprém, Stadion ut. 22, dez. kor. k. geknaboj.

Italio

Fabio Vivoda, Via XXV Aprile, 4, 1-34074 Monfalcone – 60, dez. kor. kun gesamideanoj el GDR pri lingvistiko, etnologio, muziko. Interŝ. pm, bk, revuoj, jurnaloj, libroj.
Geesperantistoj el Italio dez. kor.

Fornaretto Maria Grazia (I.ino 11-jara) Via Guglielmo Silva 33, 20149 Milano

Fornaretto Mary (S.ino 37-jara prof.ino) sama adreso

Rimoldi Nicoletta (I.ino 11-jara) Via Alcuino 5, 20149 Milano

Perego Danilo (knabo 12-jara) Scuola Colorni, Via Paolo Uccello 1/A, Classe II B, 20148 Milano

Robecchi Mario (knabo 13-jara) Via Antonia Pozzi 5, 20149 Milano

Robert Herold (knabo 13-jara) Via Albani 69, 20148 Milano

Izzo Antonino (26-jara S.ro) Via F.lli Cervi 19, 20046 Biassono (Milano)

Foà Aldo (24-jara S-ro) Via Gulli 19, 20147 Milano

Foà Maria Teresa (S.ino 23-jara) same adreso

Bardoni Anna Maria (S.ino 43-jara) Via De Nicola 14, 20100 Milano

Saiani Walter (S.ro 30-jara) Via Romagna 15, 20100 Milano

Ciceri Negri Giuseppina (S-ino 40-jara) Via Mecenate 23/2, 20100 Milano

Ciceri Negri Luigi (S.ro 41-jara) same adreso

20 knaboj 15–18 jaraj: Corso di Esperanto, Liceo Carducci, Via Beroldo 9, 20127 Milano

16 knaboj 15–18 jaraj: Corso di Esperanto, Roberto Tresoldi, Via Palazzini 8, 20100 Milano



Pansecchi Carla (S.ino 50-jara) Via Pomposa 2, 20100 Milano

40 knaboj 9–10 jaraj: M.o Mirko Marcetta, Scuola Elementare, Sotto il Monte Giovanni XXIII, 24039 Bergamo

15 knabinoj 14–15 jaraj: Corso di Esperanto, Dr. Prof. Leandro Taccani, Via G. A. Amadeo 79, 20134 Milano

Micanti Pietro (S-ro 24-jara) Via Lupi di Toscana 8, 20110 Bareggio (Milano)

Marciano Claudio (S.ro 51-jara) Via Fusano 9, 20100 Milano

Maulini Gisella (S.ino 56-jara) Cusago 275, 20100 Milano

Rebez Silvia (knabino 10-jara) Via Procaccini 44, 20100 Milano

Rebez Diego (S.ro 38-jara) Via Procaccini 44, 20100 Milano

Parenzan Alessandra (F.ino 34-jara) Via Pagatschnig 32, 20100 Milano

Fioroni Livio (S.ro 20-jara) Via Cesare Correnti 21, 20100 Milano

Fioroni Mario (17-jara knabo) same adreso

Giannini Arturo (S.ro 28-jara) Via Carozzi 5, 20100 Milano

Ricetti Stefania (F.ino 23-jara) Via Pelizza da Volpado 41, 20100 Milano

Decio Anna (F.ino 25-jara) Via Matteotti 1, 20032 Cormano (Milano)

Tresoldi Claudio (knabo 13-jara) Via Palazzini 8, 20100 MILANO

Kanado

Instruisto, 42jara, dez. kor. kun esperantistoj el GDR pri lingvoj k. socialismo, T. James Brennan, 23 Kathrose Drive, Willowdale, Ontario M 2 J 3 P4

Kolumbio

Dez. kor. prefere kun filatelistoj de GDR, Luis Fernando Martinez Solís, Kesto Aerpošta 6950, Medellin - 1, Kolumbio, Sud. Ameriko

Kubo

Enrique L. Miranda, Avenida 7/-94/9, entre 94 y 98 Güinez, Habana, 49 j., teksa teknikisto, dez. kor. tutmonde pri ĉ. t., kol. bk. pm.

Rafael L. Miranda, prez. de „Güinez Esperanto-Rondo", Apartado 53, Güinez, Habana, 42 j., kontisto dez. kor. tutmonde pri ĉ. t., kol. bk., pm.

Lucas Fernandez Camejo, Ave 47, n-ro 11203, Reparto Liberacion, San Jose de las Lajas, Habana, studento, dez. kor. tutmonde, kol. bk, pm, librojn, revuojn, gramofondiskojn ktp.
Roberto Guthrie Ruiz, Cocos 10e/Pepe Antonio y Nazareno Guanabacoa n-ro 11, La Habana, dez. kor. pri sporto, politiko, lingvoj.

Pollando

Junulino, 17jara, dez. koresp. tutmonde Esperante, pole, ruse, france, angle, germane. Kol. bk. Danuta Durska, 64-100 Leszno, ul. Kurpińskiego 2. Interesiĝas pri muziko, filmo, sporto.

Junulino, 19jara, dez. koresp. tutmonde, Esperante, pole, ruse, france, angle. Kol. bk., intersiĝas pri muziko, filmo, sporto: Agnieszka Talarozyk, ul. Kurpińskiego 2, 64-100 Leszno.

Inĝeniero, 28jara, dez. koresp. kun germanaj esperantistoj, interesiĝas pri alpismo, skisporto, vojaĝoj, kol. monerojn, librojn, pm, gramofondiskojn, Zygmunt Horodyski, 04-396 Warszawa, Dwernickiego 27/m 76

Rumanio

Fraŭlo, 18jara, dez. kor. kun fraŭlino: Trifan Craciunescu, str. Aural Vlaicu 57-A, 5800 – Suceava

Fraŭlo, 18jara, dez. kor. pri sporto, kol. bk: Mihai Curelar, str. Lautarilor 19, 5875 – Radauti – Bucovina

Fraŭlino, 17jara, dez. kor. pri sporto, amikeco: Rodica-Mariana Rusu, str. Coŝbuc 6, 5875 – Radauti – Bucovina

Junulo, 16jara, kol. bk, pm: Marta Csuka Mayki, Ciocaia 324, Bihor,

Fraŭlo, 18jara, dez. kor. pri sporto, kol. bk: Precop Doinel, str. Popa Sapca 12, 5875 – Radauti – Bucovina

Fraŭlino, 18jara, dez. kor. pri medicino, Rodica Tenciu, LS – Bul 1. Mai 21, 5806 – Suceava

Fraŭlino, 18jara, dez. kor., kol. insignojn, monerojn ktp.: Netea Paraschiva, LS-Bul 1. Mai 21, 5806 – Suceava

Fraŭlo, 19jara, kol. aviadilajn modelojn, bk.: Mihai Greculesi, Al Pinului 4 – 4, 5801 Suceava

Soveta Unio

Lernantinoj, 15jaraj, dez. kor. kun ĉ. l. pri ĉ. t., kol. bk, pm, esperantajojn: Antonina Poljomkina, 453 200 Salavat, str. Puŝkina 13-1, Baŝkirio; Larisa Akkulova, 453 200 Salavat, str. Gagarina 20-42, Baŝkirio

Junulino, 16jara, dez. kor. tutmonde pri kino, sporto, popmuziko, turismo, aŭtomobilojn, kol bk. aktorkartojn: Brigitta Rudjinska, Brivibas str. 96 – 1, Liepája, Latvio

Junulo, 17jara, dez. kor. tutmonde, kol. pm, bk: Laimius Straznickas, 234 365 Stakliŝkes, Prienu raj. Litovio

Virvi Pajula, Aruküla, Viru-jaa gupi Sjsk. Rakvere Raj., Estonio, (25j.) dez. kor., kol. pm, bk k. Esp-rev. + librojn

Jurgis Valiunas, Alytaus raj. 234 593 Punia, Litovio, dez. kor. tutmonde, kol. pm, bk k. diskojn

Librotenisto 25jara, dez. kor., kol. pm, bk k. esp.-librojn, Arvo Toomsalu, Pärnu, Estonio, str. Suur-Jõe 54

Komencantinoj el Pärnu, Estonio,

dez. kor. tutmonde, kol. bk:

Kõrgesaar, Silva, 12j., lernantino, str. Kitse 3

Kõrgesaar, Sirje, 14j., lernantino, str. Kitse 3

Tann, Helve, 52j., kuracistino, str. V. Aru 4–6

Välimaa, Floreida, 60j., denta teknikistino, str. Seedri 1a

Koor, Leida, 18j., lernantino, str. Luka 32a

Rinsar, Lia, 17j., lernantino, str. Suur-Jõe 16–11

Karula, LY, 17j., lernantino, str. Kingissepa, 38–2

Rumen, Tiiu, 16j., lernantino, str. Haapsalu 33

Tisler, Kreedi, 30j., med. fratino, str. Rüksika 4

Lõhmussar, Elvi, 38j. flegistino, str. Suur-Kuke 67–24

Linn, Helgi, 41j., apoteka asistentino, str. Luha 23

Gelernantoj dez. koresp. tutmonde. Interesiĝas pri estradmuziko, naturo. Kol. pm, bk.: Laima (15-234365 Stakliŝkes, Litovio, Prenu raj.



Lea Grundig:
Unidad Popular vivas!